

# NEPO DE VIRINO

VOGULAJ POPOLFABELOJ

**Tradukis Rafaelo Bartal**

## **La stria tamiaso kaj la urso**

(Vogula popolfabelo el la regiono de la rivero Sigva)

Iam en la pra-pratempoj la malgranda tamiaso estis flava, kiel la sablo sur la bordo de la riveroj.

Ĝi vivadis-dormadis, neniu ĝin maltrankviligis. Sciu, nek ĝi maltrankviligis iun ajn. Do tiel libere ĝi povis kuradi, kie ajn laŭplaĉe.

Foje, dum ia bela somera nokto, promenadante la malgranda tamiaso en arbara regiono renkontis kun la Granda Arbara Maljunulo. Kiam ili renkontiĝis, tuj ili komencis interparoli. Pri la vetero, pri la arbaro kaj pri la kuloj, el kiuj jam estis ankaŭ tiutempe ege multa. Sed la kvietan vorton baldaŭ sekvis disputo.

Ili komencis disputi pri tio, ke frufumatene kiu el ili ekvidos pli flue la oran radion de la leviĝanta suno. Tuj ili eĉ decidis, ke ili finaranĝos la aferon. Ili do supreniris sur altan kalvan monteton, por ke ili atendos kune la unuajn sunradiojn. Bele ili sidiĝis, la Granda Arbara Maljunulo sur tiun flankon, kie la suno kutimis ĉiumatene leviĝi de malantaŭ la arbaro, la malgranda tamiaso kontraŭe tien, kie la suno kutimis subiri. Antaŭ la malgranda tamiaso leviĝis alta montopinto, kaj antaŭ la urso larĝa profundaĵo etendiĝis. Ili lokigis la

dorsojn unu kontraŭ la alia, kaj komencis atendadi.

Dum ili tiel sidadis, la Granda Arbara Maljunulo pensis en si:

— Jen, kia malsaĝa besto estas tiu ĉi malgranda tamiaso! Ja tiudirekte ĝi povas atendi la sunon eĉ ĝis vespero!

Ĉu dum longa tempo ili sidis, ĉu dum mallonga tempo ili sidis, ili diris eĉ ne unu vorton unu al la alia. Ĉirkaŭ proksimiĝo de la tagiĝo, la urso denove komencis murmuretadi en si:

— Nun! Ankoraŭ unu momento, kaj en la valo ekaperos la suno! Mr, mr, eĉ mi jam gajnis nian veton!

Sed vane murmuretis la urso, la unua sunradieto ankoraŭ neniel volis ekaperi.

Do dum ili tiel atendadas, subite nur malantaŭ la dorso de la Granda Arbara Maljunulo ekkriis la malgranda tamiaso:

— Mi vidas ĝin, mi vidas ĝin, mi vidas ĝin! Mi ekvidis unua la oran sunradieton!

Rigardas la Maljunulo, ĝi elstarigas eĉ plie siajn okulojn, kiuj ankaŭ sen tio estis sufiĉe grandegaj, sed ĝi vidas nenion. Antaŭ ĝi en la profundo la valo estas ankaŭ nun nur tia malluma, kia ĝi estis antaŭe! Tre mirante ĝi sin turnas: do jen ĝi vidas, sur la alia flanko la kalva montopinto jen tute brilas en la ora lumo de la matena suno! Kaj la malgranda tamiaso, starante sur siaj malantaŭaj

piedoj, dancas, ĵetas-ĵetadas sin en ĝojo.

La Granda Arbara Maljunulo pro tio tiel ekkoleriĝis, ke ĝi per sia granda unghava piedaĉo ĝisfine ungoskrapis la malgrandan dorson de la eta besto.

Ho ve, ektimiĝis pro tio la malgranda tamiaso, ĝi ekkuris kun sanganta dorso. Ĝi ensaltis en la densejon, rifuĝis hejmen en sian neston.

La malgranda tamiaso dum longa tempo estis malsana, poste tamen ĝi lekadis siajn vundojn, sanigis sin, ĝis kiam ĝi fariĝis sana. Bele ĝi saniĝis, sed sur ĝia dorso por ĉiam tie restis la kvin nigraj strioj, la postsigno de la ungegoj de la Granda Arbara Maljunulo.

De tiu tempo la malgranda tamiaso estas timema, ĝi timas ĉion. Apenaŭ ekbrilas antaŭ vi ĝia flava pelto, kun kvin nigraj strioj sur la dorso, jam vi eĉ ne vidas ĝin: ek, ĝi jam malaperas en la densejo.

Kaj de tiu tempo oni nomas la malgrandan tamiason stria tamiaso.

## **La filo de la Masmal-Virino**

(El la regiono de la rivero Sosva)

Foje-foje vulpo kutimis iri al la sterkejo de la Mondgardanta Viro, la Filo de la Masmal-Virino. Rimarkis tion la filo, kaj li diris al la maljunulino:

— Iu vulpo tre alkutimiĝis ĉi tien iradi, mi devus ĝin kapti. Mi starigos por ĝi kaptilon kun saĝoj.

— Se vi volas ĝin starigi, do vi starigu ĝin — respondis al li la maljunulino. — Eble eniros la vulpo.

Laŭ tio do la filo foriris, por ke li starigu la kaptilon. Preskaŭ dum tuta tago li penadis kun ĝi, fariĝis jam vespero, kiam ĝi estis preta. Tiam li decidis hejmeniri, kaj kuŝiĝis. La sekvantan tagon, preskaŭ nur krepuskiĝis, la filo jam ellitigis, por ke li rigardu: ĉu kaptis ion lia kaptilo. Li rigardas, rigardas, kvazaŭ estus en ĝi io! Li alkuras, do li jen vidas, en la kaptilo estas hundo: la hundo de la filoj de la Urba Princ-Maljunulo!

— Ora sankta Dio! — ekkriis la filo de la Masmal-Virino, poste li kuris al la maljunulino kaj li diras al ŝi:

— La hundon de la filoj de la Urba Princ-Maljunulo kaptis la kaptilo!

— Ho ve, kia malagrablaĵo trafis nin! — lamentas ankaŭ la maljunulino. —

Certe ĝi estis multekosta hundo zibelon kaptanta, kaj nun oni prirespondigos nin!

Tiam la filo pripensis ion, li eliris antaŭ la domon. Dum iom da tempo li hakadis lignon, klakbruis, moviĝetadis, poste denove iris en la domon, kaj diris:

— Mia maljuna patrino, metu vi al mi en la grandan ŝtonpoton sufiĉe grandan kvanton da viando por kuiri!

Laŭ tio do la maljunulino efektive prenis la grandan ŝtonpoton, dispecigis porcion da viando, metis ĝin en la poton, poste la tuton metis sur la fajron por kuiriĝi. Kiam la manĝaĵo estis preta, la filo deprenis ĝin de la fajro, elportis la poton en la korton, kaj starigis ĝin inter du trabojn, kiujn ĵus li kunpretigis.

Apenaŭ ke li reiris en la domon, jen li aŭdas, venas la du filoj de la Urba Princ-Maljunulo. Ili alvenas antaŭ la domon, rimarkas la poton.

— Aŭdu, — diras unu el ili, — ni kunportu kun ni ĉi tiun poton! Nur du trabojn oni bezonas, kaj jam bolas en ĝi la manĝaĵo. Precize tian ni bezonas, kiam ni vagadas en la arbaro!

— Kian strangan poton vi havas? — ili demandas la knabon. — Nek fajro troviĝas sub ĝi, tamen bolas en ĝi la manĝaĵo!

— Ĉar tiu ĉi estas tiaspeca poto, respondas la knabo, — ke oni eĉ fajron ne devas fari al ĝi.

Kaj post iom da tempo sin turnante al la maljuna patrino li tiel daŭrigas:

— Ĝi jam sufiĉe bolis! Mia maljuna patrino, alportu tiun poton, por ke ni povu prezenti al niaj amikoj!

La virino eliris, enportis la poton. Po unu telero ŝi ĉerpis el ĝi por ĉiu, kaj ili komencis manĝi. La viando estis tiom mola, ke preskaŭ ĝi disiĝis, kiam oni tuŝis ĝin.

— Ej, — miris la filoj de la Urba Princ-Maljunulo. — Filo de Masmas-Virino, Mondgardanta Viro, kian poton vi havas!

Kiam ili jam estis pretaj kun la manĝo, la gastoj denove ekparolis, ili komencis marĉandi pri la potu.

— Aŭdu, ĉu vi ne vendus al ni Ĝi tiun poton? — demandas unu el ili.

— Vi ne bezonas tion! — aldone diras la alia.

— Ja ankaŭ ni bezonas ĝin, ĉar ja la maljunulino estas jam malforta, ŝi ne kapablas jam haki lignon. Sed se vi donos la sufiĉan prezon, kial ne?! — respondas al ili la knabo, la filo de la Masmas-Virino.

— Nu, kiom vi postulas pro ĝi?

— Kiom mi postulu? Vi alvenis sur ĉevaloj, donu al mi viajn ĉevalojn! Kaj viajn peltojn el zibelfelo! Plu mi ne postulas, por mi sufiĉas ankaŭ tio ĉi!

— Filo de Masmas-Virino, Mondgardanta Viro, estas bone, bone! La prezo estas konvena, ni do donos ĝin pro ĝi — respondis la filoj de la Urba Princ-

Maljunulo.

Kaj kun tio ili interkonsentis. Unu el la filoj de Urba Princ-Maljunulo metis la poton sur sian ŝultron, kaj ili nur tiel perpiede iris hejmen kun tiu.

Apenaŭ ke ili alvenis hejmen, unu el ili prenis la hakilegon kaj komencis pretigi tenilon por la pota el du traboj. Dume interne la alia prenis viandon, dispecigis ĝin en malgrandajn pecojn, metis ĝin en la poton. Poste li pretigis en ĝin akvon, kaj ĉion, kio estis bezonata. Nun envenas ankaŭ la alia, ili elportas la poton. Ili metas ĝin inter la du trabojn jam antaŭe starigitajn, kaj ili reiris en la domon. Ili atendas iomete, kaj poste baldaŭ ekparolas unu:

— Eble ĝi jam komencis boli, rigardu ĝin!

Tiam unu eliras por rigardi, sed la pota ankaŭ nun troviĝas tiel, kiel ĝi estis antaŭe. Ili atendas denove. Ili atendas, poste eliras la alia, por rigardi la poton. Jen li vidas: la pota tiel kovriĝis per glacio, ke kiam unu hundo ĝin flanken puŝis, la akvo nek tiam elverŝiĝis el ĝi. Ambaŭ ekkoleris ĉikoncerne kaj diras:

— Pro tio ili puniĝos! Morgaŭ ni reiros al ili, ni detruos ilian kabanon, poste ni sufiĉe batos ilin!

La sekvantan tagon efektive ili ekiris.

Sed antaŭ ol ili estus tien alvenintaj, la filo de la Masmal-Virino buĉis unu el la hieraŭ ricevitaĵoj. El ĝia laringo li eltranĉis unu pecon. Ties unu finon li kunligis, plenigis ĝin per la sango de la ĉevalo, poste ankaŭ la alian



finon li kunligis. Nun li prenis ĝin, kaj la tuton pendigis sur la kolon de la maljunulino. Apenaŭ ke li estis kun tio preta, jam eĉ venis la filoj de la Urba Princ-Maljunulo. Unu el ili diras:

— Nun jam ni mortigos ilin! Ni detruos ilian kabanon kune kun ĉio.

La alia ne konsentis tion:

— Ne, ne! Eble oni dirus, ke ŝtele ni atakis ilin, kaj tiel ni mortigos ilin.

Per tio poste ili eniris. Do jen ili aŭdas, ke la maljunulino kaj ŝia filo treege kverelas:

— Vi havis ununuran poteton, ankaŭ tiun vi vendis. Kiel ni povos nun nin vivteni sen ĝi?! — diras ĝuste tiam la maljunulino al sia filo.

Tiam la filo komencas blasfemi, tamen ankoraŭ ambaŭ restas sidantaj. Ili iomete elspiras sin, poste la maljunulino eĉ pli furioze nur denove komencas:

— Ke vi ...

Tiam jam eksaltas la filo, unue li nur metas tranĉilon antaŭ sin, kaj poste la maljunulino eĉ nun ne volas ĉesi, li alsaltas, ekprenas la kapon de la maljunulino, kaj per la tranĉilo tratanĉas la ĉevalan laringon plenan kun sango sur ŝia kolo. Tiam la virino tuj falis surdorsen, kaj la filo sidiĝis trankvile. Li sidis iomete, kvazaŭ nenio estus okazinta, poste pripensante li ekstaris, prenis la tranĉilon en la manon, kaj komencis ĝin ĵetadi en la plankon. Li ĵetadis ĝin, ĵetadis, ĝis kiam foje la tranĉilo rekte stariĝis en la lignotabulo. Tiam la knabo

diras:

— Vivanta fera tranĉilo, se vi bezonas ankoraŭ vian virinon, revivigu ŝin!

Poste li eltiris la tranĉilon el la planko, kaj denove komencis ĝin ĵetadi. Dum li tiel ĵetadas ĝin, foje la maljunulino komencas moviĝi, kaj sidiĝas rekte. Ŝia vesto estas plen-plena per sango.

La filoj de la Urba Princ-Maljunulo nur rigardas, poste diras:

— Filo de Masmal-Virino, Mondgardanta Viro, forlasu nin!

Nun la princfiloj eliras, ekstere ili komencas interkonsiliĝi:

— Aŭdu, — diras unu al la alia, ni devas akiri tiun ĉi tranĉilon! Kiom ajn li postulas pro ĝi, ni devas tion pagi!

Antaŭ ne longtempe, kiam ni iris hejmen, niaj edzinoj kiom nin riproĉis, ĉar ni iris hejmen sen peltoj. Vidu, samtiel ni devas ilin buĉi, ili poste timos, kaj ne kuraĝos plu kvereli kun ni.

Tiam ili reiris:

— Filo de Masmal-Virino, Mondgardanta Viro, ni estis ĉiam bonaj amikoj, ĉu vi vendus al ni tiun ĉi tranĉilon?

— Se vi pagos konvenan prezon, kial ne?!

— Nu, diru, kiom vi postulas?

— Kiom mi postulu? Vi alvenis sur ĉevaloj, donu al, mi viajn du ĉevalojn. Krom tio ankaŭ viajn zibelfelajn peltojn, kiujn vi surhavas! Plu mi ne postulas,

tiom sufiĉos al mi.

— Nu, do estu tiel...! — diras la filoj de la Urba Princ-Maljunulo, eĉ ili jam demetas la valorajn peltaĵojn. Poste ili prenas la tranĉilon, kaj ili ekiras kun ĝi hejmen.

Do apenaŭ ke ili alvenis hejmen, ilia patro tuj komencas riproĉi ilin:

— Kial vi interparolis kun la filo de la Masmal-Virino? Li scias multege da artifiko, li estas tre ruza homo! Ni ne kapablas lukti kun li, kaj eĉ fine nin ĉiujn ekstermos!

— La filoj vidis, ke ilia patro estas furioza, pro tio ili lasis lin sola: do nur parolu la maljunulo! Ili foriris al sia laboro. Subite la Urba Princ-Maljunulo jen aŭdas: ankaŭ la virinoj riproĉas siajn edzojn:

— Ankaŭ pasintfoje, kiam vi estis ĉe la filo de la Masmal-Virino, ĉe la Mondgardanta Viro, vi stumpletadis hejmen en nura ĉemizo. Kaj nun denove! Ĉu vi havas la kapon en la ĝusta loko, aŭ vi perdis jam eĉ la lastan eron de via menso?!

— Tiam unu el la viroj prenas la tranĉilon, ekkaptas sian edzinon, kaj simple li tratranĉas ŝian gorĝon, kaj transdonante la tranĉilon ankaŭ al la alia, li diras:

— Iru, faru ordon ankaŭ vi!

Efektive li prenas la tranĉilon, kaj poste ankaŭ li tratranĉas la gorĝon de sia

edzino. Ambaŭ virinoj kuŝas jam sur la tero, kiam subite enpaŝas ilia patro:

— Precize ĵus mi diris al vi, por kio vi vizitadas la filon de la Masmavirino! Fine ni efektive ekstermiĝos.

La filoj diras nenion al la maljunulo, nur prenas la tranĉilon, kaj komencas ĝin ĵetadi en la lignotabulan plankon. Ili ĵetadas, ĵetadas, kaj foje nur ĝi ekstaras en la ligno, kiam ili komencas tuj:

— Se vi volas vian virinon, resanigu ŝin! — Tion ili diras al la tranĉilo, sed la virino eĉ ne movetiĝas!

Tiam la alia komencas. Nun li ĵetadas la tranĉilon, poste diras:

— Vivanta, fera tranĉilo, sanigu vian virinon!

Ej! La virino tute ne ekmoviĝas! La filoj de la Urba Princ-Maljunulo dum iom da tempo ĵetadas la tranĉilon, atendas, poste komencas plori, kaj poste, — kion alian ili povus fari, — ili enterigis siajn edzinojn.

La sekvantan tagon matene la filoj de la Urba Princ-Maljunulo denove nur decidis, ke ili iros al la filo de la Masmavirino por lasta kalkulraporto. Sed jen, eĉ li ne estas mallerta intertempe, kaj kiam la filoj de la Urba Princ-Maljunulo alvenis tien, li subite ŝanĝis siajn vestojn je virinaj. Li surmetis al si virinan veston, peltan tukon, kaj sidiĝis en la angulon, al la loko de la knabinoj.

La princofiloj ekstaras antaŭ la kabano, komencas interkonsiliĝi. Unu el ili demandas:

— Ĉu ni renversu sur ilin la kabanon, kaj tiel ni mortigu ilin, aŭ ni eniru antaŭe je kelkaj vortoj?

— Amiko, nur tiel sekrete ni ne povos ilin mortigi! — respondas la alia. — Ni eniros, ĉar eble oni povos ankoraŭ pri ni paroli, ke ni ŝtele atakis ilin.

Do tiel ili enpaŝas. Sed jen, ili vidas, ke la filo ne estas hejme. Nur tiu maljunulino, kaj iu alia virino sidetas en la angulo.

— Avino, — demandas la filoj de la Urba Princ-Maljunulo, — kie estas via filo?

— Li iris en la arbaron por ĉasadi, tie vi serĉu lin!

— Kaj tiun ĉi virinon de kie li prenis al si?

— Li ne alportis ŝin de ie, tiu ĉi estas lia fratino.

— Lia fratino? Sed kie ŝi estis ĝis nun, ke ni ne vidis ŝin?

— Ĉe la parencoj, kaj nun ni vokis ŝin hejmen, — respondas al ili la maljunulino. Kaj la filoj de la Urba Princ-Maljunulo eliras antaŭ la kabanon, por ke ili interkonsiliĝu pri la afero. Diras unu el ili:

— Aŭdu, ni nun restis sen edzino. Kio estus, se ni petus la manon de la virino al ni?

— Tio estus bone —, konsentis la alia, poste ambaŭ reiris en la kabanon. Sur la boto de unu el ili estis truo.

— Ve, avino, sur mia boto estas truo! Venu pli proksimen, rigardu nur ĝin!

— Por kio mi rigardus ĝin, mi estas jam maljuna. Mi ne komprenas tion, — respondas al ili la virino. Sed ili nur ne cedas.

— Tiam do donu al ni ĉi tiun junan virinon, — petadis la princofiloj, kaj ili ĵetis la boton antaŭ la kurtenon de la knabina dormejo. Tiam la kurteno iom ekleviĝis, kaj post ĝi malaperis la boto, kaj post momento ĝi reflugis al la mezo de la planko. La filoj de la Urba Princ-Maljunulo eklevas ĝin, rigardas ĝin, sed eĉ la loko de la truo ne estis videbla! Tiam ili denove nur komencas:

— Ej, maljuna onklino, tamen donu al ni ĉi tiun knabinon! Donu ŝin al ni, por ke ni fariĝu parencoj!

— Mi eble ŝin donus, — respondas la maljunulino, — sed ne estas hejme ŝia frato, sen li mi ne povas ŝin doni al vi!

Do tiel ili petegis, klopodadis, penadis. Kiam la princofiloj jam tre petegis la knabinon, la maljunulino diras:

— Eble mi donus ŝin, kiel mi diris, al vi mi donus ŝin, sed ankaŭ ĉi estas ĝuste tia malbona, neobeema, kiel ŝia frato. Se vi kondutos al ŝi malbone, vi ne povos ŝin reteni! Sed se vi jam tiel insiste ŝin volas, do por mi ĝi estas indiferenta, vi prenu ŝin! Sed poste vi ne forgesu, kion ini diris!

Per tio la maljunulino komencis, por ke ŝi pretigu ilin al la vojo. Ŝi provizis ilin kun ĉio, kun kio estas kutimo delasi knabinon el la domo. Fine ankoraŭ ordonis al ili:

— Do nun portu ŝin, se vi volas porti, nur portu ŝin! Sed tute ne lasu ŝin en la sama domo, en kiu vi loĝas, sed lokigu ŝin inter viajn fratinojn, en la senfajrujan-senakvan knabinkabanon. Tie vi gardu ŝin, nur loĝu ŝi ankoraŭ tie!

Per tio poste ili forveturis. Laŭorde ili eĉ alvenis hejmen. Ĉu longa tempo pasis, ĉu mallonga tempo pasis, iam nur komenciĝis la somero. Fariĝis varme. El la knabindomo oni iris sin bani. Dum banado la knabino de la Urba Princ-Maljunulo subakviĝis, poste stariĝis, ŝiaj okuloj pleniĝis kun akvo. Antaŭe li elfrotis la akvon el la okuloj, poste ĉirkaŭrigardis. Jen, ŝi vidas: la alia estas nenie! Ŝi ne povis tion pripensi, kien ŝi malaperis:

— Certe ŝi iris pli internen en la profundon kaj sufokiĝis, — pensis la princfilino, kaj ŝi alarmas la homojn. Unu el ili serĉas ŝin en la profunda akvo per ĉirkaŭferma reto, la alia sur la alta bordo en la arbaro esplorante. Ĉu surĉevalo, ĉu perpiede oni serĉas ŝin, sed ili nenie sin trovas. Ĉu dum longa tempo, ĉu dum mallonga tempo oni serĉas ŝin, sed fine ĉesigas la serĉadon: kie ajn ili serĉis ŝin, ne trovis.

Forpasis la somero, fariĝis malvarmo. Komenciĝis la aŭtuno. Falis jam la neĝo, frostiĝis ĉio. Nun diras la Urba Princ-Maljunulo al siaj filoj:

— Jen: estas ĉi tie la vintro, estas jam tempo. La filo de la Masmal-Virino, la Mondgardanta Viro nun certe venos al ni por viziti nin! Sed lia fratino mortis, ni nun ricevos de li!

Efektive, unu tagon la hundoj iun komencas ekkapti. Rigardas la maljunulo: vere la Masm-as-filo alvenis. Li venis, alvenis al la domo, sed ne eniris: li ekstaris antaŭ la domo, nur tiel. Tiam la Urba Princ-Maljunulo eliras. Li vokas ankaŭ la filojn, por ke ili salutu la gaston. Ankaŭ ili eliras, salutas lin, kliniĝas antaŭ li, invitas lin internen:

— Filo de Masm-as-Virino, Mondgardanta Viro! Vi venis, alvenis, ne ni invitis vin, vi mem venis. Do kial vi staras ĉi tie en la korto?! Venu do internen al ni!

— Ĉu vi pensas, ke mi venis favore al vi? Mia maljuna patrino donis al vi unu filinon provizante kun ĉio. Pro tiu filino mi venis.

— Estas ĉi tie neniu knabino. La knabino mortis, — respondas al li la filoj de la Urba Princ-Maljunulo. Tiam la Masm-as-filo ĉirkaŭrigardas; eĉ tion ke li en tiun ĉi domon eniru! Kaj li diras:

— Se vi volas bonon, alportu al mi mian fratinnon! Cetere sur la loko de via kabano eĉ peco da ligno ne restos!

Kaj tiuj eĉ volus alporti ŝin, ili volonte alportus la knabinnon, sed kiel? Diras nun la maljunulo:

— Kion ni faru? Filo de Masm-as-Virino, Mondgardanta Viro, atentu do mian vorton! Kiel kunulo de mia virgulina filino loĝanta en senfajruja-senakva domo, en la mondo vivanta, sur la tero loĝanta edzo de mia filino knabinda,



tiel vi eniru ĉi tien!

Laŭ tio jam nek la Masm-as-filo lasis sin inviti, do li eniris la domon. La maljunulo kondukis lin rekte al la filino:

— Jen la princa virino, jen mia princa bofilo. Vi vivu ambaŭ de nun kune, — diris la maljunulo. Do tiel fariĝis la filo de la Masm-as-Virino la bofilo de la Urba Princ-Maljunulo.

La Urba Princ-Maljunulo havis ankaŭ alian filinon. Tiu ĉi kiam ekvidis la knabon, aŭ kiam li eniris al ili, tuj ŝi komencis ridi. Ŝi ridis, ĉiam nur ridadis. Ankaŭ unu nokton, ŝi eniras al la gejunuloj, kaj tuj komencas ridi. Ekkoleriĝis tiam la Masm-as-filo. Li diras nek unu vorton, nur ekkaptas sian bofratinon, elportas ŝin al la rando de la urbo, kaj tie per ŝia mentono fiksas ŝin al la kolumnopinto de la urbobarilo. Nun jam plu ŝi ne ridos al li!

Matene iras \_la homoj, ili trovas tie la knabinon, sur la rando tie la urbo. Entute ŝi jam estas frostiĝinta, glaciiginta. La homoj eĉ ne povis imagi, kiu metis ŝin tien, sen tio, ke eĉ unu okulo estus vidinta tion. Rigardas ankaŭ la Urba Princ-Maljunulo, sed nek li estas pli saĝa ol la ceteraj. Foje nur ekparolas unu maljunulo:

— Alportigu ĉi tien la filon de la maljuna amanitfungon manĝanta ŝamano! Li certe diros al vi tion!

Tiam la Urba Princ-Maljunulo sendas unu el siaj filoj en la urbon de la

maljuna ŝamano. Li do tuj iras, transdonas la peton:

— Vi maljunulo, vi jam fariĝis fatigita, ankaŭ blinda fariĝis. Mia patro petas vian filon! — diras la filo de la Urba Princ-Maljunulo al la ŝamano, kiu jen tuj forpermesas kun li sian filon.

Baldaŭ ili alvenas en la urbon de la Urba Princ-Maljunulo. Ili eniras la domon. Meze de la domo jam estas pendigita la grandega kuprokaldrono duprenila, la kaldrono plena kun viando. Ĝia rando estas ĉirkaŭe metita kun fungoj. Antaŭe ili atendis iom, por ke la kaldrono komencu boli. Poste la ŝaman-filo iris al la mezo, kaj komencis ĉirkaŭiri la kaldronon, sorĉi:

*Mi vagadas tra la mondo  
Ronda kiel ronda ringo,  
Ringan mondon ĉirkaŭiras,  
Okulvide mi esploras:  
La virinojn mi ne vidas,  
Nur mi vidas kaj mi vidas:  
La filon de Virin-Masmas!*

Tiel parolis la ŝamano, sed li vane parolis, ĉar la filo de la Masmas-Virino, senrimarke, jam de longa tempo eliris el la domo. Li ĵetis al la hundoj oston por mordetadi, ili ekkaptis unu la alian, kaj li dum tio povis fari kion volis. Li

subite surrampis la supron de la domo, kaj ekkriis:

— Hej, homoj, hejmaj homoj, kial vi kunvenis! Jen venas la malamiko!

Tiam la homoj el la domo ĉiuj elkuris, kaj li mem tra la kamentubo senrimarke malsupreniĝis en la ĉambron. La ŝamananto ankoraŭ ĉiam nur ĉirkaŭiris. Tiam la Masmas-filo ekprenis lin, lian kapon enpremis en la bolantan kaldronon, poste denove komencis kriadi:

— Ho, ve, kial vi eliris ĉiuj, nun ĉi tiu malfeliĉulo enfalis perkape en la kaldronon!

Tiam la homoj ĉiuj enkuregis, kaj li ŝteliris, tiel ke ili denove ne rimarkis lin.

La homoj rigardas la ŝamanon; li vere jam finis sian vivon! Aldone eĉ devus la mortinton hejmen transporti. Ili komencas nun petegi, ili volas konsentigi la Masmas-filon:

— Transportu lin vi! Transportu lin vi! ili diras al li, tiam li do konsentis.

— Mi efektivigos tion, se vi tiel volas, — respondis al ili, poste li prenis la mortinton, kaj elportis lin. Li alvokis tien sep-ok hundojn, jungis ilin al glitveturilo. Li sursidiĝis, poste eĉ jam ili ekiris. Dumvoje subite la filo de la Masmas-Virino rimarkas du homojn ĉasantajn per sago, arko, kiel ili ĉasadas sciuron. Subite jen, unu el iliaj sagoj falas precize apud la filon de la Masmas-Virino. Tiam li subite levas la sagon, enpikas ĝin en la frunton de la mortinta

homo, kaj komencas kriadi:

— Homoj, homoj, kion vi faris?! Tiu ĉi sorĉis per fungo, ankoraŭ li ne konsciiĝis, mi portas lin hejmen. Kaj vi ĉi tie pafadis, unu sago falis ĉi tien, ĝi traboris lian frunton. Ve, vi mortigis la kompatindulon! Kun vi transportu lin antaŭ la okulojn de lia patro. Mi ne transportos lin! Tiam ankaŭ la sagpafantaj homoj komencis petegi:

— Estu vi bonfaranto nia, transportu lin vi! Transportu lin vi!

— Transporti mi ne transportos lin! Mi ne eniros al tiu fungomanĝanta maljuna ŝamano! Transportu lin vi mem! — respondas al ili la Masmás-filo, sed la homoj nur plue petegas lin:

— Kiom ajn vi postulas, ni pagos ĝin al vi. Nur vi traneportu lin!

Volonte jam aŭdis tion ĉi ankaŭ la Masmás-filo:

— Se do estas bezonata transporti lin al lia patro, do jam mi transportos lin, respondis li al la sagpafantoj.

Li iris, iradis, ĝis kiam li atingis la domon de la per fungosorĉanta maljuna ŝamano. Tiam li singarde malfermis la pordon, enpelis tra ĝi la hundojn en la domon, kaj poste ekkriis:

— Hej, maljunulo, batu! Do batu, ĉar ili neniigos vin, formanĝos vin!

Tiam la maljunulo prenis hakilon, kaj nevidante li komencis hakadi, tranĉadi dekstren-maldekstren. Ĉu al unu hundo li batis, ĉu al la mortinto. Li

rompis, frakasis, ĝis kiam la Masm-as-filo denove komencis nur kriadi, lamentadi:

— Maljunulo, kion vi faras?! Vi mortigis vian propran filon. Vian filon... la sorĉulon! Li estis ankoraŭ ebria, mi portis lin hejmen, kaj vi nun mortbatis lin! Mortigis lin!

— Do kiu kriadis, ke: batu, maljunulo?

— Kiam mi eniris, antaŭ via pordo estis grupo da knaboj, tiuj tiel kriadis,  
— respondis al li la filo de la Masm-as-Virino.

Poste li reiris al sia edzino, kun brando plenigis sian stomakon, kaj kuŝiĝis por dormi.

## **La komercista homo**

(El la regiono Sosva)

Iam iu komercista homo havis du filojn. La pli maljuna, kiu jam estis edziĝinta, daŭrigis la okupadon de sia patro, la pli juna ankoraŭ estis nur knabo. Sed ankaŭ kiel knabo, li estis nur tia malgranda misevoluinta. Foje la patro diris al la pli maljuna:

— Filo mia, se mi mortos, mian havaĵon mi heredigos al vi ambaŭ. Mi akiris ĝin, vi uzu ĝin. Via pli juna frato ne kapablas komerci, ne scias tion, se li laboros, do estos bone, se li ne laboros, ankaŭ tiel estos bone! Vi ne riproĉu lin, ne embarasu lin! Mia akiraĵo lin subtenos, nutros. Jen do li vivu tiel, kiel al li plaĉos!

Ĉu ili vivis dum longa tempo, ĉu ili vivis mallongtempe, la patro ankaŭ la pli malgrandan filon edzigis, poste li mortis. La filoj nun komencis vivi memstare. La pli maljuna komercis, li iradis de urbo al urbo, la pli juna vivadis sur la akiraĵo de sia patro.

Post iom da tempo al la pli malgranda la edzino de lia pli maljuna frato komencis diradi tiaĵojn:

— Vi konstante nur kuŝadas, el la preta manĝas, el la preta mastrumadas.

Vi ne prizorgas la brutojn, vi ne zorgas pri la fojno, pri la ligno. Vi bankrotigas la laboron de via pli maljuna frato. Li havas dungitan homon, kaj vi la aferojn tute ne antaŭenpuŝas!

Denove pasis iom da tempo, la bofratino diras al sia edzo:

— Aŭdu, via frateto faras nenion hejme. Kaj vi el la pretaĵo nur subtenas, nutras lin.

— Ĉu kion mi povus fari?! — respondis al si la edzo. — Nia patro antaŭ sia morto diris:

— La havaĵon mi akiris, vi ambaŭ vivu el ĝi. Via frateto faru tiel, kiel al li plaĉas. Ĝis kiam daŭras lia patra havaĵo, nur manĝu, nur kuŝadu. Por kio mi embarasu lin? Li ne konsumas mian havaĵon!

— Forpelu lin! Li vivu de nun sole el la havaĵo de lia patro! Ni ekvidos, kion li atigos per ĝi! — irigis la langon ankaŭ pluen la virino. Ŝia edzo nur silentis, provizore li diris nenion al sia frato. Poste tamen li komencis lin riproĉi, eĉ batadi.

Foje al tio diras lia pli juna frato:

— Vi nur batas, batadas min. Vi estas forta, mi malforta: mi ne povas ion kontraŭfari. Mi scias, ke mi ne laboras, nek vin helpas, tio estas vera. Sed mi ne la vian akiraĵon manĝas, nek el la via ĉasado mi vestas min. Nia patro ordonis tiel, ankaŭ vi mem tion scias bone, ke ĝis kiam lia akiraĵo estos, mi vivu nur el

tio.

Mi ne scias, ĝis kiam tiu ĉi sufiĉos, sed vi min ne hontigu, ne batadu! pli volonte se vi volas tion, mi foriros. Ĉu mi pereigos, ĉu mi restos vivanta, mi estos mia propra mastro! Se mi volas kuŝadi, mi kuŝados, se mi volas ĉasadi, mi ĉasados, sed mi ne estos en ies vojo!

— Do se vi preferas tion, ke vi forlasos min, do forportu vin! — respondis al li lia pli maljuna frato, kaj li forpelis sian pli junan fraton el la domo. El la havaĵo de la patro li donis al li nek duonmoneron.

La pli juna frato kun sia malgranda juna edzino ekiris. Ekster la urbo ili trovis aĉan kabanon, tie ili eksidiĝis, enhejmiĝis. Sed ili havis jam eĉ fileton. Al tio nek vestaĵon por ŝanĝo, nek manĝaĵon ili havis. Kiel ili povis, mizere, per almozado sin subtenis.

Ĉu longtempe ili vivas jam tiel, ĉu de mallongtempe ili vivadas jam tiel ĉi, foje nur alvenis la nomtago de lia pli maljuna frato. Nun la viro diras al sia edzino:

— Hodiaŭ havas nomtagon mia pli maljuna frato. Mi iros al li kiel gasto.

— Kien vi irus?! Restu trankvile! respondas al li lia edzino. — Via frato vin forpelis de si, forpeladis de si. Eĉ duonan moneron li ne donis. Vi pensas, ke li nun vin atentos, ŝatos? Se li bezonus vin, li jam de longtempe vin estus invitinta!



— Li estas la pli aĝa, mi estas la pli malgranda. Mi devas iri al li unue! diras la viro. — Eĉ nur pro tio mi iros, ke mi eksci, kiel pripensas pri mi mia pli maljuna frato. Se li eĉ nun min ne akceptos, mi neniam vizitos lin!

Per tio li efektive sin vestis kaj foriris.

Ĉu li iris dum longa tempo, ĉu li iris dum mallonga tempo, li alvenis al la domo de lia pli maljuna frato. Li enpaŝis. Jen li vidas, la riĉuloj de la urbo, la eminentuloj ĉiuj tie manĝas, trinkas ĉe li. Tiam ankaŭ li iras pli internen, ekstaros ĉe la kameno, poste li nur tie staras, staradas, ne parolas kun iu ajn. Lia bofratino rimarkas lin unue. Tuj ŝi alvokas unu el siaj servistinoj, ŝi metas al ŝi en la manon pleton plenigitan kun glasoj por brando, kaj diras al ŝi:

— Iru, poste kiam vi atingos tiun, kiu staras ĉe la kameno, faru vi tiel, kvazaŭ vi ekstumblus pro lia piedo. Vi falu, por ke la glasoj rompiĝu!

Efektive la servistino iris, iris-reiris tien-reen, ŝi aliris al la staranta ĉe la kameno, kaj poste tre lerte ŝi falis pervizaĝe surteren antaŭ li. La brandoglasoj dispeciĝis en pecetojn tute. La tuta ĉambro estis superŝutita per glaspecetoj. Tiam la bofratino alkuris al sia edzo kaj kriadis al li:

— Jen, rigardu! Via pli juna frato, aŭ mi eĉ ne scias kiu estas al vi, tie ĉe la kameno jen dispeciĝis per tiu kompatinda knabino tiujn belajn brandoglasojn! Elĵetu lin de tie tuj!

La pli maljuna frato nun ekkaptis sian pli junan fraton, per la haroj lin

trentiris tra la ĉambro, poste malsupren puŝis lin sur la ŝtuparo, kaj per la pinto de boto li ĝis tiam piedfrapadis lin, ĝis kiam li en la korto, sur la neĝo sterniĝis. Tiam poste forlasis lin, ekstere en la malvarmo. Kiam li foriris, lia pli juna frato provis ekstari, sed li ne kapablis eĉ surgenuiĝi.

Ĉu li dum longa tempo tie kuŝis, ĉu dum mallonga tempo kuŝis, foje nur komencis suferi de malvarmo. Kiam li iomete rekonsciiĝis pro la malvarmo, sin apogante sur siaj manoj, komencis sin pene trenadi. La pordego estis malfermita, do li ekiris sin trenante hejmen. Kiam li tiel sin trenadas, subite li aŭdas ian bruon: jen do sur la strato bela, korbata, sirjora glitveturilo kun sonoriletoj aperas. La pli malgranda filo de la komercista homo rapide sin fortrenas al la rando de la vojo, por ke la glitveturilo povu foriri apud li. Sed la glitveturilo ne tiel faras, sed kiam lin atingas, tuj ĝi ekhaltas. Kaj unu el la sursidantoj alvokas lin:

— Kompatindulo, kio fariĝis kun vi?

— Eĉ tion mi ne scias, kiuj vi estas, ĉu potenculoj, ĉu simplaj homoj. Mi neniam vidis vin. Sed se vi jam demandis min, mi diras al vi: mi etis kiel gasto ĉe mia pli maljuna frato, kaj lian donacon, jen, mi portas hejmen sur mia dorso.

— Ankaŭ ni vidis, ke vin batis via pli maljuna frato. Nun ni ne havas pli da tempo, venu, kuru post ni, poste en kiun domon ni eniros, ankaŭ vi eniru!

— Kiel mi povus eniri! — respondis li al ili. — Ja se mi estus forta, sed mi

ne kapblas eĉ stariĝi!

Nur venu post ni! — respondis ili al li de sur la glitveturilo, poste ili forrapidis.

Kiam tiuj kun la glitveturilo foriris, la pli malgranda filo de la komercista homo ankoraŭ unufoje ekprovas, do en tiu momento li povis stariĝi. Li palpadas sin, mirrigardas, eĉ peceto de sia korpo ne doloras! Tuj li postkuras la glitveturilon. Do li vidas, ke la glitveturilo en la mezo de la urbo eniras en grandan, en la plej grandan domon. Ankaŭ li enkuras tra la pordego, sed konsterniĝas: en la korto estas neniu, nek en la domo estas iu. Nur sur la benko kuŝas grandeta knabo.

— Pli malgranda filo de riĉa komercista homo, por kio vi venis ĉi tien?

— Ĝus kiam mi venis el la domo de mia pli maljuna frato, du viroj sur glitveturilo atingis min. Tiuj diris al mi: en kiun domon ni eniros, ankaŭ vi tien eniru! Sed ke por kio ili vokis min, tion mi kiel povus scii?

— Kiel vi povus scii? Mi diras tion al vi: ĉar vin batis via pli maljuna frato, pro tio ili vin vokis. Nu do nur tial ili vokis vin. Kaj nun simple vi refortiĝu, kaj iru hejmen!

La kompatinda malgranda homo post tio reiris, eliris el la domo. Sur la strato li komencas pripensi en si:

— Ĝus mi opiniis, ke ili pro tio min vokis, ke ili donacu ion al mi. Nun mi

alion ne havas, nur mian mizeran vivon.

Li iras pluen. Foje li jen sentas, peziĝis la malsupro de lia ĉemizo. Tien li metis siajn manojn, palpadas, sentas ion globforman. Apenaŭ li jam povas ĝin porti, tute li laciĝas, ĝis kiam li atingas sian hejmon. Hejme la virino diras al li:

— Mi vidas, ke via pli maljuna frato tiel vin pridonacis, ke vi apenaŭ povas iri pro ĝi!

— Do kiel mia maljuna frato min pridonacis, kun ĝi efektive malfacile mi povus estinta baraktadi hejmen! Se ne estus venintaj tiudirekte sur glitveturilo du bonaj homoj, de tiu tempo jam eble la hundoj sur la strato eĉ mian viandon estus deŝirintaj de mi! — respondas la homo al la virino, poste li komencas senvestiĝi. Li demetas la zonon, kiam el sub la ĉemizo io elfalas. Lia edzino levas ĝin, rigardadas ĝin, poste diras:

— Ĉu vi aŭdas, de kie vi ŝtelis tiun ĉi sufiĉe grandan monsaketon? Ne estas sufiĉe por vi nia nuna mizera situacio, vi volas nin puŝi eĉ en pli grandan danĝeron? Ĉu vi riskas niajn kapojn?

— Mi ŝtelis ĝin nenie! — diras al si la edzo. — Kiam mi venis hejmen, subite fariĝis peza la subaĵo de mia ĉemizo. Ĉu ĝi falis el la ĉielo tien, aŭ ĝi eliĝis el la tero, tion mi ne scias. Nur tion mi scias, ke apenaŭ mi povis veni kun ĝi hejmen!

Tiam prenas la virino la monsaketon, ŝi elverŝas ĝin sur la tablotukon, do la

grandamasa mono apenaŭ trovas lokon sur ĝi. Ili komencas kalkuladi ĝin. Do estis sume kvincent oraj rubloj!

Ĉu dum longa tempo ili vivis, ĉu dum mallonga tempo ili vivis, foje la homo ekdecidis, kaj iris malsupren al la bordo de la rivero, al la haveno de la urbo. Ĝuste tiam albordiĝis ŝipo. Ŝipo de ia komercista homo. La komercisto eliris el la ŝipo kaj alparolis lin:

— Vi malriĉa homo, nia dungita kuiristo dumvoje mortis. Li tre mankas al mi. Ĉu vi ne povus rekomendi iun taŭgan homon anstataŭi li?

— Kiel mi povus tion scii, kiu estas taŭga en la urbo al vi ... — volas diri tiam la homo, sed en tiu momento post sia dorso eksonas io:

— Ĉu vi eble estus maltaŭga?! Entreprenu nur vi por unu vojaĝo!

Hej, ektimiĝis la homo, kaj tiel respondis al la komercisto:

— Se vi serĉas homon, ĉi tie estas mi. Mi dungiĝos al vi por unu vojaĝo!

— Ĉu vi dungiĝus? — demandas la komercisto. — Kion vi postulas pro tio?

— Tiom, kiom vi donas al mi, — respondas al li la homo.

— Por unu vojaĝo interurba kvincent orajn rublojn mi pagos. Morgaŭ ĉirkaŭ tagmezo mi ekvojaĝos, ĉu vi venas?

— Mi iras, — respondas la homo, poste li ekiris hejmen. Hejme ili komencis interkonsiligi kun la edzino. La virino konsentis:

— Se vi bontrovas, iru!

Poste ankoraŭ unu nokton ili kune dormis, dum mateniĝo ellitiĝis, manĝis-trinkis. Ĉirkaŭ tagmezo la homo sin vestis, iris al la haveno. Ankaŭ la komercisto ĝuste tiam alvenis.

— Nu, vi malriĉulo, vi alvenis?

— Mi dungiĝis, do mi venis, do kial ne! — respondas la homo al la komercisto.

— Vi plenumis vian vorton, vi estas honesta homo, — laŭdis la komercisto la malriĉan homon. Poste ili eniris la ŝipon, kaj jam ekvojaĝis.

Ĉu dum longa tempo ili vojaĝis, ĉu dum mallonga tempo ili vojaĝis, subite nur ĉe la marbordo ili eniĝis en potenca ventegon. Tiom granda estis la ventego, ke jam preskaŭ ĉiuj eroj de la ŝipo krakadis-knaradis.

— Subigu la ankron! — ordonas en sia teruriĝo la komercisto, sed ekparolas al tio la malriĉa homo:

— Se vi nun, subigas la ankrojn, tuj disrompiĝas la ŝipo. Ne malproksime estas de tie ĉi malgranda terlango. Ĉu vive, ĉu malvive, ni devas ĝin atingi, la golfo defendos nin!

Plaĉis al la komercisto la saĝaj vortoj de la malriĉa homo, kaj efektive laŭ lia konsilo ili albordiĝis malantaŭ la terlango. La ŝipo eĉ ne movetiĝis. Nun diras la komercisto:

— Malriĉa homo, vi estas tre saĝa! Vi savis mian vivon, miajn homojn, mian havaĵon. Ne estu jam plu simpla servisto, mi faros vin ŝipmastro! Vi estos la ordonanto de miaj homoj. Kiel vi ordonas, tiel ili agu!

Kaj tio fariĝis tiel. La homo fariĝis mastro, li transprenis la kondukadon de la ŝipo. Intertempe la vento ankoraŭ ne trankviliĝis. Kiam ili tiel restadas kvarantene kun la ŝipo, la homo, al kiu sekvis la vico de la nokta viglado, iris al la malriĉa homo:

— Aŭdu, vigladu anstataŭ mi ĉi nokte! Mi estas servisto, eble matene mi devos labori. Vi fariĝis mastro, ankaŭ dumtage vi povas dormi. Kiu vin vekus?

— Nu, bone, — respondis al li la homo. — Nur ekkuŝu! Unu nokton mi viglados.

Poste la ŝipanaro iris por dormi, kaj li komencis vigladi. Ĉirkaŭ noktomezo jen vidas la homo: sur la bordo de la maro, sur la pinto de iu rokmonto, subite fajra lumo ekflamas, poste komencas ruliĝi malsupren. Poste ankaŭ malsupre nur brulas plu.

Tiam malligas la homo la boaton de la flanko de la ŝipo, li eliras, por ke li rigardu, kio okazis. Li elremis al la bordo, sur la sablo li fiksas la boaton, poste li aliris al la lumilo. Jen li vidas, ke ĝi ne estas fajro, sed pugnogranda brilanta juvelŝtono! Tio lumas tie. Li levas ĝin alten: malluma estis la nokto, tamen li lumigis per ĝi ĉion! Poste li ekiris returnen al la ŝipo. Dumvoje li trovis kotan

faskon da mato, prenis la juvelŝtonon, envolvis ĝin, poste li kaŝis ĝin en la antaŭa parto de la ŝipo. Baldaŭ la ĉielo heliĝis, la ŝipanaro vekigis, kaj li ekkuŝis.

Forpasis ankaŭ tiu ĉi tago, sed la vento ankoraŭ ne trankviliĝis. Vespere alia homo, al kiu sekvis la vico de la tiutaga nokta viglado, jen nur iras al li:

— Mastro, vigladu anstataŭ mi hodiaŭ nokte! Morgaŭ eble jam trankviliĝos la veturo. Se mi ne dormos, kiel mi povos labori?

La homo interkonsentis ankaŭ kun li, kaj kiam la ŝipanaro iris dormi, li staris sur la antaŭan parton de la ŝipo por vigladi. Ĉu longtempe li vigladis, ĉu mallongtempe li vigladis, baldaŭ fariĝis noktomezo. Tute sur la supro de la rokomonto denove nur aperis la brilo. Poste ĝi ekiris, malsurenigis sur la sablon de la enfluejo. Tie ĝi brulis plu. La homo tiam denove malligis la boaton, eliris sur la bordon. Apenaŭ ke li aliris al ĝia proksimo, do jen li vidas, ke ankaŭ nun li trovis samtian gratidan juvelŝtonon, kiel hieraŭ. Li jam nek tiun ĉi lasis tie, kunportis ĝin, poste ankaŭ tiun ĉi kaŝis en la antaŭa parto de la ŝipo apud la alia. Dum iom da tempo ankoraŭ li vigladis, poste fariĝis mateno, li kuŝiĝis. Li tradormis la tutan tagon.

Fariĝis vespero, kiam li ellitiĝis. La vento ankoraŭ ĉiam blovis. Do kiam la malriĉa homo tiel rigardas la veteron, alvenas al li la tiutage vicon sekvanta gardanto, kaj diras al li:



— Aŭdu mastro, mi estas homo malfacile laboranta. Vigladu anstataŭ mi ĉi nokte! Se la vento trankviliĝas, morgaŭ sendorme kiel mi kapablos fari la laboron?

— Bone, — konsentas la malriĉa homo, poste li mem iras denove gardi.

Ĉu longtempe li gardis, ĉu mallongtempo li gardadis, fariĝis meznokta tempo. Kaj sur la pinto de la rokomonto denove aperis la stranga lumo. Ĝi ekbrilis foje, poste laŭ la montflanko malsupren kuris en la golfon, tie brulis ĝi plu. La homo tiam denove surakvigas sian boaton, li elremigas kun ĝi al la bordo. Poste li aliras tiun lumadon. Kiam li aliras pli proksimen, jen li vidas, ankaŭ tiu ne estas alia, denove granda juvelŝtono. Sed ĝi estis tiom granda, ke li apenaŭ povis ĝin levi! Kun granda peno tamen li portas ĝin sur la ŝipon, poste kaŝas ĝin ĉe la aliaj. Kiam tagiĝis, li vekis la homojn. Intertempe li jen vidas: la vento trankviliĝis. Ili suprentiris la ankron, kaj ekveturis.

Ĉu longtempe ili veturis, ĉu mallongtempe ili veturis, baldaŭ nur ili atingis tiun urbon, kien ili volis iri. Ili albordiĝis. La komercisto decidis, ke li vizitos la princon de la urbo. Do tiel li alparolas la homon:

— Aŭdu, mi iros, vizitos la princon, Ankaŭ vi povus veni kun mi!

— Kion tie serĉus malriĉa homo, —li respondas. — Mi ne estas konvena al li, kaj eĉ kion mi povus donaci al li? Estos bone al mi ĝis tiam ankaŭ ĉi tie sur la benko de la ŝipo! — respondas la malriĉa homo al la komercisto. Tiam la

komercisto decidis, kaj sole iris al la princo. La princo volonte lin akceptis, ili altabliĝis, komencis interparoli. Nun diras la komercisto al la princo:

— Dumvoje mortis mia kuiristo. En iu urbo mi dungis malriĉan homon anstataŭ li. Kiam ni pluveturis, nin atingis ventego sur la maro. Nur lia saĝo savis nin de la certa katastrofo.

— Se vi jam havas tian saĝan homon, kial vi ne kunvenigis lin — demandas la princo. — Se li estas eĉ malriĉa, voku lin ĉi tien, por ke mi povu kun li interparoli!

Tiam la princo sendis serviston por la malriĉa homo. Sed vane li sendis lin, la malriĉa homo ne iris kun li. Ĉiam nur tion ripetadis:

— Mi estas malriĉa homo, kion mi serĉus inter ili. Restu nur ili inter si! Tiam la princo ankaŭ duafoje sendis por la malriĉa homo, sed li ankaŭ nun ne iris. Kiam foriras la servisto de la princo, la malriĉa homo de ie supre aŭdas voĉon:

— Pli malgranda filo de riĉa komercisto, vin oni vokas al la princo kiel gaston. Kial vi ne iras? Nun via ventro estas plena, sed pli malfrue kio fariĝus?! Se vi estas saĝa, vi iros al la princo!

— La princo bezonas ankaŭ donacon, kion mi donacu al li?

— Antaŭ ne longtempe, en via loko Tarem-dio donis al vi ion. El ili du pecojn kunportu al la princo. Unu el ili donu al li, la alian al lia edzino. Ĉu oni

deziras eĉ pli?!

Ankaŭ triafoje venis la servisto:

— Aŭdu, la princo mem vokas vin, kiel gaston. Venu!

Tiam la homo jam ne malfruiĝis. Li ekstaris, iris en la antaŭan parton de la ŝipo. Li prenis la du pli malgrandajn pecojn el la juvelŝtonoj, metis ilin en la ĉemizbruston, poste ekiris kun ili al la princo. Kiam li eniris la domon, antaŭ la princo li sin ĵetis surteren. Poste unu el la juvelŝtonoj li transdonis al la princo, kaj la duan sur arĝenta pleto al lia edzino. La princo nur rigardas, poste ekparolas:

— Malriĉa homo, de kie vi prenis ĉi tiujn? Mi estas princo, mi posedas senfinajn terojn, sed tiaĵojn mi eĉ ne vidis!

— Tarem-dio donis tiujn ĉi al mi, princo, — respondis la malriĉa homo, kaj poste ankaŭ li sidiĝis al la tablo. Ili manĝis-trinkis, bankedis. Kiam la komercisto jam volis reiri al la ŝipo, diras la princo:

— Komercista homo, iru nur sola!

Mi ne lasas vian serviston, li restos ĉi tie. De nun la urbon, la dian urbon, la princan urbon li regos anstataŭ mi.

Do efektive tio okazis tiel. La princo la malriĉan homon vestigis en riĉan, dignoplenan vestaĵon, sur lian kapon metis princan ĉapon, kaj sidigis lin ĉe li mem al la tablo.

Ĉu dum longa tempo, ĉu dum mallonga tempo jam regis la malriĉa homo, foje la princo rimarkas: la malriĉa homo estas en malbonhumoro, li silentadas, ĉiam nur malĝojas. La princo rigardas lin dum iom da tempo, poste li aliras lin, kaj diras al li:

— Aŭdu, kiam vi alvenis al mi, vi estis vigla, gaja homo. Kaj nun eĉ vian voĉon oni apenaŭ povas aŭdi. Kien malaperis via bonhumoro? Kial vi estas nun malĝoja?

— En la urbo, kie mi vivis ĝis nun, tie vivas ankaŭ nun mia edzino, mia filo, do ĉe ili restis mia bonhumoro. Tial mi fariĝis malĝoja!

— Do kial vi ne diris ĝis nun, ke vi havas familion, edzinon?! Mi jam longtempe ilin estus transportiginta ĉi tien. Nun restu ĉi tie ankoraŭ tri tagojn, poste mi ekipos vin, sidigos vin sur ŝipon, vi iros kaj kunportos ĉi tien vian familion!

La malriĉa homo konsentis tion. Kiam pasis la tri tagoj, la princo aranĝis grandan festenon. Li diras al la homo:

— Nu, kiel vi pensas? Ĉu vi iras por via familio?

— Se vi forpermesas min, kial mi ne irus, sed se vi ne forpermesos min, tiam kiel mi povus iri?

Tiam en la transa parto de la ĉambro tra la pordo enpaŝas bela, plenkreska knabo, li alvenis antaŭ ilin. Nun demandas la princo la malriĉan homon:

— Aŭdu, ĉu vi konas ĉi tiun knabon?

— Kiel mi konus, nek en mia vivo lin vidis!

— Ĉu vi ne konas? Antaŭ ne longtempe vi parolis pri tio, ke vi havas filon. Vi ne ekkonas vian propran filon?

— Kiam mi venis, mia filo ankoraŭ estis malgranda. Kiel mi povus lin nun ekkoni? — respondis la malriĉa homo al la princo.

Apenaŭ ke tion elparolis la malriĉa homo, denove malfermiĝas la pordo, kaj nun en la ĉambron paŝis virino, Denove demandas la princo:

— Ĉu vi konas ĉi tiun virinon?

— Ĉu mi ne konus mian propran edzinon?! — respondas la homo.

— Do vi, virino, ĉu vi konas ĉi tiun viron? — demandas la princo la virinon.

— Ĉu mi ne konus mian propran edzon?! — respondas ia virino. La princo tiam sidigas ilin unu apud la alian: ili manĝu-trinku, vivu jam de nun kune.

Ĉu dum longa tempo ili vivis, ĉu dum mallonga tempo ili vivis, foje nur la malriĉa homo iris al la princo:

— En la urbo, kie mi edukiĝis, mi havas pli maljunan fraton. Mi devus jam lin viziti. Kion vi konsilas, ĉu mi iru al li, aŭ ne?

— Vi estas reganto! La urbo apartenas al vi, la dia, la princa urbo, kial vi petas de mi konsilon? Se vi havas pli maljunan fraton, iru! Kial mi retenus

vin?! Mi donas al vi ŝipon, kun manĝaĵo, kun homo, poste ekveturu! Vizitu vian pli maljunan fraton!

Efektive okazis tiel. Ili ekipis ŝipon kaj ekveturis. Ĉu dum longa tempo ili veturis, ĉu dum mallonga tempo ili veturis, ili atingis la naskiĝurbon de la malriĉa homo. Ili albordiĝis, poste la malriĉa homo kun du servistoj iris en la domon de sia pli maljuna frato. Lia pli maljuna frato tuj metigis tablon, oni donis en la manon al ĉiuj tri brandoglasojn. La du servistoj de la malriĉa homo eĉ tuj eltrinkus ĝin, sed li ne permesas. Nur li interparolas, promenetas kun la glaso en la mano. Ĉe la flanko de la kameno subite li rimarkas katon.

Tiam li diras al sia pli maljuna frato:

— Tie tiu kiaspeca bruteto estas?

— Kiaspeca bruteto?! — ekmirante rigardas lia pli maljuna frato. — Do tiu ... tiu havas la nomon: kato. Ĝi estas tiaspeca bruteto!

— Por kio vi havas ĝin? — demandas denove lia pli juna frato.

— En la kamero, se estas pano, alvenas tien la muso, ĝi mangas ĝin. Se oni havas katon, la kato iras tien, manĝas la muson; kaj tiel restas la pano!

— Ej, tiel ĝi povas esti saĝa, bona bruteto! Vendu ĝin al mi! Kiom estas ĝia prezo?

— Ĝi eĉ prezon ne havas. Donu al mi tricent orajn rublojn, kaj ĝi povos esti via!

— Do ... en nia regiono tia ankoraŭ ne estis, mi donos al vi pro ĝi la tricent rublojn!

Kiam ili tiel parolas, el sub la kameno elŝoviĝas ankaŭ unu malgranda hundo.

— Kaj tiu ĉi denove kiaspeca besto estas ĉe vi? — demandas la pli maljunan fraton la pli malgranda filo de la komercista homo.

— Do tiu ĉi ... kaj tiu ĉi havas la nomon: hundo.

— Ankaŭ tiu ĉi povas esti por io utila! Tiun ĉi por kio vi havas?

— Por tio, ke se eble iu venas por ŝteli nokte al la domo, tiam ĝi bruon faras, komencas bojadi. Tiam la ŝtelisto ektimiĝas, forkuras, li ne povas eniri en la domon.

— Ankaŭ tiu ĉi estas tre bona besteto! Ĉe ni ankaŭ tia ne ekzistas. Mi aĉetas ĝin! Kioman prezon ĝi havas?

— Kvincent oraj rubloj.

— Tiom ne estas multa por ĝi, mi donos tiom al vi!

Poste la pli malgranda frato disrompis en du partojn unu paneton, ambaŭ partojn li plenigis el la glaso kun brando, poste diris:

— Miaj bestetoj jam treege deziras iom manĝi. mi donas al ili ĉi tiun, por ke ili mangu!

Per tio la du pecojn da paneto metis antaŭ la bestojn. La bestoj ĝin manĝis.

Tuj eĉ ili mortaĉis pro ĝi. Tiam la malriĉa homo forlasis sian pli maljunan fraton, kun siaj homoj li iris rekte al la estro de la urbo.

Tie li rakontas al li:

— Iam mi edukiĝis en tiu ĉi urbo. Post la morto de mia patro mia pli maljuna frato forpelis min, kvankam el la havaĵo, unu duonmonero ne estas multa, eĉ tiom li ne donis al mi. Mi transloĝiĝis en alian urbon, kaj nun mi venis por viziti mian pli maljunan fraton. Tiam li per sorĉa trinkaĵo volis min veneni.

La estro de la urbo tiam ordonas venigi antaŭ sin la pli maljunan fraton de la pli malgranda filo de la komercista homo.

— Vin via pli juna frato estimas en la loko de sia patro. En lia tuta vivo vi puŝis lin en mizeron, kaj nun, kiam li venis al vi kiel gasto, vi volis lin eĉ mortigi. Kial vi faris tion?! — diras la estro de la urbo al la pli maljuna frato, kaj poste li ordonas, ke oni konduku lin en malliberejon, la trian tagon per sepdek torturoj suferigu lin, poste konduku lin al la senkapiga, gilotina loko, oni fortranĉu lian kapon. Kaj lian havaĵon oni donu al lia pli juna frato. Kaj ĉio efektive eĉ okazis tiel.

La malriĉa homo poste reiris en sian urbon, en la dian urbon, en la princan urbon, kaj li tie vivas eĉ ĝis la hodiaŭa tago!



## La mirinda reto

(El la regiono de la rivero Sosva)

Iam antaŭlonge la Nepo de Virino kune vivadis kun sia pli maljuna virinfratino. Ĉu dum longa tempo ili vivadis, ĉu dum mallonga tempo ili vivadis, foje nur konsumiĝis ilia tuta manĝaĵo. Tiam diras la Nepo de Virino al sia pli maljuna fratino:

— Faru fajron! Kaj mi foriros ĝis tiam, kaj mi starigos la kaptilon por bestoj.

Li do iris tuj. Li starigis la kaptilon, poste li komencis atendadi. Li atendis, atendis. Intertempe seninterrompe observadis. ĉu jam kaptis ion lia kaptilo. Kiam li tiel observadas, subite falas la supra ligno de la kaptilo. La Nepo de Virino tiam elkuras rapide, do jen li vidas: tetro falis en lian kaptilon! Tuj do li elprenis ĝin kaj portis en la domon, metis ĝin en la fajron. Kiam la tetro jam estis tia, kia la ardaĵo, ĝi turniĝis, subite elsaltis el la fajro, poste ek, kaj forkuris. Kaj la Nepo de Virino ekpostkuris ĝin, komencis peli la tetron.

Ĉu longtempe li peladis ĝin, ĉu mallongtempe li peladis ĝin, subite la tetro kaŝis sin en terfendaĵon. Atingis ĝin la Nepo de Virino, ankaŭ li enŝovis sin post ĝi. Do jen vidas la Nepo de Virino: en la terfendaĵo maljuna homo sidadas,

kaj subite li ekstaras, prenas en sian manon la ĉerpan reton, sur la teron verŝas akvon, kaj la reton li komencas en ĝi tien-reen tiradi. Dume li diradas:

— Sturgoj miaj, belaj blankaj salmoj miaj, venu sur la supron de la akvo!

Ili tuj suprenvenis efektive. Tiam la maljunulo ĵetfaligis sur ilin la reton, ĉerpis ilin en poton, poste la tuton metis por kuiri. Kiam li estis preta, li gastigis kun ĝi la Nepon de Virino.

Post la manĝo ekstaris la maljunulo, la ĉerpan reton donis en la manon de la Nepo de —Virino kaj diris al li:

— Kion vi atendas ankoraŭ? Kion mi volis doni al vi, tion vi ricevis. Iru kun ĝi hejmen!

Nun ekstaris ankaŭ la Nepo de Virino. Li prenis la ĉerpan reton, kaj portis ĝin hejmen. Apenaŭ ke li hejmen venis, li verŝis akvon sur la plankon, la reton li tiradis en ĝi, kaj dume diradis:

— Sturgoj miaj, belaj blankaj salmoj miaj, venu sur la supron de la akvo! —kiam la supro de la akvo efektive tuj pleniĝis kun fiŝoj. La Nepo de Virino nun ĵetis la reton por tiuj, poste plenĉerpis el ili unu poton, kaj metis ĝin por kuiri. Kiam la manĝaĵo estis preta, la Nepo de Virino kaj lia pli maljuna fratino sidiĝis por manĝi-trinki.

Post la manĝo la Nepo de Virino eliris antaŭ la domon. Lia hundo tiam saltis en lian kolon. Kaj li ekpiedbatis ĝin, tiel ke la hundo tirbojante flugis

flanken el lia vojo. La grandan tirbojadon ekaŭdis ankaŭ la Urba Princ-Maljunulo.

— Ej, kiel bone statas la aferoj de mia frato! — li pensis en si. — Mi iras, mi vizitos jam ilin!

Kun tio li do ekiris. Kiam la Urba Princ-Maljunulo enpaŝis al ili, la Nepo de Virino prenis sian reton. Li verŝis akvon sur la plankon. Li vokis la fiŝojn, kuiris ilin, poste la Urban Princ-Maljunulon ili gastigis per ĝi laŭorde kiel decas.

Ili jam manĝis la manĝaĵon, ankaŭ trinkis jam, sed la Urba Princ-Maljunulo ankoraŭ ankaŭ nun nur restis sidanta.

— Kion vi atendas ankoraŭ? — demandas lin la Nepo de Virino. — Ekstaru kaj iru!

Al tio diras la Urba Princ-Maljunulo:

— Donu jam al mi vian ĉerpan reton!

— Tie ĝi estas, nur portu ĝin! —respondas la Nepo de Virino.

Tiam la Urba Princ-Maljunulo prenis la reton, kaj portis ĝin hejmen.

Ĉu longtempe ili vivis, ĉu mallongtempe ili vivis, denove nur konsumiĝis la manĝaĵo de la Nepo de Virino kaj tiu de lia pli maljuna fratino. La Nepo de Virino nur paciencis dum iom da tempo, kaj jen tion diris al sia pli maljuna fratino:

— Virino-fratino mia, faru do fajron! Mi denove iros, starigos la kaptilon por bestoj.

Kaj vere li eliris, starigis la kaptilon. Poste li reiris en la domon, kaj de tie li atendis, kiam li povos iri por la besto. Kiam li tiel atendas, subite brue falis la ligno de la kaptilo. La Nepo de Virino jen vidas: rulantane fadenbulon kaptis la kaptilo! Tuj li elprenis ĝin el la kaptilo, poste enportis ĝin en la domon, kaj ĵetis ĝin ĝuste en la mez-mezon de la fajro.

Kiam la fadenbulo jam tute traardiĝis, subite ĝi ekmoviĝis, elsaltis el la fajro, poste ek, komencis ruliĝi eksteren. Buliĝis, ruliĝis la fadenbulo, sed ankaŭ la Nepo de Virino ne estis malvigla, ekiris post ĝi. Ĉu dum longa tempo ruliĝis la bulo, ĉu dum mallonga tempo ĝi ruliĝis, ankaŭ ĝi enŝoviĝis en la terfendaĵon. La Nepo de Virino ankaŭ ĉi tien sekvis ĝin, kaj subite denove li renkontis kun la maljunulo, kiu donis al li la reton. La maljunulo kolere lin akceptis, tamen li denove nur prenis reton, sur la plankon verŝis akvon, kaj komencis en ĝi fiŝkapti. Kiam li tiradis la reton tien-reen, konstante nur diris:

— Pintonazaj marenoj miaj, belegaj malgrandaj muksunoj miaj, venu sur la supron rapide!

Efektive la supro de la akvo pleniĝis kun fiŝoj. Kaj li ĵetis la reton tien, ĉiujn li ĉerpis en unu poton kaj metis ĝin sur la fajrujon por kuiri. Kiam ĝi estis preta, ili manĝis-trinkis. Tiam la maljunulo ankaŭ tiun ĉi reton donis al la Nepo

de Virino kaj forsendis lin, li iru al lia laboro.

La Nepo de Virino iris hejmen. Poste hejme li prenis sian reton, sur la teron plenverŝis akvon, kaj komencis fiŝkapti. Ankaŭ li komencis diradi:

— Pintonazaj marenoj miaj, belegaj malgrandaj muksunoj miaj, venu sur la supron rapide! — kiam la supro de la tuta akvo tuj pleniĝis per fiŝoj. Tiam li elĉerpis ilin, metis en poton. Li kuiris ĝin, poste kune kun sia pli maljuna fratino manĝis ĝin.

Post la manĝo la Nepo de Virino ekmovis sin, eliris el la domo. Apenaŭ ke li eliris, en lian kolon saltis lia hundo. La Nepo de Virino fariĝis kolera, kaj la hundon tiel forĵetis de si, ke tiu kompatinda sufiĉe longe flugis en la aero plorbojante. Ekaŭdis tion la Urba Princ-Maljunulo, kaj pensis en si:

— La hundo de tiuj ĉi denove tre laŭtkrias. Mi iros do por rigardi, kio povis okazi kun ili!

Kaj kun tio ekiris, kaj baldaŭ alvenis al la Nepo de Virino. Kaj li jen ek, prenis la reton, akvon verŝis sur la teron, kaj komencis en ĝi fiŝkapti. Tiel li faris, kiel li vidis ĉe la maljunulo. Li kolektis la fiŝojn, poste kuiris ilin, tiam kun la Urba Princ-Maljunulo ili denove altablĝis, kaj manĝis la tuton. Eĉ trinkis sur ĝin. Dum iom da tempo ili ankoraŭ sidadis, poste ekparolis la Nepo de Virino:

— Iru jam! Kion vi atendas ankoraŭ? li diris al la Urba Princ-Maljunulo.

Kaj li denove nur respondas al li:

— Donu al mi tiun ĉi reton!

La Nepo de Virino kion alian estus povinta fari, li donis ĝin al li.

Ĉu longtempe ili vivis, ĉu mallongtempe ili vivis, la Nepo de Virino kaj lia pli maljuna fratino havis nenion por manĝi denove.

— Virino-fratino mia, ekbruligu la fajron! — ordonis la Nepo de Virino. — Mi starigos jam kaptilon, se eble ĝi kaptos ion!

Tiam li do eliris, starigis la kaptilon, kaj efektive li kaptis per ĝi — unu krudan, por peltu taŭgan felon! La Nepo de Virino ankaŭ tiun ĵetis en la fajron. Kiam jam la felo tute traardiĝis, jen ek, ĝi elsaltis el la fajro, kaj komencis flirti, flugi eksteren. Ĝi flirtis, flirtis, poste ankaŭ ĝi enŝoviĝis en la terfendon. Kaj la Nepo de Virino post ĝin. La maljunulo denove komencis koleri, poste tamen prenis unu reton, sur la plankon verŝis akvon, kaj komencis fiŝkapti. Li fiŝkaptis, fiŝkaptis, dume tiun ĉi diradis:

— Malgrandaj ezokoj miaj, orfaj bramoj miaj, venu ĉi tien sur la supron de mia akvo!

Kaj vere la supro de la akvo baldaŭ pleniĝis per fiŝoj. La maljunulo kuiris ilin, kaj kune kun la Nepo de Virino ili manĝis la tuton. Fine la maljunulo ankaŭ tiun ĉi reton donis al la Nepo de Virino, sed firme ordonis al li: tiun ĉi reton poste li ne donacu al iu ajn!

La Nepo de Virino apenaŭ ke hejmen venis, kiel, kiel ne, ankaŭ tiu ĉi reto aliris al la Urba Princ-Maljunulo. Kaj la Nepo de Virino kaj lia pli maljuna fratino denove malsatis. Kion alian ili povus fari, la Nepo de Virino ankaŭ kvaran fojon. starigis la kaptilon. Sed tute ne trafis io alia en la kaptilon, ol nur unu orfa dorno! Kaj la Nepo de Virino prenis ĝin, kaj ĵetis en la fajron. La dorno en la fajro dum iom da tempo rostiĝis-turniĝadis, kaj poste subite nur elsaltis el ĝi. Kaj fine la Nepo de Virino ankaŭ kvaran fojon staris antaŭ la maljunulo en la terfendaĵo. La maljunulo, apenaŭ ke ekvidis lin, en kolero en tiu momento preskaŭ ke ne mortbatis lin:

— Mi donas al vi manĝi kaj trinki, kaj vi jam denove nur donis ĝin al la Urba Princ-Maljunulo! Do por tio mi donis ĝin al vi? —kriadis la maljunulo al la Nepo de Virino.

— Poste la tetro, la bulo, la peltofelo kaj la dorno antaŭen saltis, kaj kvazaŭ ia armeo, ekiris kontraŭ la Urba Princ-Maljunulo. Ili iris en lian urbon. Apenaŭ ke ili tien alvenis, la Urba Princ-Maljunulo komencis petegi:

— Ne mortigu min, pli volonte mi redonos ĉion! — kriadis li de longe al la armeo de la Nepo de Virino. Poste li efektive redonis ĉion al la Nepo de Virino. Kaj li hejmen iris kun ĝi, kaj de tiu tempo li vivadis en granda riĉo kaj abundo!

## La malgranda muso

(El la regiono de la rivero Sosva)

Vivadis iam malgranda muso. Iun someran posttagmezon ĝi elŝovis sin el sia kuŝejo, kaj sur la sunlumon kuŝis por varmigadi sian ventron. Kiam ĝi tiel kuŝadis, sin sunbanis, foje nur de la varmegaj sunradioj komencis bruli ĝia ventro. Ĝi ekkoleriĝis, tuj ekstaris kaj forkuris, por ke ĝi prirespondigu la Sunon.

— Vi, Suno, kial vi bruligis mian ventron? — kriadis ĝi supren al ĝi.

— Ĉar mi estas forta! Mi ĉiun estaĵon povas bruligi, — respondis al ĝi la Suno.

— Se vi estas tiom forta, la nuboj kial vin kovras?

— Tial, ĉar kvankam mi estas forta, la nuboj estas pli forta ol mi! — respondis la Suno. Kaj la malgranda muso kuris al la nuboj, kaj demandis ĝin:

— Nuboj, ĉu vi estas vere forta?

— Certe mi estas forta! Mi faras la pluvon!

— Do tiam la vento kial vin ŝiradas tien-reen?

— Tial, ĉar kvankam mi estas forta, sed la vento estas pli forta ol mi! — diris la vento al la malgranda muso, tiam ĝi senprokraste iris al la Norda



Ventovirino, kaj demandis ŝin:

— Ventovirino, ĉu vi vere estas forta?

— Vere mi estas forta! Mi eĉ la montojn forportas, — respondis la Norda Ventovirino. Kaj la muso tiel daŭrigis:

— Norda Vento, se vi estas vere forta, levu al mi la Ob-bordan Rokon!

— La Ob-borda Roko estas tre peza. Ĝi estas pli forta, ol mi! — respondis la Ventovirino al la malgranda muso. Kaj la malgranda muso kuris malsupren al la Ob-borda Roko, kaj ĝi demandis ankaŭ ĝin:

— Ob-borda Roko, ĉu vi estas vere forta?

— Mi, mi estas tre forta!

— Se vi estas tre-tre forta, kial la akvo kial vin forlavas?

— Ĉar la akvo estas pli forta, ol mi! respondis la Ob-borda Roko al la malgranda muso. Tiam la malgranda muso sin turnis al la akvo, kaj demandis ĝin:

— Akvo, ĉu vi estas vere forta?

— Eĉ kiom! Vere nur mi estas forta, respondis la akvo al la malgranda muso.

Kiam la malgranda muso tiel daŭrigis:

— Se vi estas vere forta, kial ke de la fajro vi fariĝas vapore?

— Ĉar la fajro estas eĉ pli forta, ol mi! — respondis la akvo. Tiam la

malgranda muso kuris ankaŭ al la fajro, kaj demandis ĝin:

— Fajro, ĉu vi estas vere forta?

— Ĉu forta? Mi estas la plej forta!

— respondis la fajro al la muso, poste ĝi ekĵetis sin alten, kaj trabruligis la plandeton de la malgranda muso.

Do jen efektive ĝi, la fajro, estas la plej forta!

## La pekuliĝinta samojedo

(El la regiono de Supra-Lozva)

Vivis iam du samojedaj fratoj. La pli maljuna jam estis edziĝinta, la pli juna ankoraŭ ne. Ĉu longtempe ili vivis, ĉu mallongtempe ili vivis, iun tagon jen ankaŭ la pli juna edziĝis. Ĝoje, ke li alprenis edzinon, el la urbo li alportis sitelon da brando, poste komencis trinki. Li eltrinkis la tuton, poste senprokraste, tie kie li staris, ekkuŝis kaj komencis ronki. Tiam lia pli maljuna frato kaj la bofratino diras al la edzino de la homo:

— Estas malbone al li tiel kuŝi, metu sub lian kapon unu malgrandan kusenon! Kaj la virino iris, alportis kusenon, por ke ŝi metu ĝin sub la kapon de sia edzo. Do kiam ŝi alvenas al li, ŝia edzo ekmoviĝas, etendas sian manon, batas per ĝi sian edzinon tiel, ke ŝi en tiu momento terenfalas morte.

Lia pli maljuna frato kaj la bofratino komencis ege lamenti, sed la homo eĉ tiam ne vekigis, nur kuŝas plu. Ĉu longtempe li kuŝis, ĉu mallongtempe li kuŝis, foje jen vekigis. Li jen vidas, ke ĉirkaŭ li ĉiu ploras. Li ne scias pripensi, kio trafis ilin. Li demandas:

— He, kial vi ploras?

Tiuj respondas:

— Vi mortigis vian edzinon!

Do tiam jam tuj resobriĝis la homo.

— Kiel mi estus ŝin mortiginta? — li demandas.

— Ni ordonis al via edzino, ke ŝi metu kusenon sub vian kapon, kiam vi levis vian brakon, kaj mortbatis ŝin.

Do tiel implikiĝis en malbonon la kompatinda samojeda homo. La famo atingis eĉ la kortegon de la princo, ke li mortigis sian edzinon. Kiam tion ankaŭ li eksciis, tiel diris:

— Do jam mi mem iros, por ke ne devu veni por mi alia homo!

Enpelis li sep rangiferbovojn, li tranĉis por ili dorsrimenon el felo de arbara urso, ventrorimenon tranĉis el felo de bovino, li jungis ilin, poste ekiris kun ili. Ili veturis sep tagojn, sep noktojn, nur poste ili ekhaltis, por ke ili forskuu de si la neĝon. Nun ĉirkaŭrigardas la homo, do li vidas antaŭ si samojedan krustotendon. Antaŭ la tendo hundo bojas. Iu homosimila elvenas, reiras:

— Kun sep blankaj rangiferbovoj homo alvenis. Iliaj bovoj estas jungitaj duone en ursofelo, duone en bovinfelo, diras li.

— Tiu ĉi estas certe la pekuliĝinta samojedo! — respondas al li iu.

La mastro de la tendo nun prenis en la manon grandan tranĉilon, kaj diris:

— Tiu ĉi mortigis nian pli maljunan fratinon, mi iras, ankaŭ mi mortigos lin!

Lia edzino kaj la pli juna fratino lin petis, ke li ne iru, tamen li nur prenis la tranĉilon kaj eliris, por ke li mortigu la alveninton. Kaj tiu nenion konjektis, nur skuis de si la neĝon. La homo jam preskaŭ mortpikis lin, kiam li rimarkis tion. Tiam li kontraŭsaltis, forpuŝis lin de si, poste frakasis liajn ripojn, tiel ke la mastro de la tendo eĉ mortis tuj. Ekĝemas nun la samojeda homo:

— Hej, denove kian grandan pekon mi faris! — poste ekiris pluen.

Li marŝis dum sep tagoj, sep noktoj, poste denove sepfoje tag-noktojn. Tiam li denove haltis, por ke la neĝon iomete forskuu de si. Li ĉirkaŭrigardas, do denove nur ekvidas samojedan krustotendon. Antaŭ la tendo la hundo komencas boji. Iu elvenas el la tendo, poste reiras. Li tion diras:

— Iu homo alvenis kun sep blankaj rangiferbovoj. Iliaj bovoj estas jungitaj duone en ursofelo, duone en bovinfelo.

— Tiam mia plej juna frato alvenis! — respondas unu al la viroj. Li preparis sin, eliris al li, ili ĉirkaŭbrakis unu la alian, kisis unu la alian. Poste ili kondukis la samojedon en la tendon, kaj sidigis lin sur la plej bonan lokon.

Ekparolas tiam la kulpofarinta samojedo:

— Kial vi donas al mi la plej bonan lokon, ja mi estas kulpa homo?

— Vere, ankaŭ ni aŭdis pri tio, ke vi trafis en malagrablan situacion, — ili respondas al li.

— En kiu direkto kutimis iradi la homoj de la princo? — demandas nun la

samojedo. — Mi mem venis, por ke ne devu veni por mi alia homo.

— Ili kutimas marŝi ĉi tie antaŭ ni, — respondas al li liaj parencoj. — Se ili iras supren, alparolas nin. Se ili iras malsupren, alrigardas nin. Vi nur iru malsupren ĉi tien, al la bordo de Ob, tie vi renkontos ilin.

Malsupren iris la homo al la bordo de Ob, poste sidiĝis. Ĉu longtempe li sidis, ĉu mallongtempe li sidis, foje jen sur la alia bordo aperis la homoj de la princo. Ili sidiĝis en boaton, alvenis al li.

Ili jam el la boato komencis demandi:

— Kiu vi estas? — ili demandas la samojedon.

— Mi estas unu pekuliĝinta, — respondis li al ili.

— Ŝnurligu lin forte, poste ĵetu lin sur la fundon de la boato! — ordonis unu el la homoj de la princo.

— Kial oni devus min ŝnurligi? — demandis la samojedo. — Ja ankaŭ mi mem iras!

La homoj de la princo tiam albordiĝis, eliris sur la bordon, poste kune kun la samojedo supreniris al la tendo. El la grego oni elektis la plej belan rangiferon, buĉis ĝin, faris bankedon, ĉiuj satiĝis. La kulpa samojeda homo nun la kondukilojn metis en ilian lokon, prenis la cervopelantan stangon, pikis ĝin en la teron, poste diris al sia pli maljuna frato:

— Estu vi prezentonta sangoferon ĉe tiu ĉi cervopelanta stango. Elmetu sur

ĝin sep rangiferkapojn! Se la stango kliniĝas, vi neniam plu atendu min hejmen! Miajn sep blankajn rangiferbovojn poste sendu hejmen al mia pli maljuna frato!

Ankoraŭ iomete ili pasigis tempon, poste iris malsupren al la bordo, sidiĝis en la boaton. La kulpa samojedo, kiam ili eniris la boaton, kuŝiĝis sur la fundon de la boato. Tuj li eĉ ekdormis. Kaj la homoj de la princo komencis remi. Ili remis, remadis, foje jen ekparolas unu el ili:

— Je la diablo, —por kio ni penportas tiun ĉi homon?! Ni ĵetu lin en la akvon!

— Kiel ni povus lin enĵeti? — diras la plej aĝa. — Ja la princo diris:

— Se li estus mortinta, tiam lian kadavron alportu.

— Ni diros al li, ke li interbatalis, poste falis en la akvon. De tie poste, kiel ni povus lin elprami, se li eĉ mortis?!

En tio poste ili konsentis. Tuj ili preparis sin, refaldis siajn vestojn, por ke ili ĵetu la dormanton en la akvon. Ili ekprenis liajn brokojn, sed eĉ ekmovi ilin ne povis. Ili ekprenis liajn piedojn, kaj jen tiuj eĉ ne ekvibras. Ekparolas nun la samojedo:

— Ej! knaboj, kian komedion vi faras tie ĉi? Vi eĉ ripozi ne lasas min!

— Vi kuŝis malbone, ni ĝustigis vian lokon, por ke vi povu pli bone dormi, respondis al li la remigantoj, la homoj de la princo.

— Eĉ se mi kuŝis malbone, tio estas por mi bone. Ja mi estas nur peka ekzilita homo! — respondis al ili la samojedo. Kaj la homoj plu remadis kun li. Ĉu ili longtempe remadis, ĉu ili mallongtempe remadis, ili denove komencis:

— Ni ĵetu lin en la akvon!

Poste ili denove ekkaptas iliajn piedojn, sed ne povas ilin ekmovi, ekkaptas liajn manojn, sed nek ilin povas ekmovi! Kaj la samojedo denove ekparolas:

— Hej! knaboj! oni nur ne povas ripozi de vi! Do se mi tiom ĝenas vin, metu min en feran barelon, poste ĵetu min en la akvon! Tiel almenaŭ mia ostokarno putriĝos en unu loko.

Ili do tiel faris, metis lin en feran barelon, poste ĵetis lin en la drivon de Ob. La barelo en la akvo komencis ĵetiĝadi.

Ĉu ĝi dum longa tempo ĵetiĝadis, ĉu ĝi dum mallonga tempo ĵetigadis, foje nur la samojedo jen aŭdas, la barelo alpuŝiĝis al la bordo. Tio venis en sian kapon:

— Se mi nun ekmovas miajn piedojn, se estas vere, kion mi pensas, — tiam la fera barelo disrompiĝos, kaj mi povos daŭrigi mian vojon plu.

Efektive li do tiel faris. Per la piedoj li disrompis la barelon, poste komencis remadi. Li atingis la bordon, kaj tre pene li suprengrimpis ĝin. Tie li trovis malgrandan paŝejon, li estis libera, li povis iri kien ajn nur al li plaĉis.

Do li ekiris. Foje li trovas sin antaŭ samojeda tendo. Hej, li ŝatus eniri, iom



ripozi, sidiĝi, ĉar ja li apenaŭ staris sur la piedoj. Fine nur li pensas en si:

— Ĉu tie ĉi mi mortos, ĉu tie mortigos min, estas egale.

Tiam la samojedo jen aŭdas, ke en la tendon iu eniras, iu virino, aŭ viro, poste parolas:

— Homo sidas antaŭ vi, apenaŭ ke li jam mortas.

Al tio diras la blankhara maljunulo, la mastro de la tendo:

— Tiu ĉi estas certe la homo de la princo, mi iras, enkondukos lin.

Tiam li do eliris, enkondukis la samojedon, el kiu komencis jam preskaŭ eliri la animo. En la tendo oni bele iom post iom donis al li manĝi, trinki, tiel ke la samojedo baldaŭ reviviĝis.

Tiam la homoj ĉiuj komencis ludi, kanti, danci. La lertaj-lertegaj turniĝoj atingis nun unu la alian! Poste ili decidis, ke ili iros por glitveturi. Tiam la blankhara homo al sia filo diras:

— Se tiu ĉi homo ion diras al vi, aŭskultu lin. Estimu lin, kiel vian sinjoron!

Poste ili enpetis la rangifergregon, kaptis la plej belajn maljunajn rangiferbovojn, alligis ilin antaŭ boaton. Ili ensidiĝis, ekiris. Ili iras, iras, la rangiferoj antaŭ la boato apenaŭ stumpletadas. Tiam diras la homo:

— Se ni tiel iros plu, nenien ni atingos! Ankaŭ mi havis rangiferojn, sed ni ne antaŭ boaton jungas ilin, sed antaŭ glitveturilon. Mi pretigos ankaŭ al vi glitveturilon.

— Se vi kapablas, tiel faru! — respondas al li la ceteraj. Kaj li komencis, por ke li pretigu al ili samojedan glitveturilon kun dek trabetoj. Kiam li tiel laboras, foje nur ekparolas unu homo el ili:

— Estos malfortaj tiuj ĉi trabpiedoj, rompiĝos la tuto! La alia diras:

— Ĝi tute ne rompiĝos!

Dum ili tiel interparoladas, la samojedo fariĝis preta per la glitveturilo. Li jungis antaŭ ĝin du rangiferojn, kaj la ceterajn li sendigis hejmen. La homoj larĝokule, buŝgapante kun miro ĝin rigardis. Ili apenaŭ volis kredi, ke tio estas realo, kion ili vidas. Konstante nur tion diradis:

— Kian veturilon li faris!

Poste ĉiuj ensidiĝis, kaj iris hejmen. Ili nur tiel tutrapide galopis. Ĝuste ili alvenas hejmen, la filo de la blankharulo jam ĉion rakontas al sia patro.

— Filetoj miaj, mi diris al vi, ke vi obeu lin, — respondas al la filo la patro, poste ili ekripozas.

La sekvantan tagon la maljunulo sendas ilin fiŝkapti:

— Filoj, iru, mergu la tirreton!

La homoj tuj kolektiĝas, iras al la bordo. Ili volas sidiĝi en sian boaton, sed ili vidas, ke la boato duone estas sur la seka tero. Ili eĉ ne konjektas, kiel ili metu ĝin sur la akvon. La nove veninta homo nur pipfumas sur la bordo. Li rigardas ilin, ridas ilin, poste iom atendente tamen ekparolas:

— Venu de tie! Mi metos ĝin sur la akvon sola!

— Ni estas nur simplaj homoj: kiel ni povus tion fari, kion kapablas fari nur unu diosimila homo? ! — respondas la homoj, kaj supren venas sur la bordon. Kaj li malsupren iras, alpaŝas la boaton, per unu mano ŝovas ĝin sur la akvon. La homoj mirrigardas;

— Tio ĉi jam estas grandioza! — ili diras.

Nun ili sidiĝas en la boaton, komencas remi. Do kiel ili tiel remadas, subite ili eniras nebulon, vojeraras. Ĉu dum longa tempo ili remadis, ĉu dum mallonga tempo ili remadis, ie senatende ekŝiriĝis la nebulo. Tien rigardas la homoj, do sur la bordo ili ekvidas novan, belan vilaĝon, kaj tiam ili tuj ekparolas:

— Ni albordiĝu, ni tetrinku!

— Ni iru plu, ni mem pretigos teon, diras la fremdulo, sed la ceteraj ne konsentas.

— Ni ĉi tie tetrinkos, — ili respondis al li. — Se vi volas iri plu, nur iru!

Tiam ili albordiĝis. Ili supreniras la bordon. Ili volas eniri en kabanon, sed ili nenie trovas la enirejon. Ili ne povis eniri. Tiam alvenas la novalveninta homo, tuj li ĝin trovas, malfermas la pordon. Nun jam ili povis eniri. Ili eniras. Kaj en la kabano loĝis arbara koboldspirito. Kiam ili ekvidas lin, la fremdulo alparolas al siaj homoj:

— Nu, homoj, do kuiru teon!

Sed ili estis tiel ektimiĝintaj, ke eĉ la sango eliris el ili. Ili staris palaj, kiel la mortintoj. Kaj la Arbara Koboldo-Maljunulo paŝis al ili pli proksimen.

— Maljunulo, ni salutas vin, salutas vin, bonan tagon! — diris al li la homoj.

— Aa, miaj filetoj, ankaŭ mi vin salutas! Fine jam atingis min iom da vivanta manĝaĵpeco!

Baldaŭ alvenis ankaŭ la kunuloj de la arbara koboldospirito, kvar koboldoj.

— Aa, — ili diras, — ĉe nia Maljunulo estas io moviĝanta, videbla, aŭdebla!

Tuj ili prenis grandan sepprenilan kaldronon, surpendigis ĝin sur la fajron, poste kaptis la duonon de la homoj, metis ilin en la kaldronon.

— Aa, knaboj miaj, tio estas nur iom! Venu vi ankoraŭ, — vokis ilin la koboldoj, poste kaptis ankoraŭ dek homojn, ankaŭ ilin

metis en la kaldronon. Tiam denove ekparolis la fremdulo:

— Nu, homoj, nun vi povas trinki teon sufiĉe. Trinku! Antaŭ nelonge vi diris, ke ni tetrinku. Tiuj jam en la kaldrono trinkas! Do — ankaŭ vi ĉi tie — kiel ne kuiras jam teon?

Intertempe la kaldrono de la arbaraj koboldospiritoj boliĝis, la manĝaĵo fariĝis preta. Ili manĝis la tuton. La maljuna koboldospirito kuŝiĝis: kaj la

ceteraj foriris. Tiam la fremdulo antaŭenŝoviĝis, siajn homojn elĵetadis tra la fenestro, kaj alparolis ilin:

— Iru, rompu iliajn boatojn!

Tiam la samojedo restis sola. Jen li vidas: super la arbara koboldospirito pendas lia glavo. Tuj li aliris, prenis ĝin, trapikis per ĝi la arbaran koboldospiriton. Poste ankaŭ li iris post siaj homoj. Ili sidiĝis en sian boaton, ekiris. La arbaraj koboldospiritoj rimarkis ilin, ankaŭ ili alkuris la bordon. La unuan boaton ili metis sur la akvon, do ĝi en tiu momento subakviĝis. Ili metas sur la akvon ankaŭ la duan, sed ankaŭ tiu subakviĝis.

— Ej, fulmotondro, morta diablo, al tiu, kiu disrompis niajn boatojn! — diras la arbaraj koboldospiritoj, poste ili elŝiras larikarbon, en pecojn ĝin hakas. Tre rapidsupraĵe kunligaĉas je flossimilaĵon. Ili ĵetas ĝin sur la akvon, unu el ili ekiris sur ĝi post la boaton de la homoj. Li eĉ atingis ilin, sed kiam li ekprenis ilian boaton, la samojedo per la glavo detranĉis lian manon. Foste ili remadis plu.

Ili remis, remadis, foje alvenis hejmen. Nun la filo de la blankharulo diras al sia patro:

— Ni, la duono de la popolo, hejmen venis. Se tiu ĉi homo ne estus estinta kun ni, nun jam ni ĉiuj estus mortintaj.

— Ĉu mi ne diris al vi, ke obeu lin! — respondas la blankhara homo, poste

dankeme edzinigas sian filinon al la fremdulo. Tiam diras la samojedo:

— Ankaŭ mi havas teron, akvon. Mi volas iri hejmen al mia regiono!

— Se vi volas iri hejmen, kunportos vin via edzino, — respondas al li la blankhara maljunulo, poste li disduigas la gregon de rangiferoj, eldonas la parton de la filino. Kun tio ili ekveturas. La homo kun sia edzino ekiris hejmen.

Ĉu dum longa tempo ili iris, ĉu dum mallonga tempo ili iris, foje nur ĉirkaŭrigardas la homo: do antaŭ li staras krustotendo samojeda. Antaŭ la tendo rangi ferpela stango estas pikita en la teron, sur ĝi estas sep rangiferbovaj kapoj. La homo paŝis en la tendon. Lia bofrato kaj lia pli maljuna fratino akceptis lin kun granda ĝojo. Honeste ili gastigis ilin, poste iris por dormi. Kiam tagiĝis, la samojedo jungis siajn sep blankajn rangiferbovojn, kaj tiel diris al sia edzino:

— Vi ankoraŭ iom restu! poste venu! Mi rapidas, ĉar mia bofratino kaj mia pli maljuna frato jam verŝajne tre atendas min.

Tiam li ekiris. Li iris sep noktojn, sep tagojn. Tiam li haltis, por ke li forskuu de si la neĝon kaj la surfrostiĝintan glacieron. Li ĉirkaŭrigardas: do antaŭ li estas samojeda krustotendo, Antaŭ la tendo komencas boji la hundo. Tiam iu homspeca, ĉu viro, ĉu virino, elvenas, poste reiras:

— Alvenis homo kun sep blankaj rangiferbovoj, — tiu diras interne.

— Tiam do li la homo en barelon fermita devas esti, — respondas iu alia.

Kaj la samojedo diris nenion, nur ektiris la kondukilon, kaj jam veturis plu.

Denove li iris sep noktojn kaj sep tagojn, poste li ĉirakaŭrigardis: li vidis antaŭ si samojedan tendon el betula krusto. Ĉe la tendo bojas hundo.

— Tiu ĉi estas precize tia, kiel mia propra tendo! — pensas en si la samojedo, poste li eniras. Lian bofratinon kaj lian pli maljunan fraton ĉirkaŭbrakas, kisas, kaj komencas demandadi:

— Ĉu vi konservis la gregon, la havaĵon?

— Jes, — ili respondas al li, kaj li tiel daŭrigas:

— Hej, kia grego estas nun tiu ĉi! Ankoraŭ unu grego alvenas al tiu ĉi!

Tiam efektive alvenis jen lia edzino, ŝi alportis la gregon. Poste ambaŭ gregojn ili kunigis. Efektive ĝi fariĝis ege granda grego!

Eĉ hodiaŭ ili vivas, kaj eĉ ne malbone. Ili vivas sufiĉe riĉe.

## **La fratineto de la malgranda birdo**

(El la regiono de Supra-Lozva)

Vivadis iam malgranda birdeto. Ĝi havis ankaŭ pli maljunan fratinton. La birdeto ĉiun de Torem-dio donitan tagon forflugis, kaj kion ajn ĝi trovis, portis hejmen el ĝi al sia pli maljuna fratino.

Foje tiu ĉi birdeto trovis kabanon. Tra la aperturo de la kamentubo ĝi malsupreniĝis en la domon. Ĉe la fajrujo estis granda poto kun graso. Ĝi aliris ĝin kaj komencis manĝeti. Kiam ĝi satmanĝis, ĝian bekon, piedojn plenigis per graso kaj hejmen flugis. Hejme ĝia pli maljuna fratino la grason deprenis de ĝi, kaj ili decidis dormiri.

Matene la birdeto ellitiĝis kaj denove forflugis. Ĝi denove aliris tiun kabanon, kie ĝi estis ankaŭ la antaŭan tagon. Tra la aperturo de la kamentubo ĝi enflugis en la domon, el la graspo ĝi satmanĝis, poste sian bekon kaj piedojn plenigis per graso, poste hejmenflugis al sia pli maljuna fratino. Ĝia fratino la grason beketis de ĝi, ankaŭ ĝian veston ĝi purigis, ili kuŝiĝis dormi. Tiel ili vivadis, tiel dormadis.

La sekvantan tagon matene la malgranda birdo denove forflugis. Ĝi ne multe pripensadis, iris direkte al la kabano. Ĝi enflugis tra la aperturo de la



kamentubo, kaj tuj komencis manĝadi. Ĝi nur tiel tutrapide ŝtopnutris sin per la graso! La kompatindulo tiom ŝtopnutregis sin, ke kiam volis hejmenflugi, eĉ la flugilojn ne povis suprenlevi .

— Ho ve, mi devus min kaŝi ien, por ke oni ne ektrovu min! — ĝi pensis en si, kaj subite sin ŝovis en la angulon de la aperta kameno.

Kiam ĝi tie sidadas, foje nur aŭdas jen, ke du homoj alproksimiĝas la kabanon, poste ili atingas ĝin kaj enpaŝas. Ili ĉirkaŭrigardas, kaj unu el ili ekparolas:

— Jam denove estas malplena nia graspoto! Kiu povis jam ĝin denove manĝi?

Tiu homo post iom da tempo diras al sia kunulo:

— Faru fajron!

La alia homo senvorte efektive komencis fari fajron, kaj komencis fari-faradi ĉirkaŭ la kameno. Foje nur ekkriis:

— Ve, io granda harplena-plumoza tuŝis mian manon!

— Lumon! Blovu, ekscitu rapide la fajron, por ke ni vidu, kio estas tio! — kriadis la alia.

Kiam la fajro ekflamis, ili ĉirkaŭrigardas, kaj en la angulo de la aperta kameno rimarkas la birdon.

— Ej, vi malbenito de via patro, patrino, do vi manĝegis el nia graspoto!

Nu, atendu nur, do nur ekflamu iom pli bone la fajro, ni montros al vi, kio estas la honesta afero! — la homoj kriaĉadis al la birdo.

Efektive, kiam la fajro jam sufiĉe bone flamadis, la homoj ekkaptis la birdon, komencis ĝin senplumigi. Tiam la birdeto komencis petegi:

— Ket, ket, ŝiv, ŝiv, forpermesu min! Mi havas rozarbobelan, padusarbobelan buklan, malgrandan pli maljunan fratinton. Mi donos al vi ŝin, kiel edzinton, se vi delastos min!

La homoj respondis al tio nenion, nur senplumigis la birdon plu. Poste kiam jam tutplene ili senplumigis ĝin, altenis ĝin super la fajron. Tiam la birdeto denove komencis:

— Ket, ket, ŝiv, ŝiv, prenu min de tie! Mi havas unu rozarbustobelan, padusarbetobelan, buklan, malgrandan pli maljunan fratinton! Se vi delastos min, mi donos al vi ŝin, kiel edzinton!

— Aŭdu, deprenu nur de tie la birdon! diris nun unu el la homoj, poste sin turnis al la birdo, kaj demandis ĝin:

— Kion vi diris?

— Tion mi parolis, ke mi havas unu rozarbustobelan buklan, malgrandan fratinton. Se vi delastos min, mi donos al vi ŝin! — respondis la malgranda birdeto.

— Kaj kie ŝi estas? — demandis denove unu el la homoj.

— Hejme, — respondis la birdo.

— Do tiam ni remetu al ĝi siajn plumojn! — diris la homoj, kaj efektive ili remetis al ĝi la plumojn, tiam la malgranda birdeto tuj hejmen flugis al sia pli maljuna fratino.

La sekvan matenon la homoj ekiris al la birdeto. Ili enpaŝis al ili. La knabino ĝuste kudradis: ŝi pretigis brodaĵon ornamiatan per belegaj, teraj bestoj per piedoj, per flugantaj ĉielaj birdoj. Kaj la birdeto tie sidis apud sia pli maljuna fratino. Kiam la du homoj enpaŝis, ĝi ekparolis:

— Ket, ket, ŝiv, ŝiv, karega mia pli maljuna fratino, mi alproponis vin al tiuj ĉi homoj.

Tiam la pli maljuna fratino prenis la kudrolignon, kaj la kapon de la malgranda birdeto distranĉis per ĝi. La malgranda birdeto terenfalas morte. Kaj ĝia pli maljuna fratino preparis sin, kaj foriris kun la du homoj.

Ili eĉ nun vivadas, eĉ nun dormadas!

## **La virino fajron donanta pro mensogo**

(El la regiono de Supra-Lozva)

Vivis iam tri fratoj. Foje la du pli junaj iris por ĉasi, la plej maljuna restis hejme. Tiu ĉi plej maljuna rimarkis ĉirkaŭ tagmezo: tri cignoj proksimiĝas al ilia domo. Ili flugas sur la kamentubon, poste tra la aperturo komencas malsupreniĝi. La knabo hejme restanta sian pladeton kaj la ĉerpan kuleron subite kaŝis, kaj li mem sin kaŝis en la postan angulon de la kabano, sur la supran breton, kie oni kutimas rezervi la ilaron, aĵaron. La tri cignoj intertempe venis en la ĉambron, en la internon de la ĉambro. Siajn cignopeltojn ili demetis, pendigis ilin sur la ĉeftrabon. Ili prenis la poton, metis sur la fajron, kaj komencis kuiri. Kiam ilia manĝaĵo pretfariĝis, ili komencis serĉi la ĉerpan kuleron, sed jen trovis ĝin nenie. Ili serĉas la pladeton, do nek tion trovas! Tiam unu el la knabinoj, ĉar ja la cignoj estis knabinoj, de la breto subite fortiris malsupren la fraŭlon, poste ili ĉirkaŭsidis lin, sur lian ventron metis la poton, kaj de tie elprenadis la viandon. Poste, kiam ili satmanĝis, sin vestis kaj forflugis.

Hejmen venas la fratoj el la ĉasado, ili demandas lin, la hejme restintan:

— Aŭdu, kie estas la tagmanĝo?

— Lasu, io venis sur min, mia ventro preskaŭ ekbruliĝis de ĝi!

La sekvantan tagon la plej maljuna kaj la plej juna frato iris ĉasi, kaj ili lasis hejme la mezan. Antaŭ ol ili forirus, ordonis al li:

— Kiam ni hejmen venos do estu tagmanĝo!

Tagmeze foje nur vidas ankaŭ la meza fraŭlo: tri cignoj flugas sur la kamentubon, kaj tra la aperturo ili malsupreniĝas. Tiam ankaŭ li rapide prenis sian pladeton kaj la ĉerpan kuleron, kaj ambaŭ li bone kaŝis, por ke oni ne povu ĝin trovi. Poste ankaŭ li sin kaŝis sur la supran breton. Envenas la knabinoj, demetas siajn peltojn. Ili prenas la poton, kaj komencas kuiri. Kiam la manĝaĵo estas preta, denove nur ili trovas nek la pladeton, nek la ĉerpan kuleron. Do ili de la breto subite fortiras malsupren la mezan fraton. Poste ili ankaŭ de sur lia ventro elprenadas la viandon. Post la tagmanĝo ili sin vestas, kaj samtiel, kiel ankaŭ antaŭe, forflugas.

Hejmen venas la fratoj el la ĉasado, demandas la hejme restantan:

— Kial vi ne pretigis tagmanĝon?

— Ve, io venis sur min, mia ventro preskaŭ bruligis pro ĝi!

La trian tagon la plej malgranda restis hejme. Ĉirkaŭ tagmeze jen li vidas: ĉe la aperturo de la kamentubo aperas tri cignoj. Tra la aperturo ili komencas malsupreniĝi. Li prenis rapide sian pladeton, metis ĝin ĉe la poton. Li prenis la ĉerpan kuleron, ankaŭ tiun metis ĉe la poton, kaj li mem supren kuŝiĝis sur la

supran breton. Al sia trunko li starigis grandan keston. Envenas la knabinoj, sin malvestas, siajn peltojn pendigas sur la ĉeftrabo, kaj denove nur komencas kuiri.

La poton ili laŭorde metas sur la fajron, kaj kiam la manĝaĵo fariĝis preta, ili prenas la ĉerpan kuleron prenas la pladeton, kaj bele manĝas sian manĝaĵon. Kaj la knabo intertempe prenis iliajn cignopeltojn, kaj metis ilin en la keston.

Post manĝo la knabinoj komencis serĉi siajn vestojn, sed vane! Kiel ajn ili serĉas ĝin, trovas ĝin. nenie.

— Nu nun! — alkriis ilin la plej malgranda knabo, kaj desaltis de sur la breto. — Vi primokis miajn pli maljunajn fratojn, sed nun vi enmanigis en miajn manojn!

Tiam ĝuste alvenis ankaŭ la pli maljunaj fratoj de la knabo.

— Ankaŭ dufoje estis ĉi tie tiuj ĉi knabinoj, tamen vi ne sciis, kiel oni devas el ili akiri edzinon! — diris li al siaj pli maljunaj fratoj, poste li donis al ili po unu knabinon, fine ankaŭ li retenis unu, la plej malgrandan, por edzino.

La sekvantan tagon la viroj diras al la virinoj:

— Ni nun iros en la arbaron. En niajn porfajrilajn saketojn metu sekan herbon kaj tindron!

La virinoj tion do faris. Kaj la viroj foriris ĉasi. Iel la sorto tiel haviĝis, ke ili povis reveni eĉ ne ĝis nokto, ili restis en la arbaro. Nun diras la du pli junaj

al la plej maljuna:

— Maljunulo, ekbruligu fajron!

Tiu do ekprovas bruligi, sed jen ili vidas: la porfajrila saketo de ilia plej maljuna frato estas tute malseka! Nun la du aliaj diras al la meza:

— Ekbruligu fajron!

Do jen ili vidas: ankaŭ li havas akvon en la porfajrila saketo! Nun la du pli maljunaj ordonas al la plej juna:

— Rigardu nur, ĉu via porfajrila saketo estas kia? Ili rigardas ĝin, do ankaŭ ĝi estas tut-tute akvoplena. Tiam la plej juna frato diras:

— Mia maljuna frato, iru nur al la Glacilepora virino, kaj petu de ŝi fajron!

Do la plej maljuna knabo foriris al ŝi, petas la virinon:

— Mia onklino, donu al ni fajron!

— Do kio farigis kun via fajro? — demandis la virino.

— Niaj edzinoj vere malsekigis niajn porfajrilajn saketojn, ni ne povas bruligi fajron, — respondis la knabo.

— Do mensogu antaŭe sepoblan mensogon, tiam mi donos! — ordonis la virino.

— De kie mi elpensu nun unu sepfojan mensogon? Se vi tion bezonas, ankaŭ vi mem povas! — respondis la knabo, kaj ekkaptis fajrantan ardaĵon, kaj komencis forkuri kun ĝi. Kaj la Glacilepora virino post ĝin! Poste li tiel ekbatis

inter la skapolojn de la knabo per unu fajranta branĉo, ke el ties manoj la ardaĵo fajrerante disŝutiĝis. Kion do fari, li reiris al siaj pli junaj fratoj. Tiuj tuj komencis lin eldemandi:

— Kial vi ne alportis fajron?

— Ĉar ne donis ĝin la virino, —respondis la knabo. Tiam la plej malgranda sendis por la fajro la mezan fraton:

— Iru al la Glacilepora virin-onklino kaj petu ŝin, por ke ŝi donu fajron!

Kaj la meza frato foriris.

Li diris al la Glacilepora virino:

Onklino, donu al mi iom da fajro!

— Do kio fariĝis kun via fajro? —demandis ankaŭ lin la virino.

— Niaj edzinoj plenigis per akvo niajn porfajrilajn saketojn, ni ne povas ekbruligi fajron! — respondis al ŝi la knabo.

— Se vi diros sepoblan mensogon, tiam mi donos al vi, — diris la virino al la knabo.

— De kie mi prenu unu tiaĵon? Ja ankaŭ vi mem povas, se estas necese! — respondis la knabo, kaj ankaŭ li eklevis fajrantan ardaĵon, por ke li forkuru kun ĝi. Eksaltis tiam ankaŭ la onĵo-virino, komencis lin persekuti. Ŝi atingis lin, poste unu frapo per la ardanta branĉo inter liajn skapolojn, poste ankoraŭ unu frapo pli malsupren, kaj la ardaĵo de la knabo fajrerante disŝutiĝis.



Apenaŭ ke li realvenis, kaj la aliaj jam ambaŭ demandas:

— Do kial vi ne alportis fajron?

La knabo respondis nenion, kiam la plej malgranda knabo decidis : li mem ja foriros.

Do efektive li iris, alparolis la virinon:

— Glacilepora virinonklino, donu al mi fajron!

— Antaŭe vi mensogu sepoblan mensogon, poste mi donos! — diris ankaŭ al li la leporvirino, kaj la knabo komencis:

— Kiam mi venis ĉi tien al vi, eksaltis antaŭ mi leporo. Kvankam mi estis tute ŝarĝita, mi postkuris ĝin. Mi persekutis ĝin, persekutis, sed mi ne atingis ĝin. Poste tiam mi ekkaptis ĝiajn du malantaŭajn piedojn, kaj albatadis ĝin al trunko de pinarbo!

Tion diris la knabo, kaj la Glacilepora virino forkuris. Tiel la knabo povis kunporti tiom da fajro, kiom nur li volis.

Li reiris al siaj pli maljunaj fratoj, alportis al ili la fajron. Poste ili kuŝis dormi.

Matene ili leviĝis, hejmen iris. Ankaŭ la edzinoj pli boniĝis. Tiel ili vivas de tiu tempo bele, pace!

## **La kato kaj ĝia onklo**

(El la regiono de Supra-Lozva)

Ie sub la granda ĉielo, ie sub la fera ĉielvolbo vivis iam kato kun sia onklo. Iun tagon la kato diris al sia onkleto:

— Onkleto, mi iros ien!

— Vi hundomorda hundido, en kian diablejon vi irus? Por ke vin io manĝu dumvoje?!

— Eh, kiu min manĝus! Mi iras! — respondis la kato, kaj tuj eĉ ekiris.

Ĉu dum longa tempo ĝi iris, ĉu dum mallonga tempo ĝi iris, foje nur ĝi aŭdis ian bruon post si. Tuj ĝi suprenrapidis larikarbon, kaj de tie ĝi kaŝrigaris malsupren. Do ĝi jen vidas: granda ruĝa vulpo transkuras sub ĝi! La kato nun alparolas la vulpon:

— Vulpo, se vi promesos, ke vi ne formanĝos min, mi kunportos vin sur grandiozan regionon riĉan je manĝaĵo, trinkaĵo.

— Mi ne manĝos vin, kato, kunportu min! — petis la katon la vulpo. Tiam la kato desaltas de sur la arbo, kaj nun jam ambaŭ ekiras kune.

Ĉu longan vojon ili iris, ĉu mallongan vojon ili iris, foje nur atingis princarbon. Antaŭe ili ĉirkaŭrigardis, poste laŭ la propono de la kato ili kaŝiris

en la ŝafejon de la princo. Post iom da tempo la kato elŝteliĝis el la ŝafejo, la riglilon ĝi surŝovis al la vulpo, kaj li mem iris al la princo.

Ĝi malfermas la pordon de la princo, kapklinas. Meze de la ĉambro: ĝi kapklinas. Ĝi alvenas antaŭ la princon: ankaŭ trian fojon ĝi kapklinas, kiam la princo demandas ĝin:

— Kion vi bezonas, amiko mia kato?

— Mi bezonas nenion, kontraŭe mi alportis ion al vi: vivantan beston, respondas la kato. — Rigardu nur, ĝi estas tie en via ŝafejo!

Tiam la princo sendas siajn homojn en la ŝafejon. Efektive tie estas la vulpo! La homoj kaptas ĝin, kaj portas ĝin antaŭ la princon.

— Kiom da arĝento-oro vi nur volas, tiom mi donos al vi, — diras la princo al la kato, ĉar treege ekplaĉis al li la vulpo.

— Mi bezonas nek oron, nek arĝenton, — respondas la kato al la princo, — ja mi mem tiom da ĝi havas jam, ke mi eĉ tion ne scias, kion mi faru kun ĝi!

Poste la kato restis por tranokti ĉe la princo, kaj la sekvan tagon frumatene decidis, kaj ĝi iris hejmen al sia onkleto. Kiam ĝi alvenis hejmen, ili kuŝiĝis.

La sekvan tagon matene la kato denove diras al sia onkleto:

— Onkleto mia, mi iros ien!

— Vi hundomorda hundido, en kiun diablejon vi irus, por ke vin eble io manĝu dumvoje?!

— Kiu min manĝus? — diras la kato al la onklo, kaj denove ĝi ekvojaĝis.

Ĉu dum longa tempo ĝi iris, ĉu dum mallonga tempo ĝi iris, post ĝi donove ekbruas io. La kato tuj supreniĝis pinarbon, kaj de tie ĝi kaŝrigardis malsupren. Baldaŭ jen ĝi vidas: nigra vulpo transkuras sub ĝi! La kato nun subite alparolas ankaŭ la nigran vulpon:

— Nigra vulpo, se vi promesas al mi, ke vi ne formanĝos min, mi kunportos vin en regionon riĉan je manĝaĵo, bonegan je trinkaĵo.

— Mi ne manĝos vin, kato! Kunportu min! — petegas ankaŭ la nigra vulpo la katon.

Tiel do la kato ankaŭ la nigran vulpan kunportis al la princo, kiam la princo diras al ĝi:

— Kato, restu vi ĉe mi por ĉiam!

— Nur por unu nokto! — konsentis la kato, kaj ĝi restis tie por la nokto ĉe la princo.

Kiam vesperiĝis, la kato proponis al la princo estingi ia kandelon, poste proponis ke li karesadu la nigran vulpon. Do jen, kiam la princo finpalpis la harojn de la nigra vulpo, la dorso de la vulpo tuj disĵetis en la aeron lumantajn belajn fajrerojn!

— Hej, kiajn bonajn malgrandajn bestojn vi alportadas al mi! — diras tiam al la kato la princo. — Tiom da arĝento-oro kunportu al vi, kiom nur via dorso

kapablas porti!

— Mi bezonas nenion! — malakceptis la katoj kaj frumatene ĝi reiris al sia onkleto. Kiam ĝi alvenis hejmen, tuj ili kuŝiĝis.

La sekvan matenon la kato denove alparolas sian onkleton:

— Onkleto, mi denove iros ien!

— Ne iru jam, ĉar fine efektive io vin formanĝos!

— Ne manĝos min iu, — respondas al li la kato, kaj jam foriris.

Ĉu dum longa tempo ĝi iris, ĉu dum mallonga tempo ĝi iris, foje nur renkontiĝis kun gulo. La kato, kion alian fari: ankaŭ la gulon delogis al la princo.

La princo ĝojante eĉ ne sciis, kion li faru.

— Karega amiko kato, kiom da oro vi nur kapablas porti, kiom da arĝento nur povas havi lokon sur via dorso, surmetu, ŝarĝigu, prenu, forportu ĝin! — diris la princo al la kato, sed tiu malakceptis ĝin, kaj tiel respondis al li:

— Arĝenton-oron mi ne bezonas, prefere mi venos pro svatiĝo pri knabino!

— Venu nur, venu! — konsentis la princo. Tiam la kato diris al li:

— Do tiamaniere vi plifortigu la ponton, ĉar ja mi venos kun grandnombra nupta festantaro!

La princo ankaŭ tion promesis al ĝi, kaj jen li jam sendis siajn soldatojn, ke ili ordigu la ponton.

Dume ankaŭ la tempo pasis, la kato iris hejmen al sia onkleto, kaj diris al li:

— Morgaŭ ni iros en gastadon, por svatiĝo pri knabino!

— Por svatiĝo?! — konsterniĝis la onklo de la kato. — Ja , nek veston mi havas, en kiu mi povus iri por la virino! Kaj poste kion mi donu al ŝi manĝi, kion mi donu al ŝi trinki? Ve, eĉ per kio mi vestu ŝin!

Al tio la kato diris nenion, nur decisis kaj forkuregis en la tombejon, poste ĝi elfosis la mortintojn. Sur unu ĝi trovis bonan vestaĵon: ĝi deprenis ĝin. Sur la alia ĉapon: ĝi deprenis ĝin. Foste li kunkolektis ankoraŭ ĉirkaŭ ses ĉapojn, kaj ĝi, kuris hejmen kun ili. Unu ĉapon kaj la vestaĵon ĝi surmetis al sia onkleto, kaj la ceterajn ses ĉapojn ĝi metis en sian poŝon, kaj ili ekveturis.

Ĉu longtempe ili iris, ĉu mallongtempe ili iris, baldaŭ ili atingis la ponton de la urbo de la princo. Tiam la kato transsendis sur ĝi sian onkleton, kaj ĝi mem sin ŝovis sub la ponton, kaj rompis la portantajn trabojn de la ponto, tiam la ponto tuj ruinfalas. Poste la kato la ĉapojn ĵetis en la akvon, kaj ili iris plu.

Ĉu ili iris longan vojon, ĉu ili iris mallongan vojon, ili atingis la urbon de la princo. Ili iris rekte al la princo. Ili salutis reciproke unu la alian, kaj la kato diris:

— Kial vi ne plifortigis la ponton? Mia nupta festantaro ĝis la lasta kapo tute pereis, ili falegis en la akvon.

La princo tiam sendas siajn soldatojn, por ke ili rigardu jam: kio okazis. La

soldatoj iris, do jen ili vidas: la ponto vere ruiniĝis, kaj sur la akvo, — ili nombris, ses ĉapoj drivas malsupren. La soldatoj reiras al la princo, raportas al li:

— Princo, la ponto vere ruinfalis. Kaj sur la akvo drivas malsupren ĉapoj de ses homoj.

La princo vidis, ke la kato estas prava, do li tuj komencis marĉandi kun ĝi pri sia filino. Ne longtempe ili marĉandis, ja ili estis amikoj, baldaŭ ili interkonsentis: la princo donis sian filinon al la onkleto de la kato. Eĉ la saman tagon ili tuj aranĝis ankaŭ la nuptofeston. Mirinde grandan festenon ili aranĝis, dum tuta monato ili nur manĝis, dum kvin semajnoj ili nur trinkis!

Post la geedziĝa festo, kiel decas, la onklo komencis sin prepari hejmen. Tiam diras la princo:

— Jam ankaŭ mi iras, mi rigardas, kien do transloĝiĝas mia filino.

Tuj ili komencas, jungas la ĉevalojn, sin preparas. Intertempe la kato sufloras al sia onkleto:

— Kien mi iros, ankaŭ vi venu tien!

Tiam la kato forkuris.

Ĉu dum longa tempo ĝi iris, ĉu dum mallonga tempo ĝi iris, foje nur ĝi renkontiĝis kun ĉevalaro konsistanta el cent ĉevaloj.

— Al kiu apartetenas tiu ĉi ĉevalaro? —demandas la kato.

— Al la Serpento-viro kaj al la Serpento-virino, — oni respondas al ĝi.

— Hundo-morda hundido, se alvenas mia onkleto, do li instruos vin! Vi diru, se oni demandas vin:

— Tiu ĉi ĉevalaro apartenas al onkleto de la kato.

— Tiel ni diros, tiel ni diros, respondas la homoj al la kato, kaj tiu kuregas plu. Ĝi kuregas, kuregas, foje venas al grego da bovinoj.

— Al kiu apartenas tiu ĉi grego da bovinoj? — demandas la kato.

— Al la Serpento-viro kaj al la Serpento-virino, — ili respondas al ĝi.

— Hundo-morda hundaĉido, se mia onkleto demandas, ne tion ĉi vi diru, ĉar li instruos vin, kiel devas respondi. Do vi respondu, se oni vin demandas, ke ĝi apartenas al la kato kaj al ties onkleto!

— Tiel ni diros, tiel ni diros, respondas la homoj, kaj la kato kuras plu.

Ĉu ĝi kuris dum longa tempo, ĉu ĝi kuris dum mallonga tempo, foje nur ĝi atingis nove konstruitan domon kaj novan gardejon. La domon ĝi ĉirkaŭkuras sepfoje de nordo, sepfoje de sudo, sed pordon, tegmontaperturon ĝi trovas nenie. Fine tamen ĝi rimarkas lignan kojnon, ĝi tien kuras. forŝovas ĝin, kaj la pordo tuj malfermiĝas antaŭ ĝi. Eniras la kato, suprensaltas sur la tablon. Do jen ĝi vidas: sur la tablo en granda arĝenta plado ruliĝas la Serpento-sinjoro kaj la Serpento-sinjorino. Tiam la kato okulumas ilin, sed tiel, ke la Serpento-viro kaj la Serpento-virino konsterniĝante tra malgranda truon tuj ŝoviĝas en la teron.



La kato nun desaltis de sur la tablo, fandis plumbon, kaj ŝtopis per ĝi la truon.

Dum la kato tiel sin okupis, la princo, lia bofilo kun la edzino alvenis al la tero de la Serpento-viro kaj Serpento-virino. Ili ekvidas la ĉevalaron, demandas:

— Al kiu apartenas tiu ĉi ĉevalaro?

— Al la kato kaj al la onkleto de la kato, — respondas al ili la homoj, kaj ili daŭrigas sian vojaĝon plu. Post iom da tempo ili atingis gregon da bovinoj: ankaŭ ĉi tie ili demandas:

— Al kiu apartenas tiu ĉi grego da bovinoj?

— Al la kato kaj al la onkleto de la kato, — respondas la homoj.

Tiam la princo diras al sia bofilo:

— Plenjure fanfaronis la kato. Tian ekonomion eĉ mi ne havas!

Je tio jam ili iras plu. Ĉu ili vojaĝis longe, ĉu ili vojaĝis mallonge, foje nur ili atingis la novan domon kaj la novan gardejon. La kato jam de malproksime ekaŭdis, ke ili venas. Ĝi eliris al la pordo de la domo, jen vidas: la princo, la onkleto kun la edzino tie staras antaŭ la domo, sed ili ne povas eniri, ĉar la ŝtuparo estas tia brilanta, ke ili senĉese mispaŝas sur ĝi. Tiam la kato rekuras, alportas longan tapiŝon, kaj la ŝtuparon tutplene kovras per ĝi. Nun jam efektive ĉiuj povas eniri la domon.

Do tuj ili eniras, komencas preĝi: ili petas la helpon de Torem-dio.

Dume la princo ne povas satiĝi per la mirado: nu do eĉ tia domo! Tutplena miraklo!

Ankaŭ tiaĵon li ne havas.

Intertempe ili demetas sian vojaĝveston. Ili sidiĝas, manĝas, trinkas. Eĉ tion ili ne vidas, de kie: sed la manĝaĵo-trinkaĵo nur de si mem venas sur la tablon. Eĉ ĉiu povas mangi laŭplaĉe.

Pasis-pasis la tempo, la princo jam devis iri hejmen. Tiam la kato enpelas la ĉevalaron, elektas el ĝi la plej eminentan ĉe valon. Ĝi jungas ĝin, preparas la glitveturilon, kaj kiam la princo elvenas, estas jam preta ĉio por la vojo. Do elvenas la princo, adiaŭdiras. Ili kisas, ĉirkaŭbrakas unu la alian. La princo suriras la glitveturilon kaj ekiras. Nigra nubo leviĝas pro la kurado de lia glitveturilo, pro la galopado de la glitveturilo fulgonigra nubo leviĝas.

La kato kaj ĝia onklo nun restis en la domo de la Serpento-viro kaj Serpento-virino. Vere ili tie restis, kaj eĉ hodiaŭ estas tie. Ili estos tie ankaŭ morgaŭ.

Foje ankaŭ mi estis ĉe ili. Eĉ mi manĝis tie, eĉ trinkis tie.

Do tiu ĉi estis mia fabelo, jen prenu ĝin, jen estas la fino!

## La riĉecon distribuanta homo

(El la regiono de Supra-Lozva)

Iam la Nepo de Virino kune vivadis kun sia onklino. Foje, kiam la Nepo de Virino kun malplenaj manoj revenis el la ĉasado, la Nepo de Virino diras al sia onklino:

— Tiel ne estas bone! Ni semu grenon!

— Semu, se vi volas! — respondis al li la onklino.

La Nepo de Virino ekdecidis, kaj pecon da tero prisemis per greno. Poste li eliras al sia agro ankaŭ alifoje. Li jen vidas: jam estas tute bela lia semaĵo! Li iras hejmen al sia onklino, kaj ankaŭ al ŝi diras:

— Kreskas jam nia pano!

Post ne multa tempo la Nepo de Virino ankaŭ trian fojon iris sur sian agron. Do jen ilian grenon iu besto ĝisradike forpaŝtis! Li reiras al sia onklino, kaj diras al ŝi:

— Iu besto ĝisradike formanĝegis nian grenon!

Tiam la Nepo de Virino sur la rando de sia agro starigis maŝkaptilon, poste hejmen iris. Li atendis dum iom da tempo, poste iris rigardi: ĉu kaptis ion lia kaptilo. Kiam li aliris ĝin, jen li vidas: gruo estas en la kaptilo.

— Do ci formanĝis mian panon! — kriis la Nepo de Virino al la gruoj, kaj li prenis bastonegon, kaj tiel daŭrigis:

— Pro tio mi cin mortbatas!

— Ne mortbatu min! — petegis al la Nepo de Virino la gruoj. — Kion vi gajnos, se vi min mortbato? Sed se vi lasas min en la vivo, mi faros vin riĉa!

— Eĉ kion ne! Mi vin delasis, kaj vi forflugas, poste ankoraŭ nek cian vizaĝon mi vidos! — respondis al la gruoj la Nepo de Virino.

— Tute ne! — diris nun la gruoj. — Mi lasos spuron por vi, kaj vi nur venu post mi!

Tiam la Nepo de Virino delasis la gruojn, kaj li mem iris hejmen. Hejme li diras al sia onklino:

— Do gruoj formanĝis nian semajnon! Mi eĉ kaptis ĝin, poste delasis ĝin.

— Kial vi delasis ĝin? — demandis nun lia onklino.

— Tial, ĉar ĝi promesis, ke ĝi faros min riĉa, nur mi iru en ĝia spuro.

Tiam la Nepo de Virino foriris. Li iris, iradis laŭ la spuro de la gruoj, kaj fine li atingis malgrandan kabanon. Kiam li tien alvenis, tuj enpaŝis. En la kabano li trovis viron kaj sidantan virinon. Kiam li eniris, tiuj stariĝis, ili metis sur la tablono degeligitan grason, frostigitan lardon, fermentitan mieltrinkaĵon, bieron, do ĉiaspecan bonaĵon, kio nur troviĝas sub la ĉielo. Foste ili sidiĝis, manĝis, trinkis.

Post la manĝo la homo demandis la Nepon de Virino:

— Nepo de Virino, do vi alvenis?

— Jes, mi alvenis! — respondis la Nepo de Virino al la homo. Tiam la homo iris en la angulon de la kabano, li elprenis someran sciurpelton, kaj donis al li:

— Iru kun ĝi hejmen! Alion mi ne havas. Donu ĝin al via onklino, por ke ŝi konservu ĝin bone!

La Nepo de Virino prenis de li la someran sciurpelton, kaj iris hejmen. Hejme li donis ĝin al la onklino, poste ili kuŝiĝis,

Matene, kiam vekigis la Nepo de Virino, membrostreĉas iom. Li etendas la barkojn: ili alpuŝiĝas ian varmaĵon. Li etendas la piedojn: ankaŭ ili kroĉiĝas kun io varmaĵa! Tiam li jam eksaltas, do jen li vidas: lia kabano estas tutplena de varmaj-varmaj bestopeltoj, tiom, ke tia malgranda loko ne troviĝis en ĝi libera, kia estas la finaĵo de remilo! Kaj antaŭ lia kabano servistaj homoj konstruas por li domon, gardejon!

La sekvantan tagon, apenaŭ tagiĝis, alvenas al ili la Urba Princ-Maljunulo:

— Aŭdu, — diras la Urba Princ-Maljunulo al la Nepo de Virino, — donu al mi iom da faruno!

La Nepo de Virino donis al li. Tiam la Urba Princ-Maljunulo sidiĝis, kaj denove li komencis:

— Nepo de Virino, donu al mi vian someran sciurpelton!

La Nepo de Virino povis nenion fari, ol doni al li ĝin. Pasis la tago. La Nepo de Virino kaj lia onklino kuŝiĝis. Matene, kiam ili vekigis, la Nepo de Virino etendas siajn piedojn, do jen apenaŭ ke ili ne frostiĝis! Li etendas la brakojn, sed ankaŭ ilin tranĉas la malvarmo. Li ellitiĝas, eliras: antaŭ la kabano troviĝas nek domo, nek servistoj, nek gardejo!

Tiam li decidis, kaj denove iris al tiu homo, al kiu la grupo lin kondukis.

— Nu, tiel baldaŭ vi estas ĉi tie jam denove? Do kion vi faris per tio, kion mi donis al vi? — demandas la homo la Nepon de Virino.

La Nepo de Virino respondis al li nenion, kiam la homo ekleviĝis, iris en la angulon de la kabano, elprenis someran mustelpelton, kaj donis ĝin al li. La Nepo de Virino prenis la pelton kaj iris hejmen. Hejme li kuŝiĝis dormi.

Matene, kiam li vekigis, li etendis la brakojn: ili alpuŝiĝis ian varmaĵon! Li etendas la piedojn: do ankaŭ ili alpuŝiĝis ian varmaĵon! Tiam li eksaltas, do li jen vidas: lia kabano estas plenplena kun nigraj peltoj, ruĝaj peltoj, kun peltoj kastora, zibelana kaj zibela, tiel ke eĉ tiom da libera loko ne estis trovebla, kiel granda estas la finaĵo de remilo! Kaj antaŭ la domo la servistoj tute tiel, kiel antaŭe, konstruas lian domon, pretigas lian gardejon.

Kiam ili tiel vivadas, la Urba Princ-Maljunulo denove nur ekiras al ili. Li estas ankoraŭ malproksime, sed oni jam diradas:

— Venas la Urba Princ-Maljunulo! Venas la Urba Princ-Maljunulo!

— Ĉu li venas al vi, aŭ al mi, ke vi tiel kriadas! — alparolas ilin la Nepo de Virino. Dume la Maljunulo jam alvenas. Li iras en la domon, kaj li denove nur farunon petas. La Nepo de Virino donis ĝin al li. Tiam la Urba Princ-Maljunulo pretigis sin, iris hejmen. Sed jam la sekvantan tagon li denove estis ĉe ili. Kaj nun li petis la someran mustelpelton. La Nepo de Virino kion povus fari alian, ankaŭ ĝin li donis al li. Poste la Urba Princ-Maljunulo iris hejmen, la Nepo de Virino kaj lia onklino kuŝiĝis dormi.

La sekvantan tagon matene, la Nepo de Virino laŭkutime komencas membrestreĉi. Li etendas la brakojn. Do jen nur tiel tranĉas ilin la malvarmo! Li etendas la piedojn, kaj tiuj jen precize preskaŭ frostiĝas! Li ellitiĝas, jen vidas: lia kabano fariĝis denove malplena, fulga, mizera malgranda kabaneto! Eĉ postsigno ne troviĝas de domo, de homo, de gardejo!

La Nepo de Virino ne multe pripensadis, decidis, kaj ankaŭ la trian fojon iris al tiu homo, al kiu iam lin kondukis la gruo.

— Jam denove por kio vi venis? — demandas lin la homo.

— Por tio mi venis, ĉar denove mi havas nenion! — respondis al li la Nepo de Virino. La homo al tio fariĝis tre kolera, kaj diras al li:

— Mi provizis vin kun ĉio bona, kun abundo, kun riĉeco. Sed se vi ne kapablas tion konservi, iru nur, faru laŭ via bontrovo!

Jam tiam la Nepo de Virino tuj komencis sin prepari por foriro hejmen.

— Do tamen ne foriru! — ekparolis subite la homo, poste iris en la angulon de la kabano, elprenis unu ungon de gulo. Li donis ĝin al la Nepo de Virino, kun tiuj ĉi vortoj:

— Iru kun tiu ĉi ungo de gulo al la Urba Princ-Maljunulo. Petu lin, por ke li donu en ĝin al vi farunan. Tiam li diros: „Kion vi volas komenci kun tiom ĉi? Mi donas al vi anstataŭ tio pri volonte unu tutan sakon.” Sed vi ne akceptu ĝin, nur diru al li: „Tiom sufiĉos al mi!” Poste, se vi jam vidos, ke el lia gardejo komencas malpliigi la faruno, vi igu lin promesi, ke li redonos al vi la someran mustelan felon kaj la someran sciurpelton! Eĉ prenu ĝin de li, kaj la farunon reĵetu al li, kaj iru hejmen!

La Nepo de Virino do tuj ekiris al la Urba Princ-Maljunulo. La servistoj jam delonge ekvidis lin:

— Venas la Nepo de Virino! Venas la Nepo de Virino! — ili komencis kriadi. Tiam ankaŭ la Urba Princ-Maljunulo rapide elkuris, kaj diris al siaj servistoj:

— Li ne venas al vi, sed al mi?

Dume la Nepo de Virino jam alvenis. La Urba Princ-Maljunulo tuj demandis lin:

— Aŭdu, kion vi bezonas?



— Mi bezonas iom da faruno, — respondis al li la Nepo de Virino.

— Mi povas ĝin doni, se vi tion bezonas! Ĉu vi havas ĉe vi ion ujon? — demandis la Urba Princ-Maljunulo.

— Ĝi troviĝas, — respondis al li la Nepo de Virino. Poste ili eniris la gardejon de faruno. Tiam la Nepo de Virino elprenis la ungon de gulo.

— Kion vi volas komenci per tiom ĉi? Mi donas anstataŭ ĝi unu tutan sakon pli volonte! — diras la Urba Princ-Maljunulo.

— Tute ne! Sufiĉos al mi ankaŭ nur tiom ĉi! — respondis al li la Nepo de Virino. Poste ili tuj komencis, komencis ĉerpadi la farunon. Ili ĉerpadas, ĉerpadas, la farungardejo jam preskaŭ malpleniĝis, sed en la ungo de gulo eĉ ne estis videbla, ke ĝi ion enhavas!

— Jam sufiĉas! — ekkriis subite la Urba Princ-Maljunulo. — Ĉiun mian manĝaĵon vi forportas! Pli volonte mi redonas al vi la someran mustelan felon kaj la someran sciuran pelton, nur lasu por mi mian farunon!

Tiam la Nepo de Virino reŝutis la farunon en la gardejon, prenis siajn peltojn, kaj reiris malrapide kun ili hejmen.

Kiam li alvenis hejmen, tuj eĉ vesperiĝis. La Nepo de Virino kaj lia onklino kuŝiĝis dormi. La sekvan tagon matene, kiam la Nepo de Virino komencas membrestreĉi, jen li sentas, ke la manoj puŝiĝas kontraŭ io varma. Li etendas siajn piedojn, do ankaŭ ili sentas ion varman. Eksaltas jam la Nepo de Virino,

do jen li vidas: ke lia kabano estas tiome plena kun varmaj-varmigaj, valoraj bestopeltoj, zibelopeltoj, ke eĉ tiel granda loko, kia estas la finaĵo de remilo ne restis malplena! Antaŭ lia kabano la homoj ĉarpentadas-skulptadas, pretigas lian gardejon, kaj tuj eĉ plenigas ĝin per ĉiuspeca bonaĵo, manĝaĵo.

Tiel ili vivas eĉ hodiaŭ en abundo kaj riĉeco!

## La tri fratinoj kaj la serpentoviro

(El la regiono de la rivero Pelimka)

Vivadis iam tri fratinoj. Kiam ili tiel vivadas, la plej maljuna foje diras al la du aliaj:

— Mi iras, mi serĉos por mi taŭgan vivkunulon!

Kaj tiam ekiris ŝi. Ŝi iris iradis. Foje ŝi atingis profundan vojon, enpremiĝeman ĝis la genuoj. Dume ŝi jen vidas: ĉe la vojo unu homo kun ruĝa kitelo, kaj unu kun nigra kitelo manĝas fiŝon, kaj la internaĵon de la fiŝo disĵetadas tien-ĉtien.

La knabino ĉu dum longa tempo iris, ĉu dum mallonga tempo iris, ĉe la fino de la vojo ŝi atingis la domon de maljunulo kaj de maljunulino.

— Nu, kiun vi vidis? — demandas la knabinon la du gemaljunuloj.

— Kiun mi vidis?! Unu viron kun ruĝa kitelo, kaj unu kun nigra kitelo, — respondas la knabino al la gemaljunuloj.

— Kaj kion ili faris? — demandas denove la du maljunuloj.

— Ili manĝis fiŝon, kaj la fiŝintestojn kaj la ceterajn internaĵojn ĵetadis tien-ĉtien.

— Do tiel vi ne estos nia bofilino! Vi respondis malbone, vi eĉ la matenon

ne ĝisvivos! — diris ia gemaljunuloj al la knabino.

— Ho? ve, kio okazos al mi? Jam estas ĉi tie la nokto! — ekkriis la knabino. Poste ili ĉiuj tri sidiĝis. La gemaljunuloj donis al la knabino manĝi, trinki, poste apartan kuŝlokon pretigis por ŝi, kaj ankaŭ ili mem iris dormi.

Do kiam ili dormas, subite eniras al la knabino serpento, kaj ĝi komencas turniĝadi en arĝenta ujo kun larga piedo.

Ĉu longtempe, ĉu mallongtempe ĝi turniĝadis, ĝi ekdecidis, subite kun rapida ekmovo trapikis la koron kaj la pulmojn de la knabino. Poste kvazaŭ nenio estus okazinta, ĝi foriris.

Apenaŭ ke la serpento foriris, vekigis la maljunulo. Li diras al sia edzino:

— Edzino, vekigu jam! Rigardu nur, kia malbona odoro estas en la domo!

Stariĝis la virino, ĉirkaŭrigardis, poste reiris al sia maljunulo:

— Vi estas prava, efektive estis ĉi tie malbonodoro. Ĝin kaŭzas la knabino, jam delongtempe forlasis ŝin sia animo! — ŝi diras al la viro, kaj li ordonas al ŝi:

— Iru do edzino, kaj elĵetu ŝin!

Tiam la maljunulino la kadavron de la knabino elĵetis el la domo.

Dumtempe la pli junaj fratinoj de la knabino vivadas plu. Foje jen la plej malgranda knabino diras al sia pli aĝa fratino:

— Ni iru tien, kie nia plej maljuna fratino mortis, ankaŭ ni mortu tie!

La meza knabino konsentis, kaj laŭ la spuro ankaŭ ŝi ekiris baldaŭ. Ŝi iris, iradis. Ŝi atingis la vojon ĝis genuoj profundan. Jen ŝi vidas: ĉe la vojo unu homo kun nigra kitelo, kaj unu homo kun ruĝa kitelo fiŝon manĝas, kaj la intestojn kaj la ceterajn internaĵojn ili nur disĵetas tien-ĉitien. Ŝi ekstaris, rigardiis ilin, poste iris plu. Ankaŭ ŝi baldaŭ atingis la domon de la maljunulo kaj la maljunulino. Kiam ŝi alvenis tien, la gemaljunuloj demandas ŝin:

— Knabino, kien vi iras?

— Mi serĉas al mi fianĉon, — respondis la meza fratino.

— Baldaŭ, eĉ en tiu ĉi nokto, venos ĉi tien fianĉo. Sidiĝu do kaj manĝu, trinku!

Sidiĝis la knabino. Ŝi manĝis, trinkis, kaj sur la benko preparis por si lokon, kaj kusiĝis por dormi.

Ĉu dum longa tempo, ĉu dum mallonga tempo ŝi dormis, subite eniris al ŝi la serpento, kaj en la granda, larĝa arĝenta ujo komencis vertiĝi. Ĉu dum longa tempo, ĉu dum mallonge tempo ĝi vertiĝis, subite ĝi kaptis al la knabino, kaj ankaŭ ŝian koron kaj pulmojn trapikis. Poste ĝi foriris. Vekiĝis nun la maljunulo, kaj diris al sia edzino:

— Edzino, ellitiĝu jam! Jam denove estas tia malbonodoro en la kabano. Ĉirkaŭrigardu jam, kion faras tiu knabino sur la benko!

Ellitiĝis la maljunulino, rigardis la knabinon, poste reiris al la edzo:

— Jam de longtempe ankaŭ ŝin forlasis la animo, ŝi mortis. Kaj ni jen eĉ ne rimarkis tion! — diras la maljunulino al la viro.

— Iru do, edzino, elĵetu ankaŭ tiun ĉi!

Kaj la edzino iris, kaj eligis la kadavron de la knabino el la kabano.

Tiel do la plej malgranda fratino restis sola. Kiam alvenis la somero, ekiris ankaŭ ŝi. Ŝi pensis en si: „Kien miaj fratinoj iris, ankaŭ mi devas iri tien!”

Ŝi iris, iradis. Ĉu dum longa tempo ŝi iris, ĉu dum mallonga tempo ŝi iris, ankaŭ ŝi atingis la profundan vojon ĝis la genuoj enpremiĝeman. Ŝi iras plu, fine jen ŝi vidas: ĉe la vojo unu homo kun ruĝa kitelo, kaj unu homo kun nigra kitelo manĝas fiŝon kaj ezokon, la intestojn kaj la ceterajn internaĵojn disĵetadas tien-ĉitien. Denove nur ŝi iras plu. Ĉu dum longa tempo ŝi iras, ĉu dum mallonga tempo ŝi iras, ŝi

atingas la domon de la maljunulo kaj de la maljunulino. Ŝi eniras al ili. Tiuj tuj demandas ŝin:

— Aŭdu, kien vi iras?

— Vi ankoraŭ eĉ manĝi-trinki ne donis al mi, kaj jam vi demandadas! — respondis al ili la knabino, kaj daŭrigis: — Kien mi devas iri, mi iras tien, sed vi ne ekkolerigu min, ĉar mi tiel batos-frapos vin, ke eĉ guto da akvo ne restos el vi!

Eksaltis tiam ĉu la viro, ĉu la virino. Unu antaŭen tiris la tablon, kaj la alia

plenŝarĝis ĝin kun ĉiuspecaj viandaĵoj, grasaĵoj. Foste ili sidiĝis por manĝi-trinki. Kiam ili finis tion, la knabino dankis al ili.

Foje nur aŭdas la knabino, ke la du gemaljunuloj susuradas inter si:

— Kiel ni demandu ŝin, por ke ŝi nek nin, nek tiun aĵon mortigu?

— Kaj se tiu aĵo mortigos nin?!

— Do kiel ajn, edzino, demandu ŝin denove! — susuras la viro al la edzino. Tiam ili aliras al la knabino, kaj la virino denove nur tion demandas de ŝi:

— Kien vi iras?

— Kial vi demandadas min? — respondis al ŝi la knabino. — Ĉu mi ne diris jam al vi, tien mi iras, kien mi devas iri!

— Ho ve, do ne estas permesite jam demandadi vin pri io ajn?! — komencis plendi la maljunulino.

— Vi povas demandadi min, sed nur tiukondiĉe, se mi demandadas vin antaŭe, — diris nun la knabino al la virino.

— Do demandu! — konsentis la maljunulino. Kaj la knabino demandis:

— Diru al mi, ĉu vi ne vidis ie miajn fratinojn?

— Jes, ni vidis ilin, — respondis la gemaljunuloj. Kaj la knabino ekkriis al ili:

— Do tiam diru al mi rapide, kio okazis al ili!

— Ve, ne ektimigu tiel nin, ĉar eĉ jam mi tremadas! — komencis petegi la

maljunulino la knabinon.

— Kian kaŭzon vi havas por timi? demandas la knabino, kiam la maljunulino diras al ŝi:

— Permesu jam, ke ni demendu vin: kiun vi vidis?

— Mi vidis du homojn de Torem-dio, kiam ili sidadis en siaj pompaj vestoj kun zono hokornamita, kaj sin klinis dekstren-maldekstren, — respondis al ili la knabino.

— Nu, kaj ankoraŭ nur tion diru al ni: por kio vi iras? — demandis denove la maljunulino.

— Mi serĉas fianĉon, — respondis al ŝi la knabino.

Tiam la maljunulino klinis sin al ŝi, kaj por ke la maljunulo ne aŭdu, ŝi flustris en la orelon de la knabino:

— Se vi volas fianĉon, mi diras al vi: preparu vian kuŝlokon, poste kuŝiĝu, kaj sur vian koron metu arĝentan ĉerpilon, kaj sur vian bruston arĝentan ringon!

Kuŝiĝis la knabino. Sur sian koron ŝi metis la arĝentan ĉerpilon, kaj sur la bruston la ringon. Poste ŝi kuŝis nur plu.

Pasis ne multe da tempo, neatendite venis ankaŭ al ŝi la serpento, poste ĝi komenis fari cirklojn kun sia kapo. Ĉu dum longa tempo ĝi vertiĝis, ĉu dum mallonga tempo ĝi vertiĝis, ĝi nur vertiĝis. Kaj la knabino dume pensis en si:



„Certe tiu ĉi forportis ankaŭ miajn fratinojn. Sed mi luliĝis en alia lulilo! Ni ekvidos, ĉu vi kunportos ankaŭ min, aŭ ne! Mi havas ungojn, dentojn, se estos necese, ankaŭ via serpenta haŭto povos tiujn ekkoni! Vi estas ruza, sed ankaŭ mi estas tia, nur timu nenion!” Kaj la serpento dume nur vertiĝis plu. Poste ĝuste tiam, kiam ĝi komencis eliri, ĝi alpikis al la brusto de la knabino, tiel ke ĝi tute ekkurbiĝis pro tio. Kaj ĝi ekdecidis, kaj subite elŝoviĝis. Apenaŭ ke ĝi eliris, ellitiĝis la knabino, kaj komencis kudri veston.

Post malmulte da tempo vekigis la maljunulo.

— Edzino, ellitiĝu jam! — diris li al sia edzino. — Denove estas ia malbonodoro en la kabano.

Ellitiĝis la virino, jen ŝi vidas: kudras la knabino! Ŝi reiris al sia maljunulo.

— Kudras nia bofilino! — Ŝi diris al la edzo, kiam li tiel respondis:

— Rigardu, ni ĉiam volis princan knabinon por nia filo. Kaj nun, jen, li ricevis, ŝi estos por li tia edzino, kiu plaĉas al lia koro! Vi estingu la fajron en la fajrujo eĉ en la hodiaŭa tago. Postrestu el eĉ ne fajrero, tiel, ke ni povu surmeti ankaŭ la manojn!

Tiam la maljunulino do iris. Ŝi estingis la fajron, tamen ŝi lasis por la knabino unu eron da ardaĵo. Poste la maljunulo kaj la maljunulino ellitiĝis, kaj foriris en alian vilaĝon. Kaj ilia bofilino prenis la ardaĵon kaj reŝamigis ĝin.

Kiam vesperiĝis, la knabino kuŝiĝis dormi. Sur sian bruston ŝi metis la

arĝentan ringon, sur sian koron la arĝentan ĉerpilon, kaj komencis atendadi. Baldaŭ nur denove venis al ŝi la serpento, kaj komencis vertiĝi en larĝa granda arĝenta ujo.

— Kiel mi povus vin kapti? — pripensadis en si la knabino. Kaj la serpento nur vertiĝis plu.

Ĉu dum longa tempo ĝi vertiĝis, ĉu dum mallonga tempo ĝi vertiĝis, subite, kiam ĝi eliris, ĝi alpikis la bruston de la knabino, ke ĝi tute ektremis pro tio, ĝi alpikis la koron de la knabino, ke ĝi tute kurbiĝis pro tio. Poste ĝi ekdecidis kaj elŝoviĝis. Tiam la knabino saltleviĝis, kaj komencis ĝin sekvi.

Ĉu dum longa tempo ŝi sekvis ĝin, ĉu dum mallonga tempo ĝi sekvis ĝin, foje nur sekvante ĝiajn postsignojn, retrovis elpendigitan serpentohaŭton. Prenas la knabino la serpentohaŭton, kaj disŝiras ĝin dispecigante je malgrandaj pecetoj, poste ŝi reiras hejmen, sidiĝas kaj denove nur komencas kudri. Kiam ŝi tiel kulradas, jen vidas: la tablo estas plen-plena kun bonaj-bonegaj viandaĵoj, kun delikataj-bongustaj grasaj manĝaĵpecoj. Nur oni devas tien etendi la manojn, kaj preni el ĝi. La knabino do aliras la tablon, poste prenas iom el tiu ĉi manĝaĵo, ankaŭ el tiu depinĉas unu pecon, poste residiĝas al sia loko, kaj eĉ pli diligente ŝi kudradas plu.

Ĉu dum longa tempo ŝi kudradis, ĉu dum mallonga tempo ŝi kudradis, jam vesperiĝis. La knabino kuŝiĝis por dormi. Al sia koro ŝi denove nur almetis la

arĝentan ĉerpilon, al sia brusto la arĝentan ringon, poste ŝi ekdomis. Ĉu dum longa tempo ŝi dormis, ĉu dum mallonga tempo ŝi dormis, venis al ŝi la serpento. Ĝi komencis vertiĝi en la arĝenta ujo. Ĝi vertiĝis, vertiĝis, kaj dume ĉiam pli proksimen sin ŝovis al la knabino. Ĉu dum longa tempo ĝi vertiĝis, ĉu dum mallonga tempo ĝi vertiĝis, kiam jam ĝi atingis ŝin, subite ĝi alpikis la bruston de la knabino, tiel ke ĝi eĉ ektemis pro tio, alpikis la koron, ke ĝi eĉ kurbiĝis pro tio. Poste ĝi ekdecidis kaj foriris. Kaj la knabino eksaltis, kaj ekiris post ĝin. Ĉu dum longa tempo ŝi iris, ĉu dum mallonga tempo ŝi iris, post ĝi, la knabino sekvis la postsignojn de la serpento, ankaŭ alian fojon ŝi retrovis la elpendigitan serpentan haŭton. Tiam la knabino iris tien, deprenis la serpentan haŭton, kaj kunportis ĝin hejmen, kaj denove nur komencis kudradi. Kiam ŝi tiel kudradas, rimarkas: ŝia tablo estas plen-plena kun manĝaĵoj. Unu estas pli bona, ol la alia. Nur oni devas ilin jam manĝi, ili estas eĉ pretigitaj! La knabino demetis tiam la kudraĵon, poste komencis pinĉetadi-manĝetadi. Poste ŝi denove aliĝis, kaj nun eĉ pli diligente laboris, ol antaŭe. Tiel, ke la vesto, kiun ŝi kudris, baldaŭ do fariĝis preta.

Dumtempe vesperiĝis. La knabino ekdecidis kaj kusiĝis. Sed antaŭe ŝi prenis la arĝentan ujon, en kiu la serpento kutimis vertiĝi, kaj metis ĝin sub sian kapkusenon. Poste ŝi metis sur sian koron la arĝentan ĉerpilon, sur sian bruston la arĝentan ringon, poste finfine prenis la serpentan haŭton, kaj ankaŭ

tiun metis sub sian kapon. Dum ŝi tiel aranĝis-aranĝadis, ĉiam nur pensis en si: „Fine mi devas ekscii, ĉu tiu estas homo, aŭ kio, kiu vizitadas min!” Kiam ŝi estis preta kun ĉio, bele ŝi ekdormis. Subite nur ŝi ekstremis: antaŭ ŝi staris belega princostatura viro, herostatura bela princa knabo! Tuj ili komencis interkisasi, kaj ili eĉ ne interrompis, ĝis kiam ne mateniĝis.

Tiel do ili komencis kune vivadi-dormadi. La viro iradis ĉasadi. En siajn sep gardejojn nur tiel kolektiĝis la pelto de akvaj bestoj, en siajn sep konservejojn nur tiel amasiĝis la pelto de arbaraj bestoj.

Kiam ili tiel vivadas, la viro diras al sia edzino:

— Mia patro kaj patrino hodiaŭ venos al ni, por viziti nin. Prenu do fulgan ĉifonon, pretigu la malpuran ujon, kaj kiam ili enpaŝas, la ĉifonon vi ĵetu en ilian vizaĝon, la malpuran ujon vi verŝu inter iliajn okulojn! Pro tio jam ili foriros.

La virino do tuj prenis fulgan ĉifonon, pretigis la malpuran ujon. Kaj la viro ekiris en la arbaron. Apenaŭ li foriris, al la virino alvenis la bopatro kaj la bopatrino. Tiam ŝi subite ĵetis kontraŭ ili la fulgan ĉifonon. Sed vane ŝi ĵetis tien, ili nur puŝis sin internen. Nun la virino verŝis inter iliajn okulojn la malpuran ujon. Tiam ili jam malaperis.

Ĉu longa tempo pasis, ĉu mallonga tempo pasis, alvenis ankaŭ la viro. Kiam li enpaŝis, tuj demandis sian edzinon:

— Hu, tiel vi faris, kiel mi diris?

— Tiel mi faris, — respondis al li la edzino. Kiam la edzo diris:

— Tiel do ni povos vivi en paco. Ili venis, por ke ili kunportu ankaŭ nin tien malsupren, sed ni elliberiĝis!

La viro kaj virino tiam sidiĝis por manĝi-trinki.

Kaj de tiu tempo, eĉ ankaŭ nun ili vivadas-dormadas!

## **La fileto de la plej malgranda fratino**

(El la regiono de Pelim)

Vivis iam viro kaj virino. Ili havis ankaŭ tri filinojn. Iun tagon la patro sendis la plej grandan filinon, por ke ŝi rigardu, ĉu kaptis ion ilia naso. Do la plej granda filino foriris, rigardis la nason, sed trovis en ĝi nenion. Tial do ŝi ekiris returnen. Kiam ŝi tiel iras, foje nur rimarkas sur la bordo de la maro malgrandan kabanon. Ŝiaj manoj kaj piedoj jam suferis de malvarmo, ŝi pensis: Ŝi eniras por iom varmiĝi. Tuj ŝi do iris en la kabanon. Do jen ŝi vidas: en la kabano loĝas arbara spirito. Ĝuste li estis hejme, promenadis tien-reen. La knabino jam intencis rapide rekuri, sed tiam la maljunulo, la arbarspirito, ekkaptis tranĉilon, kaj pikis ĝin en la pordon de la kabano, por ke la knabino ne povu eliri tra ĝi. Poste li diras al ŝi:

— Estu mia edzino! Se vi estos mia edzino, mi ne mortigos vin, sed se vi ne estos, mi tuj mortigos vin!

La knabino, kion povus alian fari, edziniĝis al la maljunulo.

Dumtempe la patro de la plej aĝa filino konstante nur atendis sian filinon hejmen, Sed li vane atendas, ŝi ne venas. Tiam li diras al sia mezaĝa filino:

— Iru nur, rigardu, kie troviĝas via fratino!

La mezaĝa filino do iris tuj. Antaŭe ŝi malsupren kuris al la naso, poste kiam ŝi vidis, ke tie troviĝas nek fiŝo, nek la fratino, ŝi ekiris hejmen. Foje nur ankaŭ ŝi rimarkas la kabanon. Ŝiaj manoj-piedoj suferis de la malvarmo. Ŝi pensas, ŝi eniras por iom varmiĝi. Kiam ŝi eniras la kabanon, jen ŝi vidas: tie sidas ŝia pli maljuna fratino.

— Do kion vi faras ĉi tie? — ŝi demandas la pli maljunan fratinnon.

— Do mi nur estas ĉi tie, — respondis al ŝi sia pli maljuna fratino, — sed ankaŭ vi ne eliros iam de ĉi tie!

Tiam la mezaĝa filino volis elkuri, sed tuj estis tie la maljunulo. Sian tranĉilon li pikis en la pordon, poste diris al la knabino:

— Se vi estos mia edzino, mi lasos vian vivon. Se vi ne estos, mi mortigos vin!

— Kiel ni povus esti ambaŭ viaj edzinoj? — protestis la mezaĝa filino, sed vane, en la pordo estis tie la tranĉilo. Ŝi ne povis eliri, poste, se ŝi komence eĉ ne volis, fine tamen fariĝis edzino de la maljunulo!

Dumtempe ilia patro konstante nur atendis ilin hejmen. Li atendis, atendis ilin, sed ili tamen ne venis. La patro do diras al ala plej malgranda filino:

— Iru do, rigardu kio okazis al viaj pli maljunaj fratinoj! Ĉu ili dronis, ĉu mortis, aŭ kio trafis ilin?

Nun foriris ankaŭ la plej malgranda filino. Ŝi malsupren kuris al la naso, ŝi

rigardis ĝin, sed vere ŝi trovis tie nek fiŝon, nek siajn pli maljunajn fratinojn. Ŝi ekdecidis iri hejmen. Estis malvarme, ŝi komencis kuri. Fine ankaŭ ŝi rimarkas la kabanon. Malvamon sentis ŝiaj manoj-piedoj, ŝi pensis: ŝi eniras iomete, varmiĝas. Do jen, kiam ŝi enpaŝas, ŝi vidas: tie sidas ambaŭ ŝiaj pli maljunaj fratinoj! Ŝi tuj komencis ilin riproĉi:

— Do vi por kio tie ĉi sidas?

Ŝiaj fratinoj eĉ tempon ne havis por respondi al ŝi ion, ĉar jen intertempe envenis la maljunulo, kaj li enpikis la tranĉilon en la pordon. La kanbino rimarkis, ke ŝi implikiĝis en malbonon, ŝi volis subite elkuri, sed jam estis malfrue. La maljunulo diris al ŝi:

— Kien vi irus? Se vi estos mia edzino, mi lasos vian vivon. Se vi ne estos, mi tuj vin mortigos!

Tiam ankaŭ la plej malgranda knabino komencis protesti. Si protestis, protestis, sed eliri ŝi ne povis, do tiel ĉi fine ankaŭ ŝi fariĝis edzino de la maljunulo.

Foje la maljunulo sin preparis por ĉasado. Antaŭ ol li estus foririnta, li demandis sian plej maljunan edzinon:

— Kion vi preparos por mi, ĝis kiam mi revenos?

— Mi pretigos por vi tolon cent klaftojn longan, — respondis al li lia plej maljuna edzino.



— Kaj vi kion pretigos por mi, ĝis kiam mi revenos? — li demandis sian mezan edzinon.

— Mi pretigos por vi reton cent klaftojn longan, — respondis al la maljunulo lia meza edzino.

— Kaj vi? — li demandis nun la plej malgrandan edzinon.

— Ĝis kiam vi revenos, mi naskos por vi filon. Liaj brakoj ĝis kubuto estos el arĝento, liaj kruroj ĝis genuoj el oro, sur lia frunto brilos la Suno, sur lia nuko la Luno, — respondis al la maljunulo lia plej malgranda edzino.

Poste la maljunulo foriris por la ĉasado. Dum li forestis, lia plej maljuna edzino teksis por li tolon cent klaftojn longan, la meza reton cent klaftan, kaj la plej malgranda naskis por li filon. Liaj manoj ĝis kubuto estis el arĝento, liaj kruroj ĝis la genuoj estis el oro. Sur lia frunto brilis la Suno, sur la nuko la Luno. Kiam ekvidis lin la du aliaj edzinoj, ekkaptis ilin la envio:

— Kio estos, se hejmen venos la maljunulo? Li amos nur ŝin, ĉar ŝi naskis por li filon! — ili pensis en si.

Tial do, kiam ilia plej malgranda fratino dormis profunde, ili forprenis de ŝi la filon, kaj ĵetis en la maron. Anstataŭ li ili kuŝigis hundidon kaj pigidon.

Kiam alvenis la maljunulo, li alpaŝis antaŭ sian plej maljunan edzinon, kaj demandis ŝin:

— Nu, kion vi pretigis por mi?

La edzino tiam alportis al li la tolon cent klaftojn longan.

Tiam la maljunulo demandis ankaŭ la mezan edzinon:

— Nu, kion vi pretigis por mi?

La meza edzino alportis antaŭ lin la reton cent klaftojn longan. Tiam la maljunulo aliris al sia plej malgranda edzino:

— Do vi kion naskis por mi? — li demandis ŝin, sed intertempe li rimarkis, ke ĉe lia plej malgranda edzino kuŝas hundido kaj pigido. Furioze li kaptis la edzinon, ŝiajn manojn-piedojn disrompis, kaj ŝin mem elĵetis al la bordo de la maro.

La edzino sur la bordo de la maro komencis frotadi per roso siajn rompitaĵajn membrojn. Ŝi frotadas, frotadas ilin, subite nur fariĝas sendifektaj ŝiaj manoj, subite nur fariĝis sanaj ŝiaj piedoj. Tiam ŝi prenis sian hundon, kaj ekiris kun ĝi laŭlonge sur la bordo de la maro. Sur iu loko ŝi ekstaris, kaj improvize faris por ŝi aĉan malgrandan kabanon, tie ŝi ektiris sin. Ŝia hundo portadis al ŝi manĝaĵon.

Foje la hundo foriris. kaj kiam revenis, ĝi kunhavis nenian manĝaĵon. La virino demandis ĝin:

— Kial vi ne alportis por mi manĝi?

— Kial mi ne portis? — respondis la hundo. — Tial mi ne alportis, ĉar el la maro elmergiĝis knabo, kaj kun li mi ludadis dum la tuta tago. Kiel mi povus

estinta akiri ankaŭ por vi manĝaĵon?

Tiam la patrino komencis pripensadi. La sekvantan tagon la virino ŝteliris post la hundo, kaj sin kaŝis malantaŭ ĝi sur la bordo de la maro. Subite jen ŝi vidas: el la maro elvenas knabo, kaj la hundo komencas ludi kun li. La virino tuj ekkonis lin: li estis ŝia filo!

Por la sekvanta tago la virino pretigis el betula krusto tri ujojn. Ĉiujn tri ŝi plenigis per lakto el sia mammo. Matene, antaŭ ol ŝia filo estus elveninta el la maro, malproksimen kaj pli malproksimen ŝi starigis ilin sur ilian ludlokon. Poste la patrino en la proksimo rapide sin kaŝis.

Post malmulte da tempo el la akvo elmergiĝis la filo. Li aliris la malgrandan hundon, kaj ili komencis ludadi. Kiam ili tiel ludas, la hundo rimarkis unu el la betulkrusta ujo, ĝi alkuris tien, poste ĝi allogis tien ankaŭ la filon:

— Jen, nur rigardu, — ĝi diras al li, — kian dolĉan lakton mi trovis en tiu ĉi betula ujo!

La filo enpuŝis en ĝin unu sian fingron, gustumis ĝin kaj diris:

— Kvazaŭ ĝi estus la lakto de mia patrino!

Intertempe la hundo ektrovis ankaŭ la alian ujon.

— Rigardu nur, — ĝi kriis al la filo, — ankaŭ tiu ĉi estas kia dolĉa lakto!

La filo aliris ĝin, trinkis el ĝi kaj diris:

— Ej, kvazaŭ mi sentus la mameton de mia patrino en mia buŝo!

Dumtempe la hundo trafis ankaŭ la trian betulan ujon. Tiu ĉi jam estis tute malproksime de la maro. Tiam denove ekparolis la hundo:

— Ĉu vi aŭdas, tiu ĉi estas la plej dolĉa!

Tiam la filo alkuris, kaj lia patrino elvenis el la kaŝejo, subite ŝi kuris al sia filo, kaj kunportis lin en sian kabanon. Tiam ankaŭ la filo ekparolis:

— Kial vi portis min ĉi tien? Mi ne estas via filo!

— Sed kontraŭe, vi estas mia filo! Mi naskis vin, — kriis al sia filo la patrino, — Ekstaru nur tie en la angulo de la kabano, mi restos ĉi tie en la pordo, kaj se mia lakto eniras vian buŝon, tiam certe mi naskis vin!

Efektive eĉ tiel okazis.

— Mia patrineto, mi estas via filo! —diris nun ankaŭ la filo, kaj tiel daŭrigis:

Mi konstruos domon, kaj de nun ni ambaŭ vivos en ĝi!

Tiam la filo eliris en la arbaron. Li dehakis lignospliton, fendadis ĝin en ŝtupojn. Kiam li fariĝis preta, super sia kapo li transĵetis ilin kaj diris:

— Se mi fariĝos prinĉeroo, fariĝu el tiu ĉi larika splito unu domo ses klaftojn alta, fariĝu el tiu ĉi pinglofolia pina splito sep klaftojn alta domo!

Apenaŭ li eldiris tion, jam tie etendiĝis la ses klaftojn alta larika domo, apenaŭ ke li finis siajn vortojn, do jam tie staris sep klaftojn alta pinglofolia

pina domo!

Pri la filo baldaŭ oni komencis paroli:

— Antaŭ nelongtempe ĉi tie estis nur nura arbaro, kaj nun jen kia domo, kia vilaĝo troviĝas ĉi tie! — ili diradis unu al la alia.

Foje jen traveturis tie sur sia ŝipo ankaŭ iu komercista homo.

— Kia homo povas tie ĉi vivi? — pensis en si la komercisto. — Mi iras jam kaj rigardos lin!

Tuj li do tien rondoturniĝis al li, kaj jen li vidas: sur lia frunto estas la Suno, sur lia nuko la Luno, liaj brakoj ĝis la kubuto estas el arĝento, liaj piedoj ĝis la genuoj el oro! Poste jam eĉ ne troviĝis ŝipo, kiu estus evitinta la domon de la knabo. La komercistoj senescepte albordiĝis ĉe li. Ili ĉu alportis ion, ĉu elportis ion, ili komercis kun li.

La komercistaj homoj alportis la famon ankaŭ al la maljunulo:

— Kia riĉa homo ekaperis en nia regiono! — ili diris al la maljunulo.

— Mi iros jam kaj rigardos lin, — decidis la maljunulo.

— Kien vi irus? — diris al li unu el liaj edzinoj. — Sur la alia bordo de la maro loĝas ankoraŭ pli riĉa homo. Sub lia fenestro staras bovo. Inter ĝiaj kornoj estas lavujo. Se iu iras al li, antaŭe li baniĝas en ĝi, poste nur tiel enpaŝas en la domon.

Eksciis ankaŭ la knabo, ke la virinoj kion parolis pri li, kaj pro tio do

vespere, kiam la homoj jam ĉiuj iris ripozi, li eliris el la domo, prenis sian sinrigardantan brilan spegulon, kaj komencis ĝin ŝetadi el sia unu mano en la alian. Dumtempe li diris: „Mia servisto servu al mi! Ĝis kiam mi ellitiĝos, estu ĉi tie unu bovo kun lavujo inter ĝiaj kornoj!”

Efektive matene, kiam li ellitiĝis, la lavujo jen tie staris antaŭ lia fenestro.

Baldaŭ denove alvenis ŝipo. La komercistoj elŝipiĝis, iris al li: antaŭe ili sin banis en la lavujo, nur tiel ili eniris la domon. Poste ili iris plu. La komercistoj foje denove vizitis la maljunulon. Ili rakontis al li:

— Kia riĉa homo aperis en nia regiono! Oni devas antaŭe iri en la lavujon, nur poste en la domon.

— Mi iros jam vizitos lin, — ekdecidis denove la maljunulo.

— Por kio vi irus? Sur la alia bordo de la maro vivas homo: antaŭ lia fenestro staras betuleto. Dum kiam la kukolo sonas, sub ĝi altigas la arĝento ĝis la genuoj!

Aŭdis ankaŭ tion ĉi la knabo kaj decidis; ankaŭ li havos tian betulon! Kiam liaj homoj iris ripozi, li denove prenis sian spegulon, kaj iris kun ĝi antaŭ la domon. El unu sia manko li ŝetadis ĝin en la alian. Dume li diris:

— Miaj servistoj, servu min! Ĝis kiam mi vekiĝos, ankaŭ antaŭ mia fenestro estu tia betuleto!

Efektive matene, antaŭ la fenestro de la knabo staris la betulo.

Baldaŭ denove venis tiudirekten ŝipo, kaj ĝi vojflexiĝis al la tero de la de la knabo. Jen la komercistoj vidas: antaŭ la fenestro de la knabo staras tia betulo, ke dum kiam la kukolo sonas, ĝis genuoj falas de ĝi la arĝento. Kaj antaŭ lia domo, inter la kornoj de bovo, estas lavujo, kaj la homoj irantaj al li antaŭe sin banas en ĝi, nur poste ili eniras lian domon. Tiam la komercistoj veturis plu, post iom da tempo denove ili atingis la maljunulon:

— Ho, kia riĉa homo tie vivas! Antaŭ lia fenestro estas betulo, kaj dum la kukolo sonas, falas de ĝi arĝento ĝis genuoj atinganta. Kaj apud ĝi estas bovo. Inter ĝiaj kornoj estas lavujo. Antaŭe oni sin banas, nur poste eniras en la domon, — rakontis la komercistoj al la maljunulo. Kaj tiu denove nur ripetadis:

— Mi jam iros, kaj ankaŭ mi mem konvinkiĝos!

Poste vere, ekdecidinte, li iris al sia filo. Kiam li alvenis tien, li ekstaris antaŭ li: mallevis siajn okulojn, hontosentis antaŭ sia filo. Kaj tiu prenis lin per la mano, — kaj kvankam lia patrino koleris pro tio, — li kunportis lin en la domon. La maljunulo do de tiu tempo tie loĝas ĉe li.

## **La pirolo-homo**

(El la regiono de la rivero Pelimka)

Vivadis-dormadis iam viro kaj virino. Ili vivis nur sola, ili havis nek filon, nek filinon.

Foje la viro eliris en la arbaron por haki arbon. Do kiam li hakas la arbon, distranĉas ankaŭ kavernon, kiam el la kaverno sin elŝovas bela pirolobirdo kun griza dorso, kun ruĝa ventro. La homo ekkaptas la birdon, kaj kunportas ĝin al sia edzino. La edzino donas al ĝi manĝaĵon, kiam la pirolobirdo subite transformiĝas en homon. En homon, kaj nome en plenkreskan homon, tiel ke oni devis al li havigi tuj ankaŭ edzinon.

La maljunulo, kion alian povus fari, havigis al li edzinon.

Foje, post la nuptofesto, la edzino de la pirolohomo prenis la plumojn de la pirolo-homo, kaj ĵetis ilin en la bakforon, brulanta kun arda flamo. Do jen la pirolo-homo en tiu minuto fariĝis ruĝa de kapo ĝis plando, kaj ĵetis sin tra la fenestro, kaj malaperis.

Lia edzino ne multe ploradis, sed decidis, ke ŝi efektive foriros, kaj reserĉos sian edzon. Ŝi ekdecidis, kaj tuj do ekiris. Ŝi iris, iris, iradis, ĝis kiam ŝi atingis domon. Ŝi enpaŝas en la domon, jen ŝi vidas: en la domo sidadas unu sola



maljunulino.

— Fu! — diras la maljunulino al la enpaŝanto. — Min do ne riproĉu, vi mem tion volis, vi mem ĉi tien venis! Sed nun antaŭe manĝu-trinku, poste rakontu, por kio vi venis.

Tiam la junulino sidiĝis, manĝis-trinkis.

Kiam jam ŝi satmanĝis, la maljunulino demandis ŝin:

— Nu, kien vi direktiĝas?

— Mi serĉas la pirolohomon. Ĉu vi scias ion pri li? Ho, onklino, ĉu vi vidis lin ie?

— Ne, — respondis al li la maljunulino, — mi scias pri li nenion. Sed via onklo vespere venos hejmen, mi demandos lin. Mia edzo marŝadas ĉie ajn, eble, li scias pri li ion.

Dum ili tiel interparoladis, fariĝis vespero. Hejmen venis la maljunulo, kaj kunportis alkon, por si mem kaj por la maljunulino. Kiam li enpaŝis, post la pordo li delasis la alkon, poste prenis sian tranĉilon kaj diris:

— Tranĉilo mortigu tiun ĉi alkon!

Eksaltis tiam la tranĉilo, kaj fortranĉis la kolon de la alko. Tiam denove ekparolis la maljunulo:

— Tranĉilo, metu tien por kuirigi la alkon! — kiam la tranĉilo efektive metis ĝin tien. Kaj eĉ jam komencis kuirigi, boli la manĝaĵo, poste, kiam ĝi

fariĝis preta, la maljunulo kaj la maljunulino komencis, kaj manĝis la tutan. Foste ankoraŭ ili sin turnis unu-du, poste iris dormi. Kiam ili kuŝis, la maljunulino demandis sian edzon:

— Edzo, ĉu vi vidis ie iun viron nomitan Pirolobirdo? Ĉu vi scias ion pri li?

La edzo respondis al tio nenion, nur fariĝis ege furioza, kaptis sian edzinon, kaj tra la pordo elĵetis ŝin sur la straton. Kaj kiam komencis mateniĝi, ek, kaj li iris al sia laboro. Post mallonga tempo vekigis la juna virino. Ankaŭ ŝi leviĝis, poste ekiris. Ŝi iris, iradis. Foje ŝi denove atingis solecan domon. Kiam ŝi alvenas pli proksimen, jen ŝi vidas: ankaŭ en tiu ĉi domo sidadas nur unu maljunulino.

— Vi ne demandis, vi mem venis. Se io al vi ne plaĉos, akuzu vin mem! — diras al ŝi ankaŭ tiu ĉi maljunulino, poste tiel daŭrigas: — Nun antaŭe manĝu-trinku, poste rakontu, kien vi direktiĝas?

La junulino efektive antaŭe komencis manĝi-trinki, poste demandis:

— Onklino, ĉu vi vidis homon nomitan Pirolohomo? Ĉu vi scias pri li ion?

— Ne, — respondas al ŝi la maljunulino, — mi scias pri li nenion. Sed se alvenos via onklo, mi demandos lin.

Apenaŭ vesperiĝis, venas la maljunulo. Vere la hieraŭa maljunulo, — ĉar li havis eĉ tri edzinojn. Denove li kunportas alkon. Apenaŭ li eniras, ĵetas ĝin sur la teron, kaj ekparolas:

— Tranĉilo, fortranĉu tiun ĉi alkon! — kiam la tranĉilo efektive fortranĉas ĝin.

— Tranĉilo, metu tien por kuirigi la alkon! — kiam la tranĉilo vere ĝin metas tien.

Kiam la manĝaĵo estis preta, la maljunulino prenis ĝin de la fajro, kaj kun sia edzo ili manĝis la tutan, poste iris dormi.

— Edzo, —: alparolas la maljunulino la edzon, — ĉu vi konas homon nomitan Pirolobirdo?

Tiam la edzo fariĝis furioza, vangofrapis sian edzinon, poste ili kovris sin. Tiel do la junulino denove eksciis nenion, Matene, kiam mateniĝis, ellitiĝis la homo, kaj rapide ekiris al sia tria edzino. Baldaŭ, post la maljunulo, ellitiĝis la junulino, kaj ankaŭ ŝi ekiris. Ŝi iris, iradis, poste ŝi nur alvenis al soleca domo. Eniras ŝi tra la pordo, do jen ŝi vidas: ankaŭ en la tria domo sidadas unu soleca maljunulino.

— Vi ne petis, ke vi povu veni, vi mem tion volis, ankaŭ vi mem alvenis, — diras ankaŭ la tria maljunulino al la juna virino, kaj tiel daŭrigis: — Manĝu-trinku, poste rakontu, kien vi direktiĝas!

Tiam la juna virino sidiĝis, manĝis-trinkis, poste demandis ankaŭ la trian maljunulinon:

— Onklino, ĉu vi konas homon nomitan Pirolobirdo? Ĉu vi scias ion pri li?

— Ne, filino, — respondis al ŝi la maljunulino, — mi scias nenion pri li. Sed nokte, kiam alvenos via onklo, eble li scias pri li. Mi demandos lin.

Malfrue vespere efektive venis la maljunulo. Denove li kunportis alkon. Li ĵetas ĝin sur la teron, alĵetas la tranĉilon. Li diras:

— Tranĉilo, fortranĉu ĉi tiun alkon! — kiam la tranĉilo fortranĉas ĝin. Poste denove nur ekparolas la maljunulo:

— Tranĉilo, metu por kuiriĝi tiun ĉi alkon! — kiam la tranĉilo metas ĝin tien. Kiam la manĝaĵo fariĝis preta, la maljunulo kaj la maljunulino manĝis-trinkis, poste ili kuŝiĝis.

— Maljunulo! — demandas nun la maljunlino sian edzon, — ĉu vi scias ion pri la homo nomita pirolobirdo?

— Kelkfoje mi estis ĉe li, — respondas la maljunulo al la edzino.

— Do se vi vizitadas lin, tiam diru al mi, kiel vi kutimis tien iri!

— Kun mia tranĉilo mi tranĉet-purigadas la plandumon de mia boto, poste ĉe la rando de la marĉo mi ŝutas ĝin sub min. Per tio la malseka marĉo fariĝas seka, kaj mi trairas ĝin. En la mezo de la marĉo estas kabano: tie vivas la pirola-homo. Lian pordon mi malfermas per haro de mia barbo, kaj eniras al li, — respondas la edzo.

Apenaŭ ke ekdormis la maljunulo, leviĝis la virinoj, kaj de la plandumo de la viro ili deskrapis la polvon. Ili metis ĝin en malgrandan korbon el betula

krusto, poste ekkaptis la barbon de la maljunulo, por ke ili unu hareron elŝiru el ĝi. Sed kiel ajn ili ŝiradas ĝin, ili povas elŝiri el ĝi eĉ ne unu pecon. Tiam ili prenas la hakilon, kaj per tiu ili eltranĉas unu hareton. Sed jen, intertempe ili ektranĉas ankaŭ la mentonon de la maljunulo, Eksaltas tiam la maljunulo:

— Kiu ekhakis mian buŝon? — demendas li la virinojn.

— Maljunulo, vi mem tranĉis vin mem. Vespere vi pendigis la hakilon super via kapo, kaj nun do ke ĝi falis sur vin, akuzu vin mem! — respondas al li lia edzino. Kaj la maljunulo ekdecidas, kaj ekiras eksteren.

Matene ellitiĝas ankaŭ la juna virino. Ŝi prenas la betulan ujeton kaj la hareton de la maljunulo. kaj ankaŭ ŝi ekiras. Ĉe la rando de la marĉo la polvon deskrapitan de la plandumo de la maljunulo ŝi ŝutas sub sin. La marĉo tuj fariĝas seka antaŭ ŝi. Baldaŭ ŝi do atingas la kabanon. Ŝi prenas la hareron, malfermas per ĝi la pordon kaj eniras. Do jen ŝi vidas: en la kabano promenadas juna grupo. La virino demandas ĝin:

— Kiam venos ĉi tien la pirolo-homo?

— Baldaŭ, — respondas la grupo al la virino.

Tiam la virino sin kaŝas malantaŭ la apertan kamenon, kaj komencas atendadi. Foje nur venas ŝia edzo, la pirolo-homo. Li eniras, prenas sian citron, kaj komencas ludi. Kiam li tiel ludas, subite nur li memoras sian edzinon, kiam la kordo disŝiriĝas sur sia citro. Tiam la pirolo-homo komencas ludi sur

dombro. Li ludas, ludas, poste li denove memoras sian edzinon, kiam la kordo disŝiriĝas ankaŭ sur la dombro.

— Ej, mia malgranda citro, — ekĝemas nun la pirola-homo, — ej, mia malgranda dombro, vin ambaŭ vidis iam ankaŭ mia edzino. Ej, nun jam eĉ vin mi ne havas!

Tiam la pirola-homo prenis la harpon, sed denove li memoris sian edzinon, kaj ankaŭ sur la harpo disŝiriĝis la kordo. Eksaltas la pirola-homo, volas elkuri. Sed tiam jam aperas ankaŭ lia edzino, ŝi ĉirkaŭbrakas lin de malantaŭ, poste ili ĉirkaŭbrakumas, kisas unu la alian. Poste ili man-en-mane ekiras al la patrino, ekiras al la patro, ekiras kune hejmen, al si mem.

## La panoflano

(El la regiono de Konda)

Vivadis-dormadis iam viro kaj virino. Ili havis ankaŭ plenkabanon da gefiloj. Sed panon, manĝaĵon ili havis nek peceton. Nek por vespero, nek por mateno jam sufiĉis al ili io ajn. Ekiris do la viro de vilaĝo al vilaĝo, por ke li kolektu-ŝteladu iom da manĝaĵo por siaj infanoj, kaj nu ankaŭ por si mem. Eĉ sukcesis al li ŝteli en unu vilaĝo hordeon, en alia sekalon, en la tria iom da tritiko, kaj en iu loko pecon da grasa viando. Poste kiam jam el ĉio li havis iometon, li kolektis iel sian restintan forton, kaj ekiris hejmen.

Lia edzino pretigis flanon el la hordeo. sekalo kaj el tiu iometo tritiko, poste en ĝian mezon enbakis ankaŭ la viandon. Kiam ŝi fariĝis preta kun ĝi, ili ĉiuj ĉirkaŭis la flanon, kaj komencis manĝetadi ĝin. Foje nur el la mezo de la flano ekaperis la viando. Kiam tiun ĉi ekvidis la virino, ŝi kaptis al tiu, kaj ektiris ĝin antaŭ sin. Tiam la viro forkaptis de ŝi, sed antaŭ ol li povus esti metinta en sian buŝon, la virino elŝiris ĝin el lia mano, kaj ŝtopis ĝin en sian buŝon. Eksaltis nun la viro, li atakis la virinon, per sia tranĉilo li distranĉis ŝian stomakon. La viando elfalis el ĝi, kaj la virino restis tie morta.

Dum tiel ili sintiradis, la flano terenfalas, kaj komencis ruliĝi: ĝi forlasis

ilin. Vane jam nun ploras la viro, manĝaĵo nur ne estas sur la tablo!

Tiam la viro elkuris el la domo. En iu loko li komencis fosi. Dum la fosado subite li trovis likoperdonan funĝon. Li prenas la funĝon, kaj kuras kun ĝi al sia edzino. Li prenas ĝin en sian manĝadon, kunpremas ĝin, kaj la elgutantan blanketan sukron gutigas en la buŝon de la virino, kaj ŝmiras sur ŝian bruston. Do jen en tiu momento la vundo kuntiriĝas, kvazaŭ ĝi eĉ ne estus ekzistanta, kaj la virino eksaltas sane, kia ŝi estis antaŭe. Kun la edzo ili ĉirkaŭbrakumas sin, kisas unu la alian, kaj denove ili komencas vivadi-dormadi.

Do se ili estas tiel, nur estu! Ili restu al si mem, kaj mi rakontos, ke kio okazis kun la flano.

La flano, kiam ekiris, tiel ĝi do pluiris. Ĝi iris, iradis, foje jen renkontis leporeton.

— Onklino-virino, kien vi ruliĝas? —demandis la leporo la flanon.

— Mi estis ĉe malgrasa maljunuleto, kaj ĉe malgraseta virino, kiuj bakis min pano el hordeo, sekalo kaj el iometa tritiko, kiuj kun unu peceto da viando faris el mi flanon. Poste kiam ili komencis manĝi, ili interdisputis. Tion mi jam ne povis rigardi, kaj mi forkuris de ili, — respondis la flano al la leporo.

— Bone, bone, sed nun jam atentu, se vi iras plu, por ke eble iu plumhava birdo, lanuga gufo ne formanĝu vin! — diris la leporo al la flano, poste forkuris. Kaj la flano ruliĝis plu. Ĝi ruliĝas, ruliĝas, do foje renkontas vulpon.



Ankaŭ la vulpo demandas ĝin:

— Onklino-virino, kien vi iras?

— Mi estis ĉe malriĉa virino kaj ĉe malriĉa viro, — respondas ankaŭ al ĝi la flano, — kaj kiam ili manĝis el mi, intermalpaciĝis. Kaj mi tiel ekkoleris, ke forlasis ilin!

— Do se vi forlasis ilin, forlasis, — diras la vulpo al la flano. — Sed atentu, por ke vi ne implikiĝu en iun akran aŭ sagan kaptilon!

Tiam la vulpo forkuris, kaj ankaŭ la flano daŭrigis sian vojon plu, ĝis kiam ĝi renkontiĝis kun la Grand-Maljunulo, kun la urso.

— Kien vi iras? — demandas la Granda-Maljunulo la flanon.

— Mi venas de malriĉa virino kaj de malriĉa viro, — respondas al ĝi la flano, — kiuj kiam volis min manĝi, interkverelis pro mi. Tiam mi tiel ekkompatis ilin, ke mi tuj forkuris.

La Grand-Maljunulo diras nenion al la flano, nur ekdecidas, kaj plu stumblas. Ekkoleriĝas la flano, ke la Grand-Maljunulo senvorte ĝin forlasis, ĝi kraĉas post ĝin, kaj krias al ĝi:

— Dum leporĉasado unu pinta branĉo trapiku cian ventregon!

— Hej, ekkriegis tiam la Grand-Maljunulo, returniĝis, kaj komencis persekuti la flanon. Kaj la flano subite ruliĝis en kabaneton, kaj tie enŝovis sin en la bakforon. Post unu momento ankaŭ la Grand-Maljunulo ekaperis en la

kabano. Kun granda grumblado ĝi komencis serĉi la flanon, sed vere kiel ajn ĝi disturnadis ĉion, en la fornon ĝi ne rigardis, tiel do ĝi ne trovis la flanon. Ĝi grumbladis iom, poste lasis ĉion. Sed jen apenaŭ ke ĝi atingis la randon de la herbokampo, el la bakforno elŝoviĝis la flano. Denove ĝi kraĉis post la Grand-Maljunulo, kaj alkriis al ĝi:

— Fi, dum leporĉasado pinta branĉo trapiku vian ventregon!

Tiam la Grand-Maljunulo muĝegante, kiel la arbara koboldospirito. hurladante, kiel la infera nigra spirito, ĝi denove komencis persekuti la flanon. Kaj la flano rekuris en la kabanon, poste tra la fajrujo suprenrampis al la ekstera aperturo de la kamentubo kaj tie eksidiĝis, Krude eniris la kabaneton la Grand-Maljunulo, komencas serĉi la flanon. Ĝi furiozadas, sed la flanon nur ne trovas! Ĝi disrompas la fornon, disrompas la fajrujon, deŝiras la planktabulojn, sed la flanon trovas nenie. Ĝi ekdecidas, tre kolerante forkuras. Kiam ĝi tiel kuras, foje nur rimarkas leporon. Kiam ĝi ekvidas ĝin, tuj eĉ komencas ĝin persekuti, kiam pinta branĉo... kaj la Grand-Maljunulo, per ĝia ventrego jam tie pendas trapikite sur la flanko de arbotrunko!

Kaj la flano dumtempe denove nur ekvojaĝis. Ĝi ruliĝis, ruliĝis, ruliĝadis antaŭen. Ĉu dum longa tempo ĝi ruliĝis, ĉu dum mallonga tempo ĝi ruligis, foje nur atingis unu malsatantan familion. Tiuj havas nenian manĝaĵon. Kiam la flano alvenis al ili pli proksimen, jen ĝi aŭdas ilian malsatantan, plorantan

ĝemadon:

— Ho, Supera Ĉielo, Torem-dio-patreto, ni petegas, petas vin, donu jam manĝaĵpecon al ni! Nur almenaŭ unu malgrandan fiŝeton, unu malgrandan junan fiŝon, nur peceton da hordea aŭ faruna pano!

Foje nur, kiam la flano ĉiam pli kaj pli proksimen ruliĝis al ili, aŭdiĝas ia bruo, kraketo, kiam subite ekkrias la virino:

— Jen flanpano! La Dieto el la ĉielo sendis al ni panon!

Post mallonga tempo la flamo demandas la virinon kaj la viron:

— Bona virino, bona viro, vere vi havas nenian manĝaĵon, aŭ eble tamen vi havas ion?

— Bona flaneto, dolĉa paneto, ni havas eĉ ne etan buŝprenon!

— Do tiam prenu min, kaj se vi volas min manĝi, manĝu min! — diris la flano al la viro kaj al la virino, poste daŭrigis:

— Ho kiom mi venis en la polvo de la tero, en la malpuraĵo de la vojo, ĝis kiam mi atingis vin!

Tiam la homoj enportis unu ardantan kenan spliton, kaj ĉirkaŭiris, ĉirkaŭfumumis kun ĝi la flanon, poste ili surmetis ĝin al la tablo.

— Ho, — diras la homoj, — ho, bonkora Supera Ĉielo, Torem-dio-patreto, tamen vi ne domaĝis de nia buŝo la panon!

Nun do ili alsidis, kaj komencis manĝi. Kiam ili tranĉas la supran parton de

la flano, jen ili vidas: flano kun viando! Ĝia internaĵo estas plen-plena kun ĉiaspeca viando! Nun do vere ili povis manĝi-trinki!

Dumtempe ankaŭ tiuj aliuloj, kiujn forlasis la flano, ankaŭ tiuj vivadis-dormadis plu. Ĉu dum longa tempo ili vivis, Ĉu dum mallonga tempo ili vivis, la viro prenis la hakilegon grandan kiel la rangiferskapolo, poste komencis ĝin akriĝi, akriĝadi. Lia edzino demandis lin:

— Por kio vi akriĝas tiun hakilegon?

— Mi iras kaj serĉas la Torem-dieton, — respondis al li la viro.

— Kion vi volas kun la Dio? — demandis plu la virino.

— Mi volas lin distranĉi. Kie mi atingos lin, en tiu loko tuj mi distranĉos lin! — respondis la viro al la edzino.

— Kaj kial vi volas la bonan Dieton distranĉi?

— Ĉar li donis plenkabanon da gefiloj, sed manĝi ne donis al ili! — diris la homo, kaj poste prenis la hakilegon kaj ekiris.

Li iris, iradis, foje nur alvenis al viro kaj virino. Li sidiĝis al ili ĉe la tablon. Li pensis, ke eble ili nur donos al li ian mangaĵon. Li sidis iomete, sidis, poste subite nur malsate-soife eksaltis kaj kursvingiĝis. Denove li iris, iradis, iris, ĝis kiam li alvenis la finon de longa vojo tra tiu ĉi mondo kondukanta, la randon de larĝa vojo. Jen li vidas: tie staras antaŭ li ŝtupetaro kun arĝentaj ŝtupetoj, kun oraj ŝtupetoj. Kiam li ekvidis ĝin, tuj li ekdecidis: „Se mi perpiede iros plu sur

tiu ĉi longa vojo, mi ne alvenos al la Dio! Ĉar tie estas tiu ĉi per ĉiela miraklo kreita ŝtupetaro, ĉu ĝuste, ĉu malĝuste, mi nur supren rampas sur ĝi!” Kaj ekdecidinte komencis rampi supren. Li rampas, rampas, foje nur alvenis al bela regiono kun milda deklivo, arbarkovrita, bela herbokovrita kampo. Poste li iras plu. Do baldaŭ li alvenas al alta bordo, sen arbo, sen herbo kovrita. Dume oni povis vidi jam nek la komencon, nek la finon de la ŝtupetaro. Kiam li tiel rampas, foje nur ambaŭflanke aperas du homoj, kiel la rangiferoj estas jungitaj al glitveturilo. Ili demandas lin:

— Maljunulo, kial vi iradas ĉi-regione?

— Mi serĉas la Dion, kaj kiam mi retrovos lin, tiumomente eĉ distranĉos lin! — respondis al ili la homo.

— Kial vi volas la Dion distranĉi? — demandas ili la homon.

— Pro tio, ĉar la Dio donis al mi plenkabanon da gefiloj, kaj manĝaĵon li ne donas al ili!

— Homo, jen ni donos al vi! — ekparolis nun la du aliaj, kaj tiam unu el ili elpenis unu juglando, kaj donis ĝin al li.

— Nu, kaj kion mi faru kun tiu ĉi juglando? — demandis la homo. Kaj tiuj prenis ĝin de li, disrompis ĝin, kaj montris al li, ke ĉiuspeca manĝaĵo-trinkaĵo, kiu nur ekzistas sub la ĉielo: frosta lardo, fandita graso, blanka pano, tritika flano, ĝi estas tutplena kun ili! La homo nun rericevis de ili la juglandon, kaj

preparis sin hejmen.

Antaŭ ol li estus ekirinta, tiuj du aliaj diris al li:

— Dumvoje, se vi alvenos al la domo de tiu viro kaj virino, ĉe kiuj vi estis dumvoje ĉi tien, nun ne eniru al ili!

Iris la homo, iris, iradis. Foje nur li alvenis al la domo de tiu viro kaj virino, ĉe kiuj li estis antaŭe. Ilia ĉirkaŭaĵo estas nura fulgo, balaaĵo, malpuraĵo. La homo volas preteriri la domon, sed poste tamen li ekpensas, kaj diras en si:

— Jam mi tamen eniras al ili por ioma tempo!

Tiam li returniĝis, kaj eniris en ilian domon. Li salutis ilin, poste sidiĝis. Kaj tiuj tuj komencis al li prepari por manĝi-trinki. Kiam la manĝaĵo estis preta, ili altabliĝis.

— Kie vi estis? — demandas la homon la mastro.

— Mi serĉis iom da manĝaĵo, — respondas al li la homo.

— Nu, kaj vi trovis ion?

— Mi pensas, ke mi trovis ĝin, — respondis la homo. — Du bonaj animoj donis al mi ion.

Tiam li elŝovis la juglandon el sia ganto, kaj montras ĝin al ili. Tiuj diras al li nenion, nur komencas manĝi. Foje nur sentas la homo, ke li devas eliri. Dum li forestas, la virino diras al sia edzo:

— Edzo, tie en la malsupra parto de la kesto estas juglando, alportu ĝin ĉi

tien, por ke mi interŝanĝu ĝin kun tiu ĉi juglando! Kaŝe la juglandon ili vere ŝanĝis. Kaj la homo revenis, sin gantis, kaj ekiris hejmen.

Li iris, iris, ĝis tiam li iris, ĝis kiam li alvenis hejmen. Liaj gefiloj jam de malproksime kuris antaŭ lin plaĉe:

— Paĉjo, paĉjo, ĉu vi alportis al ni ion? — ili demandis sian patron.

— Mi pensas, ke mi alportis ion! — respondis al li la patro, kaj kun granda bruo li disrompis al ili la juglandon.

Jen li vidas: estas en ĝi nenio. Tiel staris tie la homo, kvazaŭ li estus estinta vangofrapita!

— Ha, — krias li, — tiuj du homoj kiel min trompis!

Tiam li tuj returniĝis, komencis kuri returnen. Ĉu dum longa tempo li kuris, ĉu dum mallonga tempo li kuris, li alvenis al la domo de tiu viro kaj de virino, kie li estis antaŭe. Li eniras al ili, atendas, ke eble ili prezentos al li ion. Sed vere ili prezentis al li eĉ ne la ŝajnon de la manĝaĵo! Eksaltas tiam la homo, kaj iras plu. Li iras, iradas, foje nur li denove alvenas la ŝtupetaron kun arĝentaj ŝtupetoj, oraj ŝtupetoj, kaj komencas ĝin suprenrampi. Li alvenas unue al la deklivoj kun arboj, al la herboriĉaj montetoj. Poste li rampas plu, supren al la kalva bordo, kie troviĝas nek arbo, nek herbo. Kiam li tiel rampas, denove nur kiel oni jungas la rangiferon el du flankoj, aperas ĉe li la du homoj. Sed ne la samaj, kiuj estis antaŭe, sed iaj du aliaj. Sed ili havis feliĉon, ke ili ne venis, ĉar

la homo estus estinta tuj ilin distranĉinta! Ankaŭ tiuj ĉi demandas lin:

— Kien vi sin direktas, bona maljunulo?

— Mi serĉas la Dieton, — respondis al ili la homo.

— Kaj por kio vi bezonas la Dieton? — demandas ili denove.

— Por tio, ke kie ajn mi trovos lin, mi tuj lin distranĉos per mia hakilego!

— Kaj kial vi volas lin distranĉi?

— Ĉar li donis plenkabanon da gefiloj, sed manĝi ne donis al ili.

— Ej, maljunulo, se vi nur tion bezonas, ni donas al vi! — ekkriis la du homoj, kaj prezentis al li duonan glavon, kaj donis ĝin al la homo.

— Kion mi faru kun tiu ĉi? — demandis denove la homo.

Tiam ili disrompis la glavon. Do jen la glavo estis plena kun ĉiuspeca manĝaĵo, trinkaĵo. Frosta lardo, fandita graso, blanka pano, tritika flano, kaj kia ajn mangaĵo nur troviĝis sub la ĉielo, ĉiuj estis en la glavo! Tiam reiris la homo, sed antaŭ ol estus foririnta la du aliaj, kiuj donis al li la glavon, diras:

— Sed al tiu viro kaj virino, ĉe kiuj vi estis lastfoje, neniel vi eniru!

Tiam ili foriris. Ĉiuj iris sian vojon. Iris ankaŭ la homo. Ĉu li iris longan tempon, ĉu li iris mallongan tempon, foje nur alvenis al la domo de tiu viro kaj virino, kie li estis antaŭe. Ankaŭ nun ili estis plenaj kun fulgo, balaĵo, malpuraĵo. La homo ekstaris antaŭ ilia domo, kaj komencas pripensadi:

— Kiuj povis esti tiuj du homoj, kiuj donis al mi la manĝaĵon? Eble dio, aŭ



kiu? Kaj kiel ili povus koni ĉi tiun viron kaj virinon, ke ili diris, ke mi ne eniru al ili?

Staras la homo, kaj tamen li ekdecidas:

— Ej, nur por iom da tempo mi vizitas ilin! — pensas li en si, kaj jam eĉ estas ĉe ili.

Apenaŭ, ke li enpaŝas, la viro kaj la virino tuj komencis prepari manĝaĵon. Kiam ili estis pretaj kun ĝi, ili altabliĝis. Ili manĝas, trinkas. Post la maĝo ekparolas la mastro de la domo:

— Aŭdu, kie vi estis?

— Mi serĉis iom da manĝaĵo, — respondas al li la homo.

— Nu, kaj vi trovis ion?

— Mi pensas, ke mi trovis, — diras al ili la homo, kaj prenas sian duonglavon, kaj ĝin montras al ili. Kiam ili tiel manĝas-trinkas, la homo denove nur devis eliri. Dume, kiam li estas ekstere, diras la virino:

— Maljunulo, en la malsupro de la tablo estas unu duonglavo. Iru nur, ni ŝanĝu ĝin kun tiu ĉi!

La maljunulo baldaŭ do alportis la glavon, por ke li ŝanĝu ĝin kun la glavo de la homo. Sed en tiu momento, ke li atigis la ganton, en kiu estis la glavo de la homo, elsaltis la duonglavo, kaj ĉu la viron, ĉu la virinon tuj ĝi distranĉis en pecetojn, tiel ke iliaj pecetoj kovris la tutan plankon de la domo! Revenas la

homo, kaj jen li vidas: sia glavo stranĉis la gastigantojn! Kion li povus fari, li sin vestis, kaj ekiris hejmen.

Li iris, iris, ĉu li iris longan tempon, ĉu li iris mallongan tempon, li alvenis hejmen. Liaj gefiloj jam de malproksime kriadis al li plaĉe:

— Paĉjo, paĉjo, ĉu vi alportis fine al ni ion?

— Miaj karaj, mi pensas, ke mi alportis, — respondis al ili la patro. Tiam li prenis la duonglavon, disrompis ĝin en du partojn. Do kia ajn manĝaĵo nur estis sub la ĉielo, ĉiuj estis tie en la intemaĵo de la glavo! Tuj do ili altablĝis, manĝis, trinkis. Foje nur ekparolas unu el la filoj:

— Paĉjo, pediko estas en mia ventro!

Kiam li tion eldiris, subite nur pum, kaj krevis la ventro de la knabo, eĉ li mortis en tiu momento.

Ili vivadis. domadis. Ĉu ili vivis dum longa tempo, ĉu ili vivis dum mallonga tempo, ili atingis la finon de ilia manĝaĵo. Tiam ĉiuj ekiris, kaj iris serĉi mangajaĵon. Tra tero, tra marĉo, ili nur iradis plu. En unu loko ili kolektis rubuson, en alia loko mirtelon, ili trovis, per tiuj ili forpelis la malsatmorton. Baldaŭ ili alvenis la bordon de la rivero Senger, de la rivero Mangser. Ili eksidiĝas, kaj tuj komencas fari fiŝkaptan vandon. Foje nur ili rimarkas: la fiŝo ie tranaĝas la vandon. La homo eniras la akvon, por rigardi, kie tranaĝas la fiŝo, poste kiam li paŝas unu, subite li malaperas tute! Lia edzino komencas ekkrii:

— Gefiloj, gefiloj miaj, venu nur ĉi tien! Helpu! Vian patron ekkaptis la akvo, mi eniras, serĉas lin!

Tiam post la edzo ankaŭ la virino vadis en la akvon. Apenaŭ ŝi paŝis unu, ankaŭ ŝi malaperis sub la akvo. Kaj la gefiloj, kvazaŭ vesposvarmo, komencis plori:

— Niajn patron kaj patrinon formanĝis la akvospirito!

Jen unu el la knaboj vidas: sur la malsupra parto de la baraĵo ne fiŝoj estas, sed serpentoj! Tiam ili subite prenas unu grandan hokon, kaj komencas per ĝi en la akvo frapadi, tien-reen tiradi. Foje nur ili sentas, ke io alkröĉiĝis. Ili eltiras ĝin, do kiam ĝi elmergiĝas al la surfaco, jen ili vidas: estas ilia patrino! Ŝia korpo estas tutplena kun serpentoj. Ili denove nur komencas movi la akvon per la hoko, kaj jen, ili eltiras el ĝi sian patron. Ankaŭ lian korpon kovras serpentoj!

Tiam la gefiloj siajn patron kaj patrinon lasis sur la bordo. Kaj ili mem iris plu tien, kien la malsato ilin pelis, peladis. Eĉ kun ruĝa vakcinio ili estus konten-tiĝintaj, sed eĉ tion ili trovis. Ili estus satmanĝintaj kun rubuso, sed nek tion ili trovis. Tiel ili iris, migradis, kaj fine ilin ĉiujn formanĝis la ungohavaj grandaj agloj, plumaj sovaĝaj birdoj.

Eĉ unu ne restis el ili en la vivo.

## La ekbruliga tindro

(El la regiono Konda)

Vivadis-dormadis iam iu Ekbrulig-tindra homo. Li havis strangan vivon: de kiam li naskiĝis, li vidis nek viron, nek virinon iam ajn. Tiu ĉi Ekbrulig-tindrulo foje diris en si:

— Estus jam tempo, por ke mi iru rigardi la mondon, kie viroj kaj virinoj vivas!

En tiu momento li do ekdecidis kaj ekiris, Li iris, iradis, ĝis kiam renkontis homon. La homo, en grupo, portis sep anserojn sur la ŝultroj. Alparolas lin la Ekbrulig-tindrulo:

— Ŝanĝu vian ansergrupon por mia tindrogrupo!

— Por kio estas bona tiu tindrogrupo?

— Por kio? Ties spirito estas mia helpanto, kiam mi iras al nuptofesto, aŭ en la militon, — respondis al li la Ekbrulig-tindra homo.

— Do ankaŭ mi kun la spiritoj de la sep anseroj iradas en nuptofestojn kaj en militon, — diris ankaŭ la ansera homo, sed la Ekbrulig-tindrulo ne cedis:

— Do nu ni interŝanĝu! — li instigas la alian.

— Mi do ne interŝanĝas! — respondas al li la anserulo. Tiam la Ekbrulig-

tindra homo ekblovis sur sian tindron. La tindro ekbruliĝis.

— Rigardu, mi tiel pereigas la neinvititan nuptan festantaron kaj miajn malamikojn! li diras, poste li denove komencis blovi sian tindron. Do kiel li blovas ĝin, ĉiam pli kaj pli alten supreniĝas el ĝi la flamo kaj la fajrero, supren eĉ ĝis la rando de la nigra nubo, ĝis la malsupro de la fulgomallumaj nuboj. Tiam la Ekbrulig-tindrulo kovras sian tindron per sia manplato, kiam ĝi estingiĝas en tiu momento.

— Ĉu vi vidas, — alparolas nun la Ekbrulig-tindrulo al la homo, — tamen. vi ne volas interŝanĝi?

— Sed jes, nur donu ĝin! — konsentis nun la interŝanĝon la ansera homo. Tuj li prenis la tindron de la Ekbrulig-tindrulo, kaj la Ekbrulig-tindrulo ekkaptis la anserojn, poste ambaŭ iris sian vojon. Sed antaŭ ol ili estus irintaj malproksimen, la Ekbrulig-tindrulo nutris la sep anserojn per frostigita viando, per flua graso.

— Miaj sep anseroj, ĉu vi povas nun stariĝi perpiede? — demandas nun la homo siajn anserojn.

— Kial ni ne povus? — respondas al li la anseroj, kaj efektive ili ekstariĝis sur la teron. Tiel do la dorso de la homo fariĝis pli malpeza. Nun diras la sep anseroj al la homo:

— Se vi bezonas la tindrogrupon, ni iru nur, ni repostulu ĝin de li! — kaj

do ili jam ekiris, kaj de la homo, kun kiu la Ekbrulig-tindrulo faris la interŝanĝon kun la anseroj, ili reprenis la tindron, poste ili daŭrigis sian vojon plu.

Ili iris, iradis, la Ekbrulig-tindrulo denove renkontiĝis kun iu homo. Kaj tiu ĉi portis lignan ŝlosilon sur sia kolo. La Ekbrulig-tindrulo demandas lin:

— Aŭdu. ĉu vi ne interŝanĝus kun mi tiun lignan ŝlosilon?

— Tute ne! — respondas al li la lignoŝlosilulo. — Kiel mi povus esti sen tiu ĉi ligna ŝlosilo! Se mi iras al nupta vojo aŭ en militon, ĝia spirito defendas min. Kion mi faru kun via tindro?

La tindra homo respondas al li nenion, nur surblovas sian tindron. El la tindro tiam eliĝis supren la fajreroj, ekflagras la flamoj, supren ĝis la rando de la nigra nubo, ĝis la malsupro de la fulgomallumaj nuboj .

— Kaj mi per tiu ĉi savas mian vivon, — respondis la Ekbrulig-tindrulo al la lignoŝlosilulo. — Nu, ĉu ni interŝanĝas?

— Ni interŝanĝas! — konsentis ankaŭ la homo, kiu portis la lignan ŝlosilon sur sia kolo. Do li tiel interŝanĝis.

Kiam ili disiĝis, la Ekbrulig-tindrulo demandis la lignan ŝlosilon:

— Mia ligna ŝlosilo, ĉu vi povas stari?

— Jes mi povas! — respondis al li la ligna ŝlosilo. La dorso de la Ekbrulig-tindrulo denove fariĝis malpeza. pli malpeza, ol antaŭe. Nun diras la ligna

ŝlosilo:

— Se vi volas repreni vian tindron, ni iru, ni reprenu ĝin! Do ili iris, kaj reprenis de la lignoŝlosila homo la tindron, poste, kvazaŭ nenio estus okazinta, ili iris, iradis plu.

Kiam ili iras, la Ekbrulig-tindrulo denove renkontiĝis kun iu. Kaj tiu ĉi havis sur sia ŝultro kanaban vipon.

— Ni interŝanĝu! — diras ankaŭ al tiu ĉi la Ekbrulig-tindrulo.

— Mi ne interŝanĝas! — respondas al li la kanabo-vipulo. — Se mi iradas kontraŭ malamiko, aŭ por virino, ĝia spirito defendas min.

— Do ankaŭ min tiu ĉi tindro defendas, — respondas al li la Ekbrulig-tindrulo, kaj tiam li do alblovis sur sian tindron. Ĝia fajro ekflamis ĝis la rando de la nigra nubo, ĝis la malsupro de la fulgomallumaj nuboj.

— Nu, ĉu ni interŝanĝas?

Vere ili do interŝanĝis. La Ekbrulig-tindrulo denove transdonis sian tindron, ricevante pro ĝi la kanaban vipon. La tindra homo nun demandis ankaŭ la kanaban vipon:

— Kanaba vipo, ĉu vi povas stari?

— Mi povas, — respondis al li la kanaba vipo. Do tiel la dorso de la homo denove fariĝis pli malpeza. Tiam la kanaba vipo demandis la homon:

— Ni reprenu ĝin? — kaj tiam jam ili do iris, kaj ankaŭ de la kanabo-vipulo

reprenis la tindron. Poste ili iris plu.

Iris denove la homo, iradis, poste li denove renkontiĝis kun iu homo. Tiu ĉi homo portis hakilegon sur sia ŝultro.

— Aŭdu, interŝanĝu kun mi tiun ĉi hakilegon! — alvokas ankaŭ lin la Ekbrulig-tindrulo. — Mi donas interŝanĝe tiun ĉi tindron!

— Ho, ne! — respondas al li la hakilega homo. — Se mi iras en militon, aŭ sur nuptan vojon, kiel mi estos sen mia hakilego?

— Ĉu sur milita vojo, ĉu sur nupta vojo, ankaŭ mi per tiu ĉi tindro min defendas, — diris la tindra homo, kaj li eĉ jam blovis sian tindron. Tiel forte li ĝin blovis, ke ĝia flamo tuj supreniĝis inter la nigrajn nubojn, inter la fulgomallumajn nubojn.

— Nu, do ni interŝanĝas? — li demandis.

— Ni interŝanĝas! — respondis la hakilega homo, kaj li eĉ jam prezentis sian hakilegon al la Ekbrulig-tindrulo. Tiam ankaŭ la Ekbrulig-tindrulo donis sian tindron, poste ili disiĝis. Kiam ili disiĝis, la Ekbrulig-tindrulo demandas la hakilegon:

— Hakilego, ĉu ankaŭ vi povas stari?

— Jes, mi staras! — respondis al li la hakilego, kaj la ŝultro de la homo denove malpeziĝis. Ekparolas nun la hakilego:

— Se vi volas repreni vian tindron, ni reprenu ĝin! — kaj ili do jam



reprenis la tindron, poste ekiris denove.

Ili iras, iradas, denove renkontiĝas kun iu homo. Kaj tiu ĉi kunportas bobenon da arĝenta fadeno. Ankaŭ tiun ĉi alparolas la Ekbrulig-tindrulo:

— Interŝanĝu tiun ĉi arĝentfadenan bobenaĵon kontraŭ tiu ĉi tindro!

— Mi ne interŝanĝas ĝin! — respondis la arĝentbobena homo. — Sen tiu kiel mi povos trairi sur lokoj marĉaj kaj malsekaj?

— Sed kun tiu ĉi vi pli bone prosperus! — respondis al li la Ekbrulig-tindrulo. — Jen nur rigardu!

La tindra homo tiam surblovis sian tindron: ĝia flamo supreniĝis ĝis la nigraj nuboj, ĝi suprenbatiĝis ĝis la rando de la fulgomallumaj nuboj. Tiam li ĉesis, kaj la flamoj estingiĝis.

— Nu, ni interŝanĝas ĝin? — li demandis. La alia konsentis:

— Do ni interŝanĝu ĝin! — li respondis. La tindra homo nun ĵetis la bobenaĵon sur sian ŝultron, kaj ili ekiris. La Ekbrulig-tindrulo post malmulte da tempo demandis ankaŭ la arĝentan bobenaĵon:

— Arĝenta bobenaĵo, ĉu vi scias stari?

— Mi scias! — kiam la dorso de la homo denove nur malpeziĝis. Poste ekparolis ankaŭ la arĝenta bobenaĵo:

— Se vi volas repreni vian tindron, ni reprenu ĝin!

Efektive ili denove reprenis la tindron, poste la Ekbrulig-tindrulo bele

gastigis la siajn: la arĝentan bobenaĵon, la hakilegon, la kanaban vipon, la lignan ŝlosilon: kaj la sep anserojn kun frosta viando, kun fluida graso. Tiam ili ekiris, iliaj ombranimoj foriris, kaj iliajn estintajn mastrojn ĉiujn senescepte mortigis. Poste ili iris plu.

Ili iris, iradis, foje do alvenis al la bordo de la maro. Ili sidiĝis. Sur la transa bordo de la maro estis iu urbo, la urbo de la Urba Princ-Maljunulo. Kiam ili ekvidis ĝin, ankaŭ ili komencis konstrui urbon.

La hakilego ekiris. Ĝi hakis la arbojn. Ĝi hakis, hakis ilin kaj enportis. Ĝi konstruis la unuan domon. Ĝi havis trankvilon nek nokte, nek tage. Senĉese ĝi nur hakadis, konstruis. Ĝi hakis, konstruis. Kiam la unua domo estis preta, ĝi ekkomencis la ceterajn. Ĝi kunportis la lignojn por la domoj taŭgajn, poste komencis konstrui. Kiam ĝi tiel laboras, do foje nur alvenas al li iu ĉifona homo. En kiu ajn angulo ĝi laboras, la ĉifonulo nur postiras ĝin, rigardas, kion ĝi faras. Konstante nur ĝin rigardas, tiel ke ĝi povis nenion fari pro li: ĝi erarfaris ĉu tion, ĉu ĉi tion. Tiam tagmeze la hakilego transruliĝis en la domon, en la unuan, kiun ĝi konstruis: kaj kie la mastro, la Ekbrulig-tindrulo loĝis. Do la ĉifonulo ankaŭ tien ĉi ĝin sekvis.

— Kion vi gardas ĉi tie? — demandas lin la tindra homo, poste:

— Ekataku lin, — li ordonas al siaj homoj. Tiam ili sursaltis la ĉifonulon. Unu el ili batis lin, la alia pikis lin, la tria mordis lin, la kvara vipis lin, la kvina

kunligis lin. Kiam ili ĉesis, el la homo restis nur eretoj. La Ekbrulig-tindrulo nun metis sian tindron inter la erojn, kaj surblovis. La tindro ekbrulis, ĝi brulis iom, kaj kiam la homo surmetis sian manon, ĝi estigiĝis. Tiam ili jen vidas, ke eĉ la ostofinoj de la ĉifonulo ne estas rekoneblaj. Tiel lin konsumis la flamo! Tiam la hakilego ekdecidis, kaj reiris, plu konstrui la urbon.

Post malmulte da tempo la Ekbrulig-tindrulo kune kun la arĝenta bobenaĵo ekprepariĝis kaj ekiris la urbon de la Urba Princ-Maljunulo por akiri por si edzinon, virinon. La arĝenta bobenaĵo transkuris la maron, ĝi fariĝis ponto. Kaj la Ekbrulig-tindrulo transiris sur ĝi.

Ili iris, iradis, foje do ili alvenis en la urbon de la Urba Princo. Ili aliras la domon, do ili trovas sur ĝi nek pardonon, nek fumotruon. Kiel oni povus eniri? — ili rigardadas dekstren-maldekstren. Foje nur ili rimarkas truon, tian, kian ia pego hakboras en la arbon, por ke ĝi eltiru el ĝi la vermon. Malantaŭ ia truo kuŝas sep princ-herooj kun ŝtonaj brustoj, ili gardas la domon. Tiam la arĝenta fadeno traŝovis sin tra la fendo, kaj kunligis ĉiujn sep. Post ĝi eniris ankaŭ la homo. Li trovis en la domo beltigan knabinon. Ŝi estis pli bela, ol la dornrozo, pli bela, ol la framba floro. La homo, la Ekbrulig-tindrulo, komencis ŝin logi, delogi. Li delogis, delogadis ŝin, poste kiel la malgrandan birdeton la ĉasisto, per sia trifoja delogado, per sia kvarfoja delogado delogis ŝin. Ili pensis unu, ili volis unu.

La knabino konsentis, ke ŝi fariĝu la edzino de la Ekbrulig-tindrulo. Tiam ili ekiris returnen.

Unu fino de la arĝenta fadenbulo kuris antaŭ ili, ĝi transiris la maron, denove fariĝis ponto. Kaj la homo kun sia edzino reiris sur ĝi al la transa bordo de la maro, en la domon de la Ekbrulig-tindrulo.

Dumtempe la alia fino de la arĝenta fadenglobo komencis rulvolviĝi, kunruliĝi. Kiam ĝi tiel rulvolviĝis, rulvolviĝis, unu domgardantan princheroon tiris kun si en la maron. La princheroo kion povus alian fari, li komencis kriadi. Ekaŭdis tion homo ĉeborda, kaj ankaŭ li ekkriis:

— La princheroo de la Urba Princo falis en la maron!

Ekaŭdas tion alia homo, ankaŭ li komencas kriadi:

— Eltiru la princheroon el la maro! Eltiru lin!

Kiam ili tiel kriadas, alarmas la tutan loĝantaron de la vilaĝo, la tutan urbon.

— Kio okazis? Kio estas ĉi tie? — demandadas unu la alian la homoj de la Urba Princo.

— Iu iradis ĉi tie! — kriadas unu. — u mallumokula koboldospirito!

— Li volis formanĝi nian manĝaĵon troviĝantajn sur la rostostango kaj en niaj potoj! — kriadis la alia.

— Li volis formanĝi la princon? Lin li volis ĉiel ajn kunporti! — tiel la tria.

— Tute ne! Li volis forrabi la dornoroz-belan, frambofloran princfilinon, ŝin! —diras la kvara. Iras la homoj, serĉas la princfilinon, sed ili trovas ŝin nenie! Ve, vere ŝin oni forportis!

— Nur ŝin li bezonis, ne nian vivon, —pensas nun en si la homoj, kaj ili eksilentas, trankviliĝas.

Intertempe pasis-forpasis la tempo.

Sur la transa bordo foje diras la arĝenta bobenaĵo al sia mastro:

— Armeo venas kontraŭ ni, enŝlosiĝu en vian domon!

La Ekbrulig-tindra homo tiam kune kun sia edzino enŝlosiĝis en sian domon. Per kvin seruroj faritaj el malseka ligno, per ses seruroj faritaj el seka ligno li fermis la pordon, kaj komencis atendadi. Liaj homoj restis ekstere. Foje ili vidas, kvazaŭ senfolia arbarkovrita terlango estus ekirinta kontraŭ ili, ekiris la malamiko. Iliaj remiloj kvazaŭ arboj leviĝis al la ĉielo, kaj de la multaj homoj estis tiel densa la maro, ke troviĝis sur ĝi eĉ ne eta loko por ĉerpi akvon. Kiam ili alvenis, kiel la de tempesto pelita polvonubo leviĝanta fulgo, kiel ili elleviĝis sur la bordon. Poste kiam ili atingis la bordon, tuj ili komencis hurladi. Tiam subite ekflamiĝis la tindro. Sovaĝe frapadis la flamoj, tondris, bruegadis, kiel la ĉielo, poste malrapide ili ĉesis, estingiĝis, kvazaŭ la siblosusura fajro per akvo estingata. Eble ankoraŭ ili eĉ tute ne estingiĝis, kiam ekleviĝis la grupo de la sep anseroj. Ili kradis, frapadis, poste ankaŭ ili

komencis trankviliĝi, ĝis kiam fine ilia bruado malaperis en la zumado de kuloj. Sed tiam eklevigis la ligna ŝlosilo. Ĝi blovsignalis atakon, kvazaŭ ia arbara koboldo, hurladis, kvazaŭ ia infera diablo, poste ankaŭ ĝi trankviliĝis, kaj ĝian voĉon subpremis la kuloj. Nun suprensaltis la kanaba vipo. Ĝi klakadis, hurladis, kiel la monstroj de la turniĝantaj akvoj. Poste ankaŭ ĝi eksilentis, sed eklevigis tiam la hakilego, kaj la arĝenta fadenglobo, ankaŭ ili hurladis, ŝiradis, hakadis, poste fine eksilentis ĉio. Oni povis aŭdi nur la zumadon de la kuloj .

Porpasis jam du-tri noktoj, forpasis du-tri tagoj. En la domo la Ekbrulig-tindra homo komencis aŭskulti. Li aŭskultas: estas silente. Li eliras. Jen li vidas, ke en sia urbo, kie ajn la vojoj troviĝis, kiel la arbaro sur la montodorsoj, kiel sur la deklivoj la herbo, la tero estas plena kun mortfalintaj homoj. Li aliris ilin, kaj komencis serĉadi. Baldaŭ li trovis unu pecon da arĝenta fadeno, poste li serĉadis pluen. Li ektrovis la hakilegon. Ĝia tranĉrando estis tiel breĉetiĝata, ke ĝi tute tiel aspektis, kiel ĝia dorso. Poste li denove serĉadis plu. Tiam li denove trovis unu pecon de la arĝenta fadeno, poste li trovis la kanabon de sia vipo, kaj pli poste ankaŭ ĝian tenilon. Li ektrovis ankaŭ sian lignan ŝlosilon, je nur-nuraj pecoj disrompigatan. Li komencis serĉi siajn anserojn. Li ektrovis iliajn plumojn, poste troviĝis ankaŭ unu peco da beko. Nun nur lia tindro mankis, sed fine li trovis ankaŭ ĝin. El ĝi restis nur malgranda cindriĝanta

ardaĵo. La Ekbrulig-tindrulo ĉiujn ĉi bele kolektis, kaj poste kiam jam ĉiuj estis kolektitaj, la tuton li ĵetis tra sia kapo en la maron. Tiam subite vento ekleviĝis, la maro komencis ondadi. Ĝiaj altaj ondoj ĉiam pli alten komencis frapiĝadi, kaj unu post la alia ili elĵetis sur la bordon antaŭe la tindron, poste la anserojn, la lignan ŝlosilon, la kanaban vipon, poste la hakilegon, kaj fine la arĝentan bobenaĵon. Kiam ili eliĝis sur la bordon, subite ĉiuj fariĝis tiaj, kiaj estis antaŭe.

Kiam jam ĉiuj estis ekstere sur la bordo, ili kolektiĝis. Ili ekkomencis kaj ankoraŭ tie ekstere sur la sablo de la maro dum sep tutaj jaroj ili nur trinkis brandon, dum ses tutaj jaroj ili nur festenadis. Entute ili fariĝis tiel fortaj, kiel la arbaraj koboldspiritoj, ili fariĝis potencaj, kiel la dioj.

Tiam ili eniris en sian urbon. Ili jen vidas: ankaŭ ilia urbo fariĝis granda kaj potenca. Ĝiaj finoj etendiĝis malproksimen al nordo kaj sudo.

La homoj en la festeno tiom satiĝis, ke ili eĉ nun vivas. Eĉ ankaŭ de nun ili vivos, ĝis kiam ili mortos.

Do tiu ĉi estis mia rakonto, tiu ĉi estis mia fabelo!

## **La malgranda princido kaj la urso**

(El la regiono de la rivero Konda)

Kiel, kiel ne, — kiel tio estis, estis iam riĉa, popoloza princurbo. En tiu ĉi princurbo iun tagon la princo de la urbo rimarkas: dumnokte unu post la alia malaperas liaj homoj, sed oni eĉ tion ne konjektas, ke kien.

Tiu ĉi princo havis tri filojn. Tion diras nun la patro al la plej maljuna:

— Observu jam, mia filo, kien malaperas niaj homoj!

Apenaŭ ke alvenis la vespero, la plej maljuna filo de la princo eliris al la barilo de la urbo, sin kaŝis, poste baldaŭ eĉ ekdormis. La sekvan tagon matene li ekleviĝis, reiris al sia patro, kaj diras al li:

— Mia patro, mi gardis ilin, ĉiuj ekzistas!

Eliras la princo en la urbon, jen li vidas: denove iu malaperis. Kion li povus esti farinta, la sekvan nokton li elsendis sian mezan filon por gardadi. Efektive do la meza filo eliris al la gardejo de la urbo, poste, kiam li eliris, sin kaŝis, kaj ankaŭ li ekdormis. Matene li hejmen iris, kaj ankaŭ li nur tion diris al sia patro:

— Mia patro, mi gardis ilin, ili ĉiuj ekzistas!

Denove nur ĉirkaŭrigardas la princo en la urbo, do jen li vidas: li jam apenaŭ havas homojn! Tiam la princo decidis, ke la trian nokton li elsendas



sian plej malgrandan filon por gardi.

Kaj efektive tio tiel estis. Kiam vesperigis, la malgranda princido deprenis sian glavon de la najlo, kaj eliris al la urbopordo. Li komendis vigladi. Ĉirkaŭ noktomezo foje nur alvenas la Best-Maljunulo, hirta granda urso, kaj volas eniri la urbon. Elsaltas tiam la malgranda princido, kaj kun unu frapo de sia glavo stranĉas la urson. Poste li tute dispecigas ĝin, kaj ek, li hejmen iras kaj kuŝiĝas. Do apenaŭ ke li alvenis hejmen, alĝustiĝis la pecoj de la Best-Maljunulo ekskuiĝis kaj malrapide foriris.

Matene, kiam tagiĝis sur la firmamento, ellitiĝis la malgranda princido, eniris al sia patro, kaj rakontis al li, ke dum la nokto unu granda Best-Maljunulo volis enveni en la urbon, sed li ne lasis ĝin, kaj ĉe la urbopordo li dispecigis ĝin.

Tiam la princo kaj lia plej malgranda filo ekiris, kaj eliris al la urbopordo, por rigardi la kadavron de la grand-maljunulo. Do jen ili vidas: estas tie vere nek peceto el ĝi! Anstataŭ ĝi nur longa, sanga strio vidiĝas, tiriĝas malproksimen, foren.

La prineo kaj la filo dum mallonga tempo ankoraŭ observadis, poste iris hejmen. La malgranda princido nun tion diras al sia patro:

- Mia patro, mi postiros la Best-Maljunulon!
- Kien vi irus, por ke eble dumvoje io vin manĝu?

Kiu min formanĝus? Lasu nur min foriri! — petegas la filo sian patron, poste li efektive prenas sian glavon kaj ekiras. Li iras laŭlonge, ĝisfine laŭ la sangaj spuroj de la urso-maljunulo.

Ĉu dum longa tempo li iras, ĉu dum mallonga tempo li iras, foje li alvenas al novkonstruita domo kaj novkonstruita gardejo. Kiam la knabo eniras la domon, jen li vidas: en la domo kudradas iom maljuna virino. La knabo tuj demandas ŝin:

— Diru, nuntempe vi ne aŭdis ion?

— Kion mi estus estinta aŭdi? — demandas ankaŭ la virino la knabon.

— Ĉu ne preteriris ĉi tie la Best-Maljunulo?

— Ĝi iris, preteriris, — respondas al li la virino, — nia Maljunulo preteriris, sed jam foriris. Se vi tuj ekiras, vi ankoraŭ povos ĝin ekvidi. Poste eble vi povos ĝin atingi, do tiel vi atingos ĝin, kaj se ne, do vi ne atingos ĝin.

Kiam tion ekaŭdis la princido, tuj li postiris ĝin. Ĉu dum longa tempo li iris, ĉu dum mallonga tempo li iris, denove li alvenis al novkonstruita domo kaj al novkonstruita gardejo. Li eniras, do jen vidas: en la domo virino sidadas ŝpinadante. La knabo tuj demandas ankaŭ ŝin:

— Virino, diru, ĉu ne preteriris ĉi tie la Best-Maljunulo?

— Ĵus ĝi foriris, — respondas al li la ŝpinadanta virino, — nia Maljunulo estis tiu! Se vi atingos ĝin, do atingos, se ne, do ne.

Tiam la princido ekiris plu. Ĉe la fino de la domo li ektrovis la sangan spuron, kaj laŭ tio li iris plu. Ĉu dum longa tempo li iris, ĉu dum mallonga tempo li iris, ankaŭ la trian fojon li alvenis al novkonstruita domo kaj al novkonstruita gardejo. Do kiam li eniris la domon, jen li vidas: en la malgranda dometo sidadas bela, belega, juna knabino kun ĝis kalkanoj atinganta harplektaĵo. Ŝi ŝpinadas fadenon. La knabo demandas ankaŭ ŝin:

— Harplektaĵa bela knabineto, ĉu ne preteriris tie ĉi la Best-Maljunulo?

— Ĵus ĝi foriris, — respondas al li la knabino, — verŝajne nia Maljunulo estis tiu.

— Diru nur, bela knabino, ĉu mi atingos ĝin ankoraŭ ie, aŭ mi vane penadas? — demandis la knabo la knabinon.

— Estas eble, ke vi atingos ĝin, — respondas al li la knabino, — ĉar ĝi iris sin kuraci al la bordo de la maro. Trifoje ĝi sin banos en la maro, se vi dum tiu tempo atingos ĝin, vi povos ĝin mortigi. Iru do, sed antaŭe prenu ĉi tiun fadenbulon, kaj kien ĉi tiu ruliĝas, tien iru ankaŭ vi!

Tiam la princido prenis la fadenbulon, adiaŭdiris al la knabino kaj ekiris, li iris post la fadenbulo. Kiam li tiel iras, foje nur ekaperas antaŭ li la maro. Poste, vere, sur la bordo de la maro li ekvidas ankaŭ la Best-Maljunulon, kiam ĝi tie sin banas. Tiam la knabo kaŝiras al la bordo, kaj kiam post la bano la Maljunulo elkuŝis sur la sablon, li alkuris ĝin: per unu frapo de sia glavo li

fortranĉis ĝian kapon. Forkurus jam la Best-Maljunulo ankaŭ sen kapo, sed la knabo tute ne permesas tion! Ĉiam li nur tranĉadas, distranĉadas ĝin, kaj la pecetojn li disŝutas. Poste la knabo ripozis iom, kaj laŭ la spuroj de la fadenbulo li reiris al la knabino. Ankoraŭ li ĝisfine ne alvenis, jen jam li ekkriis al ŝi:

— Mi ekstermis la Best-Maljunulon! Mi dispecigis la Best-Maljunulon! Mi disŝutis ĝiajn ĉiujn erojn!

— Nur ne tre fanfaronu! — diris tiam al li la knabino. — De tiu tempo la Best-Maljunulo jam delongtempe forkuris! Iru nur bele returnen, poste denove vi surprizu ĝin dum la bano, poste vi dispecigu ĝin je etaj pecoj, la pecetojn vi forbruligu, kaj ĝian cindron disŝutu en la venton!

Tiam la princido denove reiris al la maro. Do jen li vidas: la Best-Maljunulo tie sin banas en la akvo. Tiam la knabo rememoris la vortojn de la knabino, li atendis ĝis kiam la Best-Maljunulo elvenis el la akvo, li alkuris ĝin, kaj per unu frapo de sia glavo fortranĉis ĝian kapon. Tiam la Best-Maljunulo denove komencis kuri. Ĝi kuris, kuris, dume la knabo senĉese nur tranĉadis ĝin. Poste kiam jam li distranĉadis ĝin je pecetoj, li kunkolektis la tutaĵon, kaj li forbruligis ĝin en ardanta flamo, poste li spiris iom, kaj reiris al la knabino. Li eĉ tute ne alvenis, jam de longe tiel kriis al ŝi:

— Vidu, la Best-Maljunulon mi tamen pereigis!

— Do tre tute ne fanfaronu! — respondas al li la knabino.

— Kaj kial ne? — surpriziĝas tiam la knabo.

— Tial, ĉar vi devus esti disŝutinta ankaŭ ĝian cindron, kaj de tiu tempo la eroj de la cindro denove jam kuniĝis, kaj la Best-Maljunulo forkuris. Iru nur bele returnen, mortigu ĝin, dispecigu ĝin. Kaj ĝian cindron disŝutu ĉiudirekten!

Kion povis fari alian la malgranda princido, li denove reiris al la maro. Kiam li alvenis al tiu loko, kie li lastfoje mortigis la Best-Maljunulon, jen li vidas: sur la tero montriĝas sanga strio malproksimen. La malgranda princido tiam ekiris laŭ la sanga vojo de la Best-Maljunulo.

Ĉu dum longa tempo li iris, ĉu dum mallonga tempo li iris, li ekvidis la Maljunulon ankaŭ la trian fojon. Ankaŭ nun sin banis en la maro. Ĝi sin banis, poste ĝi elrampis sur la bordon, kaj kuŝiĝis en la sablon. Tiam kaŝaliris al ĝi la princido, kaj per unu frapo de sia glavo li distranĉis la Best-Maljunulon en trunko. Poste li distranĉadis ĝin en pecetojn, kaj faris grandegan fajron, kaj la Best-Maljunulon li bruligis en ardanta flamo, poste ĝian cindron li disŝutis ĉiudirekten. Li atendis, ĝis kiam ankaŭ la flamo disiĝis, nur tiam li ekdecidis por reiri al la knabino. Kiam li alvenis tien, li diras al ŝi:

— Nu, nun jam efektive mi ekstermis la Best-Maljunulon!

— Nu, do kiel vi faris tion? — demandas lin la knabino.

— Mi mortigis ĝin, dispecigis je malgrandaj eroj, poste la erojn mi bruligis

en ardanta flamo, kaj ĝian cindron mi disŝutis en la venton.

— Tiam do nun ĝi estas vere ekstermita! — ekkriis la knabino.

Tiam la malgranda princido kaj la knabino manĝis-trinkis, poste ili iris por dormi. La sekvan tagon ili leviĝis. Nun diras la malgranda princido al la knabino:

— Bela karulino, ĉu vi fariĝos mia edzino?

— Jes mi fariĝos, volonte, — respondas al li la knabino, poste sian malgrandan domon, vilaĝon ŝi kunruligis en formon de fadenglobo, kaj ŝi ekiris kun la knabo.

Ĉu dum longa tempo ili iris, ĉu dum mallonga tempo ili iris, foje nur ili alvenis al la domo de la ŝpinadanta virino, al la meza fratino de la malgranda juna virino, ĉar jen ŝi estis la ŝpinadanta virino. Ili eniras la domon, la virinoj salutas unu la alian. Ili interkisas dekstre-maldekstre, poste sidiĝas: manĝas, trinkas.

Kiam la malgranda princido kaj lia edzino ĝuste volas ekiri plu, ekparolas la meza pli maljuna fratino de la virino:

— Malgranda princido, lasu ankaŭ min iri kun vi!

— Venu, nur, venu! — respondas al ŝi la princido, ankaŭ tiun ĉi domon ili kunruligas, kunbobenas, kaj ekiras.

Ĉu dum longa tempo ili iras, ĉu dum mallonga tempo ili iras, ili alvenas al

la plej maljuna fratino de la edzino. Ili eniras ankaŭ al ŝi. Ili manĝas-trinkas, unu nokton ankaŭ tie dormas. La sekvan tagon poste ĝuste kiam ili sin preparas por iri, ekparolas ankaŭ la plej maljuna fratino de la edzino de la princido kaj diras:

— Malgranda princido, lasu ankaŭ min iri kun vi!

— Venu, nur, venu! — diras al ŝi la malgranda princido, tiam ĉiuj sin preparas kaj ekiras.

Ĉu dum longa tempo ili iris, ĉu dum mallonga tempo ili iris, ili realvenis en la urbon de la patro de la malgranda princido. La virinoj tre baldaŭ starigis siajn domojn apud la domo de la princo. La princo havis belan domon, sed vere la domoj de la virinoj estis pli belaj, ol la liaj.

La malgranda princido tiam eniris al sia patro. Ili interkisiĝis, interbrakumis, poste la filo diras al sia patro:

— Vi ne volis permesi, ke mi iru post la sangaj spuroj de la Best-Maljunulo. Rigardu, tamen mi iris. Poste mi ĝis tiam iris, ĝis kiam mi atingis ĝin. Tiam mi mortigis ĝin, Ĝian oston-viandon mi distranĉadis en pecetojn, poste bruligis ĝin en ardanta flamo, kaj ĝian cindron disŝutis en la venton. Kaj nun vi eliru nur, rigardu, kio estas ekstere!

Tiam la princo eliras. Li ĉirkaŭrigardas, do jen li vidas: apud lia domo viciĝas domoj eĉ pli belaj ol la lia!

— Ni iru en tiun ĉi domon, — diras la filo al la patro, — tiun ĉi havas mia edzino!

Ili eniras, poste demandas la filo sian patron:

— Mia patro, ĉu ŝi plaĉas al vi?

— Do ŝi tute ne estas malbela! — respondas al li la princo, poste ili sidiĝas, manĝas, trinkas.

Nuntempe eĉ sub la granda ĉielo ne troviĝas tiom da mangaĵo, kiom tie troviĝis tiam!

Ankaŭ mi ĉeestis. Ankaŭ mi manĝis tie, ankaŭ mi trinkis tie, — dumtempe ankaŭ mia direndo elĉerpiĝis, mia fabelo do tiel estis!



## La muso

(El la regiono de la rivero Konda)

Vivadis-dormadis iam muso. Li vizitadis la garbejon de la Urba Princ-Maljunulo, de tie li kunŝteladis, kion li ĝuste bezonis. Kiam li tiel vivadis, foje renkontiĝis kun infaneto. La bebo demandis lin:

— Muso, ĉu vi kutimis malsatadi?

— Ne, mi ne kutimis! — respondis al ŝi la muso, poste aldonis: — Mi havas belan peltan veston, sed eĉ se mi ne havus ĝin, ankaŭ tiuokaze mi povus porti multekostajn silkaĵojn, porapajn vestojn!

— Sed mi ne scias ŝteli, kaj mi havas neniun, kiu alportus ĝin al mi, — plendis nun la infaneto al la muso, kiam la muso demandis ŝin:

— Bebo, ĉu vi volus edziniĝi al mi?

— Jes mi volus! — respondis la infaneto. — Ankaŭ sen tio mi jam estas tro sata pri tiu ĉi multa necesbezono, pri la soleca mizero.

Tiam la muso kaj la infaneto do geedziĝis, kaj nun jam ili vivadis kune.

La muso ankaŭ poste iradis por ŝteli, Ĉu hordeon, ĉu sekalon kaj tritikon li kunportis, kaj ĉu silkaĵojn, multekostajn teksaĵojn. Baldaŭ ili eĉ fariĝis riĉuloj.

Sed jen rimarkis tion ankaŭ la ceteraj musoj, malrapide ankaŭ ili ekkutimis

ŝteli, tiel ke ilia tro granda malutilado baldaŭ frapis ankaŭ la okulojn de la Urba Princ-Maljunulo mem. La Princ-Maljunulo kion povus fari alian: komencis ekstermi, mortigi la musojn. En sia kolerega kolero ĝis tiome li mortigadis ilin, ke el sia gardejo sukcesis sin savi nur ununura muso, unu mizera muso.

Tiu ĉi muso, tuj kiam iom spirtrankviliĝis, eĉ tuj forkuris al la riĉa muso, kaj plendis al ĝi:

— Frato, oni mortigas nin, ĉiam nur mortigas.

— Ni kolektu armeon, kaj venĝu ilin! — proponis nun la riĉa muso.

— Sed ĉu ni havos sufiĉe da manĝaĵo? — demandis la muso la riĉan.

— Ni havos, ni havos ĝin, — respondis la riĉa muso, kaj la malriĉa forkuris, kaj kunkolektis la kunulojn, por ke ili interkonsiliĝu. Kiam kunvenis la konsilantaro, la vive restinta muso demandis la ceterajn:

— Ĉu ni voku por helpi la glitan fiŝpurigan lignotabulon, la hundorimenon. la cindrujon, la ŝtaltangon faritan el ŝtalpinglo kaj la perkofrajon?

— Ni voku ilin! — respondis al ĝi la ceteraj. Kun tio la interkonsiliĝo eĉ havis finon.

Nun la musoj komencis: ili pretigis manĝaĵon, trinkaĵon. Al sia festeno, kiel ili projektis, invitis la Urban Princ-Maljunulon. Sed antaŭ ol la Maljunulo estus alveninta, la ardantan cindrujon ili metis antaŭ la pordon, kaj la glitan fiŝpurigan lignotabulon malantaŭ la pordon. Sur la tabulon ili metis pladon da

varmega kuirita perkofraĵo, kaj sur la du flankojn la hundorimenon, la ŝtalostangon, la tranĉilon kaj la hakilegon. Poste ili envokis la Urban Princ-Maljunulon. Venis la maljunulo, venis. Do kiam li alvenis al la pordo, li enpaŝis la ardantan cindrujon. La cindro bruligis liajn piedojn, li eksaltis, kaj tiam li alfrapis sian kapon al la pordfosto. Apenaŭ li rekonsciiĝis, li surpaŝis la fiŝpurigan lignotabulon. Liaj piedoj elglitis el sub li, li mem falis surdorsen. Tiam la musoj prenis la varmege kuiritan perkofraĵon, kaj ili ŝutis ĝin en la okulojn de la Urba Princ-Maljunulo. Poste antaŭensaltis la hundorimeno kaj kunigis lin, poste elsaltis la ŝtala stango, la tranĉilo kaj la hakilego, Unu lin pikis, la alia lin hakis, la tria lin batadis, tiel ke la maljunulo eĉ tuj mortis. Nun la musoj kaptis la Urban Princ-Maljunulon, kaj el la alta gardejo ili ĵetis lin sur la mezon de, la urbo, poste ili revenis, kaj kiom ajn ili nur trovis, ĝis la lasta peco forportis kun si.

Post mallonga tempo la filo de la filino de la Urba Princ-Maljunulo rimarkis, ke oni mortigis sian avon. Li konstruis subite malgrandan dometon el latoj, ĝian mezon li plenigis kun manĝaĵo, trinkaĵo. Kaj plej supre li metis kaptilon, por ke kiu ajn eniras la domon, tuj ilin mortigu. La musoj baldaŭ antaŭflaris la libere troviĝantan mangaĵon, trinkaĵon. Tre ĝojante tuj ili do decidis: jam vere ili ankaŭ tion ekŝtelos! Ili do enŝoviĝis en la dometon. Ili enŝoviĝis, sed vere returnen jam ne povis veni, ĉar la kaptiltrabo mortbatadis

ilin unu post la alia. Antaŭe nur kvar, kvin, ses, sep, poste jam po dek, po dudek. Ne pasis multe da tempo, la trabo mortbatis ankaŭ la lastan muson!

Tiam la infaneto komencis ploradi:

— Ve, kiom da bona grengrajno vi alportis al mi! Ve, en kiel belajn vestojn vi vestis min! Amataj karuloj miaj, en kian parton de la nigra tero mi vin enterigu? Ĉu vi alportis al mi grenon? — De kie vi alportis ĝin al mi? Ĉu el la grenejo vi alportis ĝin? — Ve, mia kara, mia dolĉa, mi enterigos vin sub la piedon de la granejo! — Ĉu beron vi alportis al mi? De kie vi alportis ĝin? Ĉu de sur la kampo vi alportis ĝin? Ve, mia dolĉa, ve, mia kara, mi enterigos vin sur la kampo! — Ĉu vi alportis al mi silkaĵon, dekoraĵon? De kie vi alportis ĝin? El la angulo de la domo! Ve, mia dolĉa, ve, mia kara, sub la angulon de la domo mi enterigos vin!

Kiam la infaneto finis la ploradon, ŝi diris en si:

— Mi iras kaj serĉas por mi alian viron!

Tiam ŝi jam do ekiris.

Ŝi iris, iris, iradis. Foje nur ŝi renkontiĝis kun servistoj. Tiuj ĝuste ĉevalan strekon transportis. Kiam la servistoj rimarkis la infaneton, ili alkriis ŝin:

— Bebo, bebo! Helpu al ni transporti ĉevalan sterkon!

— Tion jam ne! — rekriis al ili la infaneto. — Sendube, por ke ankaŭ mia antaŭtuko, aŭ mia egreta tuko fariĝu malpura!

Intertempe ŝi nur iris plu. Ŝi iris, iradis, poste post iom da tempo renkontiĝis kun homoj transportantaj bovinsterkon.

— Bebo, bebo! Venu kun ni sterkon transporti!

— Tute ne! Por ke mia antaŭtuko kaj kaptuko malpuriĝu! — respondis ankaŭ al ĉi tiuj la infaneto, poste nur ŝi daŭrigis sian vojon. Ŝi iris, iris, iradis, ĝis kiam renkontiĝis kun homoj ŝafosterkon transportantaj.

— Bebo, bebo! — invitis ŝin ankaŭ ili, — venu, helpu al ni transporti sterkon.

— Sendube, por ke mia antaŭtuko kaj mia kufo malpuriĝu! — respondis ankaŭ al ili la infaneto, poste ŝi nur iris plu.

Ŝi iris, iris, iradis, baldaŭ renkontiĝis kun musovirino.

— Onklino, lasu min iri kun vi! — petis la infaneto la musovirino.

— Do nur venu! — respondis al ŝi la virino. Post iom da tempo alvenis ankaŭ la nepo de la musovirino. Kiam li enpaŝis, tuj ili portis al li manĝi-trinki, poste ankaŭ ili mem sidiĝis, manĝis, trinkis. Post la manĝo la maljuna virino diras al sia nepo:

— Etulo mia, mi trovis por vi taŭgan,

kun vi loĝantan, kun vi sur unu kuseno dormantan edzinon! — Poste ŝi sin turnis al la infaneto, kaj demandis ŝin:

— Bebo, ĉu vi volus esti edzino de mia frateto?

— Al tiu ĉi ĉasanto, al tiu ĉi laborema homo jam kial ne edziniĝus! — respondis la infaneto, kiam la nepo kaj la bebo do tuj geedziĝis.

La musoviro ankaŭ post la edziĝa festeno diligente iradis por ĉasadi. Kiam li tiel ĉasadas, foje nur diras al sia edzino:

— Mi iras al la arbara rivero por ioma rangiferembusko!

Tiam la muso faris boaton el kanaboŝalmo, sidis en ĝin kaj komencis remadi. Li remis, remis, la akvo puŝiĝis al la beko de sia boato, kaj konstante nur tion diris: „plaŭ, plaŭ, mia malgranda kanaboboato, plaŭ, plaŭ.” Kiam li tiel remadas, la homoj sidantaj sur la bordo alkrias lin:

— Muso, elvenu iom por manĝi fiŝon!

— Kian fiŝon vi manĝas? — demandis ilin la muso.

— Perkofiŝon, — respondis al li la homoj.

— La fiŝosteto pikos mian faŭkon, kaj mi devos pro tio kraĉadi! — respondis la muso al la homoj, kaj rapide remadis plu. Li remis, remis, post iom da tempo el sur la bordo denove nur oni alkriadis lin;

— Muso, venu kun ni manĝi fiŝon!

— Kian fiŝon vi manĝas? — demandis ankaŭ ilin la muso.

— Nelmo-fiŝon, — respondis al li la homoj. La muso eĉ ne ekhaltis, nur tiel dumire respondis al ili returnen:

— La fiŝosteto pikos mian faŭkon, kaj mi devos pro tio kraĉadi.

La muso nur remis, remis. Ĉe la beko de sia boato kantis la akvo: „plaŭ, plaŭ, mia malgranda kanaboboato, plaŭ, plaŭ.” Intertempe la homoj ankaŭ la trian fojon alkriadis lin:

— Muso, venu al la bordo, manĝu kun ni iomete da graseto!

— Kian graseton vi havas? — demandis la muso.

— Fiŝan graseton, — respondis de la bordo la homoj. La muso ne haltis, li nur tiel ilin alparolis:

— Ĝi estas tre varma por mi, poste eble ekdoloros mia gorĝo!

Poste la muso denove nur remis plu. Kaj la homoj ankaŭ la kvaran fojon alparolis lin:

— Muso, venu, manĝu kun ni fiŝon!

— Kian fiŝon? — demandis la muso.

— Lotaofiŝon! — respondis ili, kaj al tio li respondis:

— Mi iras, kial mi ne irus, ja miaj avoj kaj patroj manĝadis ĝian belan blankan viandon!

Kaj tiam li efektive do albordiĝis. Li aliris al la homoj, ili manĝis, trinkis. Post la manĝo la homoj demandis lin:

— Muso, kion vi pensis? Kien vi veturas?

— Al la supra fluo de mia rivero mi iras, al la supra fonto de mia rangiferrivero mi iras por iom embuski rangiferon, — respondis al ili la muso,

poste li residiĝis en sian boaton, kaj remadis plu. Ĉe la beko de sia boato pluen plaŭdis la akvo: „plaŭ, plaŭ, mia malgranda kanaboboato, plaŭ, plaŭ”.

Kiam li tiel iras, foje nur ekbruas la branĉoj sur la bordo. La muso traremas unu riverolinion, denove ili ekbruas. Li traremas ankaŭ la duan linion, la branĉoj ankaŭ tiun fojon ekbruas. Li alvenas la trian riverlinion. Tiam subite ensaltas la akvon Granda Best-Maljunulo, ĝi eltiras la muson sur la bordon, kaj kune kun la boato kaj remilo formanĝas lin.

Kaj la muso nur remas plu. Sed li vane remas: li povas antaŭeniri nek unu paŝon!

Konstante nur li restas en la sama loko: en la stomako de la urso. Embarasas la remilo la ventron de la Granda Best-Maljunulo, ĝi ekteruriĝas, eĉ doloron ĝi sentas: falas surdorsen. Tiam la muso denove nur komencas remi. Denove nur ektimiĝas la Maljunulo: en sia granda doloro ĝi falas surventren! La radiko de sia koro jam tiel doloras, ke ne scias kion fari!

Kaj la muso intertempe prenis la tranĉilon de sur sia femuro, kaj komencis ĝin akriĝi. „pas, penj, vi akriĝu, pes, penj, vi akriĝu!” — aŭdiĝis el la stomako de la Granda Best-Maljunulo.

— Muso, kion vi faras? — demandis la Granda Best-Maljunulo.

— Proksimiĝas mia morto, mi nur grincigas miajn dentojn, — respondis la muso, kaj li nur akriĝis plu sian tranĉilon. Kiam la tranĉilo jam fariĝis sufiĉe



akra, li distranĉis per ĝi la ventron de la Granda Best-Maljunulo, kaj tra la truo per tranĉilo farita, li elsaltis antaŭ ĝin, kaj diris al ĝi:

— Granda Best-Maljunulo, formanĝu min ankoraŭfoje!

— Ja ĵus mi formanĝis vin, — respondis al li la Maljunulo, kaj tamen ĝi ekkaptis la muson, kaj formanĝis lin ankaŭ la duan fojon. Tiam la muso formordŝiris la radikon de ĝia koro, tiel ke la koro de la Maljunulo tuj eĉ elfalis sur la teron. Post la koro de la Granda Best-Maljunulo elŝoviĝis ankaŭ la muso, poste li prenis sian tranĉilon, antaŭe li senhaŭtigis la Grandan Best-Maljunulon, kaj ĝin reordigis. Finfine li metis la felon en sian boaton. La felo estis granda, malgranda la boato, la muso preskaŭ nek lokon estus trovinta por si en ĝi. Pro tio li alligis al sia boato longan trunkon per la akvo alportintan, kaj komencis bele malsupreniĝi hejmdirekten.

Li malsupreniĝas, malsupreniĝas, la homoj manĝantaj lotaofiŝon denove nur vokas lin, sed li eĉ ne rigardetas ilin, nur iras plu. Li iras, iras, alvenas al la fiŝograsmanĝantaj homoj, ankaŭ ili vokas lin, sed li eĉ ne rimarkas ilin, nur iras plu. Li forlasas ankaŭ la nelmofiŝmanĝantojn, kaj jen jam li aŭdas, ke vokas lin la perkomanĝantoj:

— Muso, venu sur la bordon, manĝu jam kun ni!

Sed li eĉ ne alrigardas ilin, nek respondas al ili, nur iras plu. Dume li pensas en si: „Fi, eĉ ke mi manĝu el ilia malpura, ostethava fiŝo!” Poste li nur iras plu.

Li iras, iradas, foje nur alvenas hejmen. Li haltas en sia haveno, kaj komencas kriadi:

— Ŝoojvojaa, ŝoojvojaa, mi faligis Grandan Best-Majunulon, ŝoojvojaa! Onklino, ŝelolavujon alportu, ŝoojvojaa!

Ekaŭdis tion lia onklino, ŝi prenis subite lavujon faritan el ŝelo de pino. Ŝi portis ĝin al la akvo kaj diris:

— Aĉa bubo de sia patro! Tiu ĉi neniam venis ĉidirekten, kial vi alportis ĝin ĉi tien?

Poste ili prenis la Maljunulon, metis ĝin inter la pinokruston, ili portis ĝin en la domon. En festeno kutiman lokon ili faris por ĝi. Per manĝaĵoferaĵo gastigis ĝin, poste la nepo prenis la cignokolan harpon, kaj komencis sur ĝi ludi. Dum li ludis, lia onklino dancis. Poste la knabo demetis la muzikilon, nun la virino prenis ĝin en sian manon, kaj la nepo komencis danci. Li dancis, kantis, konsolis, repacigis la maljunulon:

*Kama-borda Soper-knabo,  
Mort-kampara Soper-filo,  
Kun la juna etamiko,  
Mi alvenis en festenon:*

*Sur dancloko Best-Oldula  
Danci mian dancon,  
Sur ludloko rangifera  
Ludi mian ludon.*

*Urs-Oldulo estas mi,  
Dancon mian dancas.  
Rangifero estas mi,  
Artece mi paŝas.*

*En ĝangalo strobilfala  
Kama-borde mi vivadis,  
La arbuston berohavan  
Mort-kampare mi serĉadis.*

*Urs-Oldulo estas mi,  
Dancon mian dancas.  
Rangifero estas mi,  
Artece mi paŝas.*

*Kiu staras riverborde?  
Kaj rigardas profundakven?  
Fajrobrula lignoŝtipo?  
Lignotrunko karbiĝinte?*

*Urs-Oldulo estas mi,  
Dancon mian dancas.  
Rangifero estas mi,  
Artece mi paŝas.*

*Vujo, vujo! — brava viro,  
Best-Oldulo, — jen estas mi,  
Mi rigardas, vidas ĉion,  
La justulon gardas mi.*

*Urs-Oldulo estas mi,  
Dancon mian dancas.  
Rangifero estas mi,  
Artece mi paŝas.*

*Birdo flugas, nukso falas.  
Dise flirtas milda vento.  
Baptan-pego vermon volas,  
Kruston frapas ĝia beko.*

*Urs-Oldulo estas mi,  
Dancon mian dancas.  
Rangifero estas mi,  
Artece mi paŝas.*

*Jen la fino de la kanto,  
Finiĝas mia fabelo.  
Kiel nukso en la ŝelo,  
Restu mia rakonteto!*

## **La sep-zibelojn alta kupra fera koboldo**

(El la regiono de la rivero Konda)

Vivadis-dormadis foje du gefratoj. Unu el ili estis knabo, la alia knabino. La knabo estis sur vasta regiono fama ĉasisto. Se li foje celis iun beston, tiu certe ne povis rifuĝi! Sed eĉ riĉa estis la knabo! Lia tenejo estis tiom plene per peltoj, ke la vostoĵoj de la peltoj sciuraj kaj zibelaj elpendis al la korto tra la breĉoj de la tenejo.

Foje, antaŭ ol la knabo estus irinta ĉasi, li aliris la fratinojn kaj tiel ŝin alparolis:

— Se mi foriras, metu kuiran junan rangifervirkapon ĉaspafitan en printempa ĉasado dum elburĝoniĝo de folioj!

Tiam la knabo do foriris, por ke li lokigu kaptilojn ĉien, komencante de la pintoj de la arboj ĝis la radikoj de la herboj.

Dume hejme la knabino metis kuiran junan rangifervirkapon ĉaspafitan en printempa ĉasado dum elburĝoniĝo de folioj. Apenaŭ komencis boli la manĝaĵo, subite el la kamentubo ia sonoretado estis aŭdebla, kaj la knabino io ekkaptis en la aeron per sia belega harplektaĵo sep klaftojn longa.

Ĉu dum longa tempo pendis tie la knabino, ĉu dum mallonga tempo pendis

tie la knabino, kiam oni relasis ŝin sur la teron, la rangiferkapon iu manĝis, kaj el la pota elkuiro ĝis la akvo ĝis la lasta guto.

La knabino kion povus fari alian, ol ŝi elkuris en la tenejon, denove alportis rangifervirkapon ĉaspafitan en printempa ĉasado dum elburĝoniĝo de folioj, kaj rapide ŝi metis ĝin kuiri. Apenaŭ ke la manĝaĵo komencis boli, hejmenvenis ŝia frato.

— Ĉu la tagmanĝo estas preta? — demandis li sian fratino.

— Kial ĝi ne estus preta! — respondis al li la fratino. — De tiu tempo, ke vi foriris, kuiriĝis la viando.

Ili sidiĝas manĝi. La knabo sentas: estas malmola la viando. La knabino rimarkas, ke la viando ne plaĉas al la frato, kiam ŝi diras al li:

— De tiu tempo, kiam vi foriris, kuiriĝas la viando. Eĉ mi ne scias, la viando tamen restis iel iome malmola.

La sekvan tagon matene la knabo foriris rigardi la kaptilojn. Antaŭ lia foriro denove li ordonis al la fratino:

— Se mi foriras, metu kuiri por la tagmanĝo rangifervirkapon ĉaspafitan en printempa ĉasado dum elburĝoniĝo de folioj!

Tiam la knabo foriris, kaj la knabino metis kuiri en granda pota la kapon de juna rangiferviro. Apenaŭ komencis boli la akvo sur la kapo, en la kamentubo denove nur eksonoretis tiu io, kaj la knabino estis ekkaptita en la aeron per ŝia

belega harplektaĵo sep klaftojn longa.

Ĉu dum longa tempo ŝi tie pendis, ĉu dum mallonga tempo ŝi tie pendis, kiam ŝi estis reforlasita sur la teron, el la potoj estis formanĝita la mangaĵo. Tiam la knabino ankaŭ la duan fojon elkuris en la tenejon, enportis rangifer-virkapon, kaj denove komencis kuiri.

Do apenaŭ ke la manĝaĵo komencis vaporumi, jam venis ŝia frato hejmen.

Kiam li enpaŝis, denove nur tion demandis:

— Ĉu la mangaĵo estas preta?

— De tiu tempo, kiam vi foriris, kuiriĝas la viando, — respondis al li la knabino, poste ŝi elĉerpis la viandon en unu pladon, kaj ili ekkomencis manĝi. Kiam ili manĝas, diras la knabo:

— Do se de tiu tempo kuiriĝas la viando, de kiam mi foriris, kiel estas eble, ke tamen ĝi estas malmola?

— Tial, ĉar tiu ĉi estas jam la dua kuirado, — respondis al li la knabino. — Apenaŭ ke ĝi komencis boli kun la unua potoj, io min ekkaptis en la aeron per mia belega harbuklaĵo sep klaftojn longa, poste kiam tiu forlasis min, eĉ la fundo de la potoj fariĝis seka, kaj la viando estis formanĝita ĝis la lasta peceto.

La alian tagon matene la knabo ne foriris ĉasi, sed li tiel alparolis al sia fratino:

— Kiel vi faris tion hieraŭ, faru tiel ankaŭ hodiaŭ!



Poste la knabo prenis glavon, kaj sidiĝis post la pordon por rigardi. Kaj la knabino eliris en la tenejon, enportis junan rangifervirkapon, ĉaspafitan en printempa ĉasado dum elburĝoniĝo de folioj. Do apenaŭ la manĝaĵo komencis boli, el la kamentubo denove aŭdiĝis susuretado, kaj la knabino estis ekkaptita en la aeron per ŝia sep klaftojn longa harplektaĵo. Ekaperis tiam la knabo, kaj per sia glavo li eksvingis en la kamentubon. Sed ve, en tiu momento mallumiĝis la okuloj de ambaŭ, kaj senkonscie ili falis sur la teron.

Ĉu dum longa tempo ili tie kuŝis, ĉu dum mallonga tempo ili tie kuŝis, kiam ili leviĝis, ili jen vidas: sur la mezo de la planko detranĉita mano sonorilon premadas en la mankavo. Tiam la knabo kaj la knabino prenis sakon novan neuzitan, poste puran korbon. En la sakon ili metis la manon, la sakon metis en la korbon, poste ... forgesis la tuton. La knabo kaj la knabino denove nur, kiel antaŭe tio estis, daŭrigis vivadi, ĉiu el ili faris sian laboron.

Foje, kiam la knabo ĝuste vizitis siajn kaptilojn, alvenis al la knabino la Sep-Zibelojn Alta Kupra Fera Koboldo, kaj demandis ŝin:

— Knabino, ĉu vi volas esti mia edzino?

La knabino ĉu volis. ĉu ne volis, kion ŝi povus alian fari, fariĝis lia edzino.

La knabo sciis pri tio nenion. Eĉ tion li ne ekrimarkis, ke la fratino gravediĝis.

Intertempe pasis-pasadis la tempo, kaj kiam tio devis okazi, la knabino

naskis belegan filon. Sed eĉ tion ne eksciis la knabo, ĉar la knabino envolvis la bebon en kovrilon, kaj kiam ajn la knabo hejmen venis, ŝi kaŝis ĝin antaŭ li post la apertan kamenon. Foje la knabo malsate alvenis hejmen, kaj pensis en si: »Ej, se eble troviĝas ie iom da graso, aŭ peceto da blanka frosta lardo!» — kaj li komencis serĉadi. Kiam li tiel serĉadis, foje nur li etendis la manon post la apertan kamenon kaj ekkriis:

— Kara mia fratino, karega mia fratino, kion kaŝendan vi havas antaŭ mi?

— Ve, mi timis, ke vi ekkolerus! — kriis la knabino.

— Tute mi ne koleras, tute mi ne koleras! — respondis al ŝi la knabo, kiam la knabino elvolvis la infanon. Tiel eksciis la knabo, ke kian pli junan fraton li havas. Poste ili daŭrigis kutime vivadi.

Ĉu dum longa tempo ili vivadis, ĉu dum mallonga tempo ili vivadis, foje la knabo iris rigardi, kion kaptis liaj kaptiloj troviĝantaj sur la arbopintoj, kuŝantaj inter la herboj. Dum li forestis, la bebo komencis plori, sed tiel forte, ke kion ajn faris la patrino kun li, konstante nur ploris plu. Li ploris, ploris. Tiam lia patrino ekpensis, kaj por eksilentigi la infanon, ŝi prenis la korbon, elprenis el ĝi la sakon, el la sako la manon kun la sonotileto, kaj donis ĝin al sia filo. La filo tiam tuj eksilentis, poste prenis la manon, kaj supren ĵetis ĝin ĝis la nigraj nuboj. Do jen en tiu momento ekskuiĝis la sep randoj de la sin tenanta ĉielo, ektondris la sep borderoj de la sin pendiganta ĉielo. Ĝi tondris, retondradis,

poste „tin, tin, tin” — eksonis de ie denove la sono de la sonorileto, kaj en la domo aperis la Sep-Zibelojn Alta Kupra Fera Koboldo. Apenaŭ ke li enpaŝis, ekkaptis la infanon, kaj per unu ekŝiro li disŝiris lin. Poste unu parton li ĵetis sur la internan flankon de la sojlo, la alian parton sur la eksteran flankon de la sojlo, tiel ke ambaŭ partoj tuj malaperis sen postsigno. Kiam la knabino ĉirkaŭrigardis, troviĝis jam tie nek la koboldo, nek la infano. La knabino ekploris.

Kiam ŝi tiel ploradas, foje nur ekpensis, ke de tiu tempo jam devus esti veninta de longtempe ankaŭ ŝia pli maljuna frato. Ŝi ekleviĝis kaj elkuris sur tiun vojon, de kie ŝia frato kutimis veni. Apenaŭ ii rigardis iomete, aperis ŝia pli maljuna frato poste post iom da tempo ankaŭ la hundo de ŝia pli maljuna frato. Trankviliĝas tiam la knabino, rekuras en la domon, kaj plue nur atendadas. Ŝi atendas, atendas, sed ŝia pli maljuna frato nur ne alvenas. Denove nur ekrigardas la knabino, do jen ŝi vidas: sia pli maljuna frato nur staras sur la sama loko, kie li estis antaŭe! Tiam la knabino alkuris lin. Ŝi alvenas al la hundo de la knabo, ekprenas ĝin: la hundo subite komencas bruadi. Kaj jen la knabino vidas, ke ĝi eĉ jam ne hundo estas, nur ĝia felo pajloŝtopita! Nun ekprenas la knabino la manon de sia pli maljuna frato, kiam ankaŭ sia pli maljuna frato komencas bruetadi. Kaj li estis ŝtopita kun fojno. Ej, denove nur komencis plori la knabino, poste hejmen kuris, plektis silkoŝnuron etfingre

dikan, metis ĝin sur sian kolon, kaj sufokigis sin per ĝi.

Tiel tio okazis, ankaŭ mi tiel tion aŭdis! Tiel tio okazis, pro tio ankaŭ mi tion rakontis.

## La vulpo kaj la junulo

(El la regiono de la rivero Tavda)

Vivadis-dormadis iam maljunulo kaj maljunulino. Ili havis ankaŭ filon: li nomiĝis Nekete Posata.

Do kiel pasis-pasadis la tempo, antaŭe mortis la maljunulo, poste post iom da tempo, mortis ankaŭ la maljunulino. Kaj ilia filo restis sola. La gemaljunuloj ne postlasis al li en la provizejo alion, nur unu poton plenan kun butero. La filo kion povus alion fari: sidiĝis en la fenestron, kaj komencis malĝojadi.

Do kiel li tiam malĝojadis, foje nur trakuris tie unu lupu kaj hop! — ĝi falis en la fosaĵon. La knabo aliris ĝin, do jen li vidas, ke la lupu en la fosaĵo lekadas la buteron. Ege ekkoleris la knabo, tuj li volis mortbati la lupon. Tiam la lupu ekparolas kaj diras:

— Ne mortbatu min.! Se vi lasas mian vivon, mi havigos al vi belan, junan edzinon!

— Vi, vi nur volas min trompi, por ke mi forlasu vin, — respondas la knabo dubante al la lupu.

— Tute ne! — asertadas tiam la lupu, — vere mi havigos al vi edzinon!

Tiam la knabo forlasis la lupon el la fosaĵo. Kaj tiu forkuris, tiel ke la knabo

nek eĉ la formon ĝian iam vidis. La knabo tiam residiĝis en la fenestron. Kiam li tie sidadas, foje nur trakuris tie granda hirta urso. Suprite aŭdiĝis ega ululado, kaj la maljunulo jam tie sidis en la fosaĵo. La knabo aliras ĝin, kaj la urso komencis petegi:

— Knabo, filo de homo, forlasu min libere! Mi havigos al vi belan junan edzinon!

La knabo kredis la vorton de la urso, kaj tiel respondis al ĝi:

— Se vere vi havigos al mi edzinon, mi forlasos vin.

— Mi havigos, mi havigos ŝin, — respondis la urso, kaj tiel la knabo forlasis libere la maljunulon. Poste li eĉ ne revidis ĝin iam!

Tiam la knabo denove residiĝis en la fenestron. Li sidadis, sidadis, ĉirkaŭ vespero jen li vidas: venas vulpo. Poste, ekfalego, kaj la vulpo jam estis en la kaverno. La knabo aliras, do jen la vulpo lekadas la buteron! Tiam ekkoleras la knabo, subiras en la kavernon, ekkaptas la vulpon:

— Vulpo, mi nun mortbatas vin! — li diras al ĝi. Sed tiam ekparolas ankaŭ la vulpo:

— Ne mortbatu min! — ĝi petegas la knabon. — Se vi forpermesas min, mi havigos al vi edzinon!

— Kaj kiel? ĉu vi pensas, ke oni povas min trompi konstante? — ekkriaĉis la knabo al la vulpo. — Trompis min la lupu, trompis min la Urso-Maljunulo.

Promesis ankaŭ ili belan knabinon, edzinon, poste mi ne vidis eĉ ilian formon de tiu tempo. Ne, vulpo, vin jam mi ne forlasas.

Apenaŭ ke la knabo tion elparolis, eĉ jam komencis pripensadi en si, kaj fine tiel alparolis la vulpon:

— Vulpo, aŭdu, tamen mi forpermesos vin libere, Sed vere havigu al mi edzinon!

— Mi havigos, — promesis denove la vulpo. Tiam la knabo forpermesis ĝin el la kaverno, kaj laŭ la peto de la vulpo ili ekiris kune al la rando de la vilaĝo, en malgrandan kabanon. Kiam ili alvenis tien, ekparolas la vulpo kaj diras:

— Mi eksvingas unufoje per mia hakilego, kaj jam belaj, belegaj vestoj alvenos!

Do efektive tiel eĉ okazis. La vulpo svingis unufoje en la aeron per la hakilego, kiam la tuta kabano fariĝis plena kun vestoj. La knabo sin vestis laŭplaĉe, poste laŭ la ordono de la vulpo li sidiĝis sur ĝian dorson, kaj jam ili ekkuris. Do kiam ili tiel kuregas, foje nur ekparolas la vulpo:

— Se vi ekvidos, ke iu nin persekutas, vi nur ŝiru el mia vosto unu haron!

Apenaŭ ke tion elparolis la vulpo, la knabo rerigardis: diablo postkuras ilin.

— Ej! — ekkrias nun la knabo. — Diablo persekutas nin, eĉ tuj nin formanĝas.

— Elŝiru rapide unu haron el mia vosto! — ordonis la vulpo la knabon. La knabo tiam elŝiris unu haron el la vosto de la vulpo, kiam la diablo subite postrestis ilin. La vulpo kaj la knabo kuris nur plu. Post iom da tempo la knabo denove rerigardas!

— Venas, venas, denove nur venas la diablo, — li diras al la vulpo.

— Se ĝi alvenas pli proksimen, tiam vi nur elŝiru unu haron!

Kaj la knabo vere tiel faris. Kiam la diablo alvenis pli proksimen, la knabo elŝiris unu haron el la vosto de la vulpo, kiam la diablo jen jam la duan fojon postrestis ilin. Kaj ili nur iris plu, ĝis kiam nur denove ekkriis la knabo:

— Ej! — li diras, — ĉe niaj kalkanoj estas la diablo! Ĝi ekkaptos nin!

— Rapide ŝiru el mia vosto! — krias ankaŭ la vulpo, kaj la diablo definitive postrestis de ili.

Kiam ili tiel iras, foje la vulpo nur alkuras kun la knabo al domo, al la domo de tre riĉa homo. Ili eniras. La vulpo tuj aliras kaj diras:

— Riĉa homo, ni venis por via filino! Tiu ĉi knabo volas esti via bofilo.

Ekparolas tiam la patro de la filino:

— Ĉu tiu ĉi knabo? Tiu ĉi estus la fianĉo? Tiel aspektas iu fianĉo?

— Vi estas prava, — diras la vulpo, — pri/ lia vesto ni povas paroli, sed alimaniere li plaĉos ankaŭ por vi!

— Li verŝajne povas esti tre riĉa, se tio tute ne vidiĝas sur lia vesto, —



konsentis la patro de la filino la peton de la vulpo, kaj li alpromesis al la knabo sian filinon.

Sed tiam jam ekkuraĝiĝis ankaŭ la knabo: tiel ke entute, eĉ tie en la domo de sia bopatro ili aranĝis la nuptofeston. Poste la gejunuloj, — kiel tio eĉ decas, — hejmen iris en la domon de la knabo.

Ili do alvenis. Ili eniras la malgrandan kabanon, Hej, sed ne plaĉas al la edzineto post la riĉa domo de sia patro la malgranda kabano de sia edzo, kaj simple ŝi ekploras:

— Konsentu, — ŝi diras al sia edzo, — por ke ni reiru en la domon de mia patro!

La knabo eĉ tre baldaŭ konsentis: ili reiris en la domon de sia bopatro. Poste ili tie komencis vivadi-dormadi, kaj estas eble, ke tie ili vivadas-dormadas eĉ ĝis la hodiaŭa tago!

## Mirinda historio

(El la regiono de la rivero Tavda)

Iam iu homo iris por ĉasado. Dumvoje baldaŭ li trafis al sovaĝa rangifero. Li ekdecidis, alpafis ĝin. La rangifero teren falis. Tiam la homo aliris ĝin, prenis sian tranĉilon, kaj tratranĉis per ĝi la gorĝon de la rangifero. Li senhaŭtigis ĝin, kaj ĝian viandon dispecigis en grandan kaldronon. Kiam jam la viando komencis boli, subite fariĝis ege granda turnovento, la kaldrono renversiĝis kaj la sovaĝa rangifero elsaltis el ĝi. Ĝi elsaltis kaj forkuris. La homo miris-miregis, kunfrapis siajn manojn. kaj tiel ekkriis: Miraklo! Miraklo!

Poste li iris-reiris ankoraŭ foje, poste li kuris hejmen en sian vilaĝon. Li eniris la plej ekstremman domon, kaj tuj li komencis, komencis rakonti al la mastro de la domo:

— Mi, — diras la rangiferĉasisto, — mi vidis miraklon.

— Kian miraklon vi vidis? — demandas lin la mastro.

— Mi iris en la arbaron. Foje nur kuris antaŭ min rangifero, sovaĝa rangifero. Mi alpafis ĝin, la rangifero terenfalas. Tiam mi fortranĉis ĝian kolon, senhaŭtigis ĝin. Kaj ĝian viandon mi dispecigis en kaldronon, poste mi metis la tuton kuiru. Kiam jam la kaldrono en pleja pleno bolis, estiĝis subite unu

turnovento kaj renversis ĝin. Tiam la rangifero elsaltis el ĝi kaj forkuris!

— Do al vi ankaŭ tiu ĉi estas miraklo? demandas la vilaĝfina mastro, Iru do en la supra ekstremo plugas homo. Li havas du ĉevalojn, vi ekkonos ilin. Unu el ili, la virĉevalo, estas ĉe la aperta kabano ligita, kaj la alia, la ĉevalino plugas al li.

Kaj la rangiferĉasisto do ekiris tien, Jen, li vidas, ke sur la supra ekstremo vere plugas homo. Unu el liaj ĉevaloj staras ĉe la aperta kabano kun alligita kapo, kaj la alia tiras la plugilon. Li iras pli proksimen, ĝentile lin salutas, poste diras:

— Mi ... vidis miraklon!

— Aŭdu, — respondas al li la pluganta homo, — se vi eĉ vidis miraklon, mi ne povas halti dum plugado. Se vi havas ion preparolendan, venu ĉi tien post mi en la sulko, kaj tiel vi tion rakontu, kion vi volas diri!

Kaj efektive la ĉasista homo tiel faris, li stariĝis en la sulkon kaj komencis:

— Mi iris ĉasi. Mi renkontiĝis kun sovaĝa rangifero. Mi alpafis ĝin, la rangifero terenfalas. Mi tratanĉis ĝian gorĝon. Poste mi senhaŭtigis ĝin. Ĝian viandon mi metis en kaldronon, kaj mi metis la tuton kuiri. Tiam subite venis turnovento, kaj renversis la kaldronon. La kaldrono renversiĝis, kaj la rangifero elsaltis el ĝi kaj forkuris.

— Ankaŭ tio ĉi estas por vi miraklo?! Se vi volas aŭdi pri miraklo, mi

rakontas al vi miraklon, — diras tiam la pluganta homo, kaj eĉ jam li komencas: — Mi havis edzinon. Foje mi iras hejmen el la laboro, jen mi vidas: mia edzino kaj iu fremda homo ĉirkaŭbrakuminta unu la alian kuŝas sur la lito. Kiam mi enpaŝas, la edzino ekleviĝas, ekkaptas bastonegon, ekbatas mian kapon, kaj diras: „Ĝis nun vi estis viro, fariĝu nun vila nigra hundo!” Kaj efektive mi transformiĝis en hundon. Poste ili eĉ forpelis min el la domo. Kaj mi nur iris, kuradis, ĉirkaŭvagadis.

— Do foje jen mi vidas, — daŭrigis la pluganta homo, — sur la kampoj plugas la homoj. Mi alkuris ilin. Ili havis gardistan kabanon, mi komencis tion gardi. Mi forpelis de ĝi la frugilegojn kaj pigojn. Poste venis ankaŭ la homoj, ili rimarkis min:

— Jen, rigardu! — diras unu al ili. — Torem-dio sendis al ni nigran hundon, por ke ĝi gardu nian nutraĵon.

Tiam la homoj donis al mi manĝi, satmanĝi. Dum unu semajno ili restis sur la kampo, kaj mi konstante gardis ilian kabanon. Post forpaso de la semajno la homoj iris hejmen al ilia mastro. Ankaŭ mi iris kun ili. Unu el ili nun diras al la mastro:

— Torem-dio donis al ni nigran hundon, por gardi nian nutraĵon.

Ne estas falsa tiu ĉi hundo, — diras la alia, — kaj eĉ ĝi estas diligenta. Kaj kio estas ĉefe, ĝi forŝtelas nenion.

Tiam diras la mastro:

— Ni devas reteni ĝin! Donu al ĝi manĝi laŭorde!

Dumtempe forpasis la dimanĉo, la homoj denove eliris sur la kamparon. Ankaŭ min ili estus kunportintaj, sed la mastro min ne lasis. Li diris, mi devas gardi la domon. Do eĉ tiel estis. Mi gardis la domon. Komence mi estis ekstere, poste baldaŭ estis permesite al mi esti en la loĝejo. Ĉar tiutempe okazis, ke la edzino de la mastro naskis filon al sia edzo, kaj la infanon iu forŝtelis. Duafoje tio okazis. Baldaŭ la edzino naskis ankaŭ trian filon. Poste foje, — rakontas la pluganta homo, — la mamnutranta virino ekdormis ĉe la infano, kaj en la ĉambro venis fremda maljuna homo. Li aliris la lulilon, kaj prenis el ĝi la knabon. Li volis lin kunporti. Do jen kiam li ekiris kun li, mi ekkaptis la mantelon de la homo. Tiam diras la maljunulo:

— Ej, ci vila nigra hundo, forlasu min! Se ci ne forlasas min, ... se poste foje ci trafos inter miajn manojn. vere mi ne forlasos cin de tie vive!

Tiel li parolis, dume li eĉ portis la infanon eksteren. Tiam mi postiris lin, kaj sur la sojlo mi ekmordis lian tibikarnon. Forĵetas tiam la maljunulo la infanon, kaj per la fingro minacas min:

— Ej, ci nigra hundo, ci alvenos ankoraŭ inter miajn manojn! — kaj kun tio li foriras.

Kiam foriris la maljunulo, vekiĝis la mamnutranta virino. Ŝi rigardas: la

infano ne estas en la lulilo! Ŝi flamon lumigas, vekas la mastron. Ili serĉas la infanon:

— Denove do oni forŝtelis lin! Denove jam ni ne havas filon! — ili terurigaŝ dekstren-maldekstren.

Dume la knabo kuŝis apud mi, tiel ke fine ili trovis lin apud mi.

— Ej jen, la nigra hundo reprenis la infanon. — diras tiam la mastro.

De tiu tempo ili eĉ pli bone traktis min. Ili manĝigis min kun blanka pano, eĉ! kun sukero. Nokte eĉ en la liton metis min ĉe ilin por dormi. En mian kolon ili ligis oran rubandon. Unuvorte: ili tre honoris min.

Foje la mastro iris leporĉasado. Ankaŭ mi kuniris. Mi ekkaptis por li unu leporon, poste denove mi antaŭenkuris, kvazaŭ mi persekutus unu alian. Kaj mi ne postkuris alian leporon, sed hejmen kuris.

Hejme jen mi vidas: mia edzino domas kun fremda viro. Mi enpaŝas, kiam la edzino eklevigaŝ. Per la bastono ŝi denove nur batas mian kapon kaj diras:

— Ĝis nun ci estis nigra hundo, nun ci fariĝu pasero!

Kaj efektive mi fariĝis pasero. Sed nek tiel ili toleris min, forpelis min. Mi flugis ronde-ĉirkaŭe. Baldaŭ mi fariĝis tre malsata. Mi ekiris. Foje nur sur la kampo mi rimarkis kabanon. Mi surflugis ĝian tegmenton. Jen mi vidas, — diras la pluganta homo, — antaŭ la domo ĉevaloj krakmaĉas avenon. Mi alflugis sur la randon de la trogo, kaj ankaŭ mi komencis manĝi la avenon.

Dum mi tie manĝadis, preteriris du knaboj. Ili ekkaptis min, kaj portis min al ilia patro:

— Patro, ni kaptis paseron?

— Metu do ĝin ĉi tien! — diras tiam la maljunulo. — Lasu nur ĝin rigardi!

La maljunulo prenas min en sian manon, poste nur diras:

— Aa, kolombeto! Mi diris, ke ci trafos ankoraŭ en miajn manojn.

Tiam per vipo li ĝisfunde frapis min:

— Ĝis nun ci estis pasero, nun ci estos homo!

Kaj tiam mi tuj fariĝis efektive homo. Ili donis al mi manĝi, forlasis min. Por adiaŭo la maljunulo donis la vipon en mian manon, kaj diris:

— Iru hejmen! Ĝisfunde frapu per tiu ĉi vipo la edzinon, kaj dume diru tion ĉi: „Ĝis nun ci estis virino, nun ci fariĝos ĉevalino!” — Frapu la viron, kaj diru: „Ĝis nun ci estis viro, nun ci fariĝos ĉevalviro!”

Efektive mi iris hejmen, — daŭrigis la pluganta homo. — La pordon mi trovis malfemite, mi enpaŝas. Jen mi vidas: denove ili kuŝas sur la lito. Mi frapis la virinon per la vipo, dirante: „Ĝis nun ci estis virino, nun ci fariĝos ĉevalino!” Vere la virino do fariĝis ĉevalino. Mi batas la viron per la vipo, dirante: „Ĝis nun ci estis viro, nun ci fariĝos ĉevalviro!” Kaj efektive li fariĝis ĉevalviro. Tiam mi prenis la jungilaron, surmetis ĝin sur ilin. La ĉevalviron mi ligis, kaj la ĉevalinon mi jungis antaŭ la plugilon. De tiu tempo mi tiel

plugadas. Kiam la ĉevalino laciĝas, mi maljungas ĝin, mi alligas ĝian kapon, kaj kun la ĉevalviro mi plugas plu.

Poste per tio la pluganta homo finis sian historion. Kaj la rangiferĉasisto ekparolis:

— Do vere tiu ĉi estis efektive mirinda historio!



## La kupra homo

(El la regiono de la rivero Tavda)

Vivadis-dormadis iam virino kaj maljuna viro. Ili havis ankaŭ tri filojn. Foje ili plantis rapon. Kiam la rapoj jam elkreskis, ili rimarkas: iu ŝtelisto iradas en la rapejon. De sur ilia agro ĉiunokte foriĝas unu bedo da rapo.

Tiam la maljunulo ordonis al ŝia plej maljuna filo, ke li gardu la rapon. Ĉe la ekiro ankoraŭ li diris al li:

— Se vi kaptos la ŝteliston, alportu lin hejmen!

La filo foriras, gardas dum ioma tempo, poste ekenuas, foriras pli volonte al knabinaj domoj por amindumi. Nur frumatene li reiras sur la agron. Jen li vidas: kvanton de unu bedo denove nur ŝtelis iu!

Hejmen iras la plej maljuna filo, kaj diras al sia patro:

— Dum tuta nokto mi gardadis ĉe la bedoj, tamen unu bedo da rapo malgraŭ tio foriĝis!

Tiam la maljunulo la mezan filon sendis gardi:

— Iru, mia filo, — diras li al la meza filo, — gardu vi la rapon! Kaptu la ŝteliston kaj kunportu lin hejmen!

Iras la meza filo, sidiĝas sur la randon de la tero de rapo, por gardadi.

Efektive li gardadas dum iom da tempo, poste simple li ekdormas. Tagiĝas, kiam li vekigigas. Jen ankaŭ li vidas: unu bedo da rapo jen mankas. Li hejmen iras, tion diras al sia patro:

— Patro mia, mi ne vidis eĉ la formon de la ŝtelisto, tamen unu bedo da rapo denove jen foriĝis.

Nun jam venis la vico al la plej malgranda filo por gardi, kiun cetere oni nomis nur Lja-Venjeto, tio estas ke Malsaĝa Joĉjo. Tion diras al li lia patro:

— Mia filo, la rapon oni jen konstante ŝtelas. Iru, gardu do ĝin brave!

Eliras nun ankaŭ Malsaĝa Joĉjo sur la teron de rapo, li pretigas por si el branĉoj tendon. Poste li sidiĝas, rigardadas, embuskas la ŝteliston. Kiam ekestas la tempo tiel ĉirkaŭ noktomezo, sur la tero subite granda lumo ekestas: de sur la firmamento malgranda kuprohometo sur kupra ĉevalo malsupreniĝas. Eĉ lia selrando estis kupra! Malsupreniĝis la kupra homo, li alligis sian ĉevalon, poste komencis per du manoj elŝiri la rapon. Aliras tiam Malsaĝa Joĉjo, ekkaptas la kupran homon.

— Nu, nun vi venis en miajn manojn! diras li al li, poste tiel forte ekpremas la manon de la kupra homo, ke ĝi preskaŭ deŝiriĝas al la kompatindulo.

— Forlasu min! — petegas la kupra homo. — Mi neniam venos ĉi tien!

— Vere ne! Nature ke ne, Ĉar mi nun vin ne forlasas. Tia ŝtelisto ĉe ni ne troviĝas. Mi kunportos vin rekte al la princo, — diras Malsaĝa Joĉjo, kaj

kunligadas la kupran homon. Tiam la kupra homo aliras sian ĉevalon, per siaj kunligitaj manoj malligis ĝin, kaj diris al ĝi:

— Iru hejmen! Diru al mia fratino, filino de mia patro, ke mi implikiĝis en grandan malbonon!

La ĉevalo foriris, kaj Malsaĝa Joĉjo hejmen portis la kupran homon. Do kiam li enportas lin en la domon, la tuta domo subite eklumiĝis de li! Liaj pli maljunaj fratoj rigardas la kupran homon:

— Kiel bone estus, se ni povus lin porti al la princo! — ili pensas en si, sed ekparolas ilia patro:

— Kiu kaptis lin, tiu kunportu lin al la princo!

Sin vestis tiam Malsaĝa Joĉjo, li kunportas la kupran homon al la princo. Li diras al li:

— Princo! Mi kaptis ŝteliston sur la rapotero, iun kupran homon. Mi kunportis lin al vi.

Rigardas la princo la kupran homon, poste demandas Malsaĝan Joĉjon:

— Kion vi postulas pro li?

— Kovru lin per mono! Tio sufiĉos por mi, — respondis tiam Malsaĝa Joĉjo.

— Tiom eĉ ne estas prezo pro li, mi ĝin donos al vi, — respondis la princo, kaj ordonis al siaj soldatoj por ke la kupran homon kovru per mono. Kaj la

soldatoj faris tiel. Ili enportis unu kuvon da mono, kaj kovris per ĝi la malgrandan kupran homon. Tiam la kupra homo ekskuis sin, tiel ke la multega mono disŝutiĝis de li. Tiam la soldatoj ankoraŭ unu kuvon da mono ŝutis sur lin, sed li ankaŭ tiun samtiel disŝutis de si. La princo estis devigita lin ankaŭ trian fojon kovri per mono. Tiamaniere al Malsaĝa Joĉjo kolektiĝis multega mono. Do li prenis la tuton, kaj antaŭ ol la primeo povus tion pripensi, kunportis ĉiun hejmdirekten.

Tiam la princo ordonis, ke la kupran homon oni ŝlosu en la turon, poste kunvoku ĉiujn regnestrojn, reĝojn, princojn, por ke ili rigardu la kupran homon. Eble troviĝos inter ili, kiu povos diri, kie estas la regno de la kupra homo.

Havis tiu ĉi princo unu malgrandan fileton, kiu nomiĝis Johano, Johano principo. Li estis ankoraŭ tute malgranda, tia tien-reen kuranto. Li sin enŝovis ien ajn, stumblis-stumbletadis ĉie.

Foje tiu ĉi knabo komencis ludadi kun pafarko kaj sago, kaj kiel, kiel ne, li pafis sian malgrandan kupran sagon sur la supron de la turo. Antaŭe li nur rigardis ĝin dum iom da tempo, kaj poste kiam li vidis, ke li nenimaniere povas ĝin depreni de tie, ekploris. Ekaŭdis tion la kupra homo, kaj demandis lin:

— Malgranda knabeto, princknabeto, kial vi ploras?

— Pro tio mi ploras, ĉar mia kupra sago falis sur la supron de via turo, kaj

mi povas ĝin neniel depreni de tie, — respondis la princfilo al la kuprohomo.

— Kara malgranda princfilo, mi reakiros al vi vian kupran sagon, nur malfermu mian pardon!

— Mi malfermus ĝin, sed ne scias, kie estas ĝia ŝlosilo, — respondis la knabeto.

— Do nur atentu min! — diris nun la kuprohomo. — Iru do hejmen, kaj komencu ege plori. Diru tion, ke vi ekbatis vian manon, ekbatis vian piedon. Ion ajn ili promesos al vi, vi nur ploru pli ege. Nur tiam, kiam oni volas al vi doni la kupran ŝlosilon, nur tiam vi eksilentu plori. Tiam vi komencu ludadi kun la kupra ŝlosilo, poste venu kun ĝi ĉi tien, kaj malfermu mian pardon! Kaj mi redonos al vi vian sagon.

Kaj efektive la knabo tiel faris.

Li iris hejmen kaj komencis ege plori. Kiel ajn oni klopodis gajigi lin, li nur des pli ege ploris. Tiam diras lia patrino:

— Donu do al li tiun brilan kupran ŝlosilon! Lasu nur lin bruetadi kun ĝi, de tiu eble li trankviliĝos.

Tiam la servistinoj deprenis la ŝlosilon de sur la najlo, kaj donis ĝin al la fileto, kiam li efektive lasis la ploradon, kaj komencis ludi kun la ŝlosilo. Li ludadis, ludadis kun ĝi, kaj en ia malatenta momento li alkuris la turon, malŝlosis la seruron, kaj ellasis la kuprohomon. La kuprohomo nun, fidele laŭ

lia vorto, rampis sur la supron de la turo, deprenis la sagon. Li donis ĝin al la knabeto, kaj diris al li:

— Johano princido, konservu min en via memoro, kaj kiam ajn vi implikiĝas en malbonon, pensu nur pri la kuprohomo. Vi ekvidos, ke tio ne estos vane!

Kaj poste ankoraŭ li diris:

— Vivu bone, malgranda knabeto, dormu bone kara knabeto! — kaj kun tio li subite malaperis.

Intertempe alvenis la regnestroj, la princoj, la reĝoj. Estis kiu eĉ du-tri jarojn veturis, por ke nur li ekvidu la fremdan homon. Tuj kiam ili alvenis, komencis prezenti al ili brandon, sed ili diris al la princo:

— Ni ne venis al vi por brandotrinki, sed rigardi la fremdan homon. Montru lin do al ni, kie li estas!

Ordonas tiam la princo al siaj soldatoj, ke ili alportu la kuprohomon. La soldatoj foriras, eniras en la turon, jen ili vidas: anstataŭ la kuprohomo estas tie nur amaso da kupra fekaĵo. Ili reiras al la princo, raportas tion al li. La princo nun mem iras en la turon, sed anstataŭ la kuprohomo ankaŭ li nur lian amason trovas. La gastoj tiam komencas murmuri:

— Kiom da mono ni elspezis, kiom da tempo ni disipis! — (Sciu, tiam ankoraŭ ne estis fervojo!) — Ni venis ĉi tien, kaj la kuprohomo ne estas ĉi tie.

Vane ni laciĝis.

Ekkoleris tiam la princo, la gardistojn li enkarcerigis en la turon, kaj li mem diris:

— Mi mem mortpafos tiun, kiu liberigis lin!

La principido matene ellitiĝas, aŭdas: la gardistoj estas ŝlositaj en la turon. Tiam li iras antaŭ sian patron, tion diras al li:

— Mia patro, mi estas la kulpa. Mi ellasis la kuprohomon. Foje mi ĉi tie pafadis per mia arko, mia sago falis sur la turon.

Tiam mi ellasis la kuprohomon, por ke li deprenu la sagon.

La princo nun komencis konsiliĝi kun siaj saĝaj homoj.

— Kion mi faru kun mia filo? Li min hontigis antaŭ la regnestroj, reĝoj. Poste tamen li estas mia filo, ni ne povas lin senkapigi!

— Vere, ni ne povas lin senkapigi, respondas al li la saĝaj maljunuloj — sed ni jungigu tri ĉevalojn, poste kun la servisto nomita Ŝenpo sendu lin eksterlanden. Tie li poste povos iri kien ajn, kien nur li vidas.

Vere do tiel estis. La princo jungigis veturilon, ĝian supron kovrigis per korboplektaĵo, poste sian filon kune kun Ŝenpo sendis eksterlanden.

Ĉu dum longa tempo ili iris, ĉu dum mallonga tempo ili iris, la malgranda principido tre eksoifis. Ili ĉirkaŭrigardis, sed akvon nenie trovis. Ili iris plu. Post tre longa tempo ĉe la rando de vojo ili trovis profundan kavon. Sur la fundo de

la kavo estis akvo, sed ili neniel povis ĝin atingi. Nun diras la princido al la servisto:

— Aŭdu, el kio oni faras la bastoŝnuregon? Ĉu vi scius tion diri al mi?

— Jes, mi scias, — respondas al li Ŝenpo, la servisto. — De la tilio la krudan kruston oni deŝiras, poste el tio plektas ŝnuregon. Tiam ili tuj komencis, plektis bastoŝnuregon. Kiam ili estis pretaj kun tio, ekparolas la princido:

— Ŝenpo, mi tenos vian ŝnuregon, vi malsupreniĝu, alportu al mi akvon!

La servisto malsupreniĝis, sed li eĉ ĝis la akvo ne alvenis, komencis kriadi:

— Mi sufokiĝos, mi sufokiĝos! Retiru min supren!

Post tio kion oni povus fari, la princido mem malsupreniĝis. Li atingis la fundon, ĉerpis akvon en sian ĉapon, eltrinkis ĝin. Do en tiu momento li fariĝis, pro la akvo, egforta heroo. Li suprenkriis al la servisto: Tiru!

La servisto ekkomencis, poste ĉu tiris lin, ĉu ne tiris lin, kaj jen ekparolis:

— Princido, ni ŝanĝu niajn nomojn! Vi estos Ŝenpo servisto, mi estos Johano princido. Se vi ne ŝanĝos vian nomon, mi ne eltiras vin el la akvo! Sed se vi konsentos, per via propra sango skribu la kontrakton.

La knabo, kion povus alian fari, konsentis. Li ektrancis sian fingron, per sia sango skribis la kontrakton, poste suprenĵetis ĝin al la servisto. La servisto rigardis ĝin, poste suprentiris la princidon. Li diras al li:

— Nun jam mi veturos sub la korboplektaĵo, kaj vi nur sidiĝu tien sur la



sidstablon!

La pseŭda princido do sidiĝis en la korboplektaĵon, kaj la vera sidiĝis supren sur la sidostablon, kaj ili veturis plu. Baldaŭ ili alvenis en urbon de fremda princo. Ili eniris la korton de la princo, la princo mem ilin akceptas.

La fremda princo havis filinon nomitan Helena, eksterordinare belan.

La princo la pseŭdan princidon sidigis al la tablo, kaj ili komencis festeni. La princo baldaŭ komencas demandadi:

— En kia afero vi venis?

— Mi venis por peti la manon de via filino, — respondas al li Ŝenpo, la pseŭda princido. — Ĉu vi donas ŝin al mi?

— Hi donas ŝin al vi, sed mi havas ĉi tie tridek ĉevalvirojn, antaŭe vi pelu ilin sur la herbokampon, gardu ilin tri tagojn kaj tri noktojn. Se eĉ unu mankos el ili, mi detranĉigos vian kapon, kaj se nek unu mankos, mi donos al vi mian filinon.

— Mi havas serviston, li gardos ilin. Mi mem ne iros, — respondas la pseŭda princido, kaj envokas sian „serviston”.

Li diras al li:

— Pelu ĉi tiujn tridek virĉevalojn sur la herbokampon! Gardu ilin dum tri tagoj kaj tri noktoj. Poste vi hejmen pelos ilin, sed se eĉ unu mankos, mi detranĉigos vian kapon.

La princido eliras kun la ĉevaloj sur la herbokampon. Li gardas ilin, sed ege brilas la suno, li fariĝas dormema, poste baldaŭ eĉ endormiĝas. Dum li dormis, la ĉevaloj dise forkuris. Vekiĝas la knabo, vidas: li ne havas eĉ ununuran ĉevalviron! Tiam li apogis sian kapon, komencis plori. Foje nur li rememoris la kuprohomo: „Je vivas mia frato la kuprohomo. Mi bonfaris al li, savis lin de la morto.” Subite ekaperis tie la kuprohomo:

— Frateto, kial vi devas ĉagreniĝi?

— Pro tio, — respondas al li la princido, — ĉar mia ĉevalaro malaperis, kaj la fremda princo fortranĉigos mian kapon.

— Vi tute ne ĉagreniĝu! — diras al li la kuprohomo. — Sidiĝu ĉi tien post mi sur la ĉevalon, venu al ni gastigi!

Ili sidiĝis, forgalopis. Baldaŭ ili alvenis la domon de la kuprohomo. Tie unu el la fratinoj de la kuprohomo akceptis ilin. Per la mano ŝi enkondukas Johanon, poste sidigas lin ĉe la tablon. Ili manĝas, trinkas. Foje jen diras la kuprohomo:

— Nu, nun jam ni povas reiri! — poste li alparolas sian plej maljunan fratino:

— Pridonacu vian fraton per io!

Tiam la knabino donis al li tukon:

— Se vi havos ian ĉagrenon, nur flirtigu tiun ĉi tukon, kaj tuj vi forgesos

ĉion.

La principo prenis la tukon, poste ili reiris tien, de kie ili venis. Ekkrias nun la kuprohomo:

— Ĉevalviroj, ĉi tien!

Tiam la ĉevalviroj ĉiuj alkuris tien, kaj la kuprohomo ekiris hejmen.

Tiam la principo prenas la tukon, ekflirtas ĝin: de ie subite jen homoj aperis tie, unu el ili ludis violonon, la alia pinĉis kordan harpon, la tria kantis, la kvara dancis. Poste tabloj elkreskis el la tero, ili estis plenplenaj da manĝaĵoj, Nun ĉiuj sidiĝis, manĝis, trinkis, ĉirkaŭ vespero la principo metis la tukon en poŝon, subite ĉio malaperis. Kaj li mem ekpensis, hejmen pelis la ĉevalaron. Jen vidas la fremda princo, ke li havis tridek ĉevalojn, kaj nun oni repelas sesdek. „Ĉu eble la virĉevaloj naskis?!” — li pensas en si. Tiam li reiras en la domon, la pseŭdan principon li bele gastigas. Ili donas al li manĝi, trinki. Kaj pri la knabo neniu zorgas. Kion li povus alion fari, li kuŝiĝas tien en la flankon de la aperta kabano. Nur la filino de la fremda princo sendas al li iom da manĝaĵo.

La sekvantan tagon matene Ŝenpo la principon denove elsendas kun la ĉevaloj. Sur la herbokampo la ĉevaloj kuradas tien kaj reen, kaj la knabo sidiĝas, rigardas ilin. Sed foje li denove endomiĝas, kaj kiam li vekiĝas, li vidas antaŭ si jam eĉ ne ununuran ĉevalon. Li ĉagreniĝis, komencis plori:

— Nu, nun jam mi ne havos kapon. Ie vivas mia frato la kuprohomo, mi

bonfaris al li foje, foje ankaŭ li bonfaris al mi, nun jam verŝajne ankaŭ li ne povos helpi.

Do tiam subite denove tie aperis la kuprohomo, kaj demandis:

— Kial vi ploras, frateto?

— Miaj ĉevaloj denove malaperis, — respondas al li la princido.

— Frateto, vi tute ne ĉagreniĝu, eĉ ne zorgu pri tio! Venu, sidiĝu ĉi tien post mi sur la ĉevalon, ni iros al ni gastigi!

Ili sidiĝas sur la ĉevalon, forgalopas. Baldaŭ ili alvenas. La alia pli maljuna fratino de la kuprohomo elvenas, ŝi kisas ilin, enkondukas ilin. Ŝi donas al ili manĝi, trinki. Eĉ brandon ili trinkas. Foje jen diras la kuprohomo:

— Nun jam ni povas reiri! — poste alparolas sian mezan fratinton:

— Mia pli maljuna fratino, donacu ion al via frato! La knabino tiam donacas al li kesteton:

— Ekbatu ĝin, kaj vi ekvidos, kio okazos!

La princido prenas la kesteton, poste jam ili rapidas reen. Tuj kiam ili reiras en la saman lokon, de kie ili venis, la kuprohomo ekkrias:

— Alvenu, sesdek ĉevalviroj!

En tiu momento la ĉevalviroj kunvenis. Ili estas naŭdek. Tiam diras la kuprohomo:

— Vi restu ĉi tie! Se io malbona vin trafos, pensu nur pri mi, mi tuj

ekaperos.

Kun tio la kuprohomino malaperis.

Kaj la knabo ekbatis la keston. Mi ne scias, de kie: homoj alvenis. Ili demandas:

— Nia sinjoro, kion ni faru?

— Ludu, kantu, dancu! — ordonas al ili la princido. Tiam fakte unu el ili komencas kanti, la alia danci, kaj la ceteraj ludi, amuziĝi.

Kiam ili jam ĉu la tagon, ĉu la nokton traamuziĝis, la knabo denove ekbatis la keston: en tiu momento malaperis ĉio, kaj la knabo hejmen pelis la ĉevalojn. Jen la fremda princo vidas, antaŭe li havis tridek ĉevalojn, kaj nun naŭdek pelas hejmen la knabo. Li diras tiam en si:

— Tio ĉi jam vere estas mirinde! El tridek ĉevaloj fariĝis naŭdek. Tion ne povas fari unu servistoknabo, tiu ĉi povas esti nur princido!

Ili pelas la ĉevalojn en la restadejon, kaj la knabo eniras la apertan kabanon, kuŝigas sur la teron. Certe en la domo la pseŭdopricidon oni regas eĉ kun brando. Pri la „servisto” neniu zorgas, nur la filino de la fremda princo sendas al li manĝaĵon, trinkaĵon.

La sekvantan tagon matene, kiam ili ellitiĝas, diras la fremda princo al la „servisto”-knabo:

— Nu, ankoraŭ foje, lastan tagon, lastan nokton, elpelu la ĉevalojn! Sed se

nur nun el ili perdiĝos, mi fortranĉigos vian kapon.

— Preparis sin la knabo, denove elpelis la ĉevalojn tien, kie jam ankaŭ ĝis nun ili estis. Kiam ili alvenas, li kuŝiĝas. ekdormas. Ĉu dum longa tempo li dormis, ĉu dum mallonga tempo li dormis, kiam vekigis, restis al li eĉ ne unu ĉevalo. Tre-tre li malsuprenklinis la kapon, kaj komencis plori:

— Nu, tamen perdiĝas mia kapo! Mi havas ie kuprofrateton, mi bonfaris al li foje, li min helpis jam eĉ dufoje. Mi ne scias, ĉu li faros tion ankaŭ la trian fojon al mi, aŭ ne.

Apenaŭ ke li tion elpensis, la kuprohomo tuj tie aperis:

— Frateto mia, kial vi ploras?

— Kial mi ne plorus, perdiĝis miaj ĉevaloj!

— Tio estas nenio» Sidiĝu nur ĉi tien post min. ni iros al ni gastigi. Timu nenion, ĉio fariĝos bona:

Poste ili sidiĝis ambaŭ sur la ĉevalon, kaj forgalopis, Ili alvenis la domon de la kuprohomo. Nun elvenis la plej malgranda knabino por akcepti ilin. Ili deprenis la principdon de sur la ĉevalo, tiel ili portis lin en la domon. Ili tre respektis lin. Ili sidigis lin ĉe tablon, eĉ kun brando ili regalis lin!

Kiam alvenis la tempo de la ekiro, la kuprohomo diris al la princoknabo:

— Frateto, nun jam ni povas iri!

Ili eliris en la korton, tie la kuprohomo diris al sia plej malgranda fratino:

— Mia malgranda fratino, donacu ion ankaŭ vi al via frato!

La knabino tiam donis al la knabo oran ovon:

— Returnu la ovon en via mano, poste vi ekvidos, kio okazos!

Poste ekparolis ankaŭ la kuprohomo:

— Nu, miaj pli maljunaj fratinoj, vi jam ĉiuj donacis al li, nun jam mi donos al li ion.

Tiam la kuprohomo ekfajfis ege, poste ekkriis:

— Kia grizulo, mia bona ĉevalo, venu ĉi tien rapide!

La griza kuproĉevalo tiam alkuris lin, poste demandis lin:

— Kion vi ordonas?

— Mi ordonas nenion, sed mi donacas vin al mia frato, al la princoknaboj, kiel vi obeis min, do tiel obeu ankaŭ lin!

Per tio la kuprohomo donis la ĉevalon al la knabo. Poste aldone ankaŭ glavon li donis al li. Kiam la knabo prenas la glavon en la manon, jen li sentas, li fariĝis tuj tre forta! Kiam li sidiĝis sur la ĉevalon, eĉ tia rimarkinda li fariĝis, ke oni eĉ per malgranda kulero lin estus manĝinta. Tiam jam la kuprohomo diras:

— Nu, jam iru! Kiam vi realvenos al la ĉevaloj, la vian delasu. Se vi bezonos ĝin, nur ekfajfu unu grandegan, poste krii al ĝi, kaj ĝi tuj estos tie!

La princoknabo nun rerajdis al sia ĉevalaro kaj vidas: la ĉevaloj ĉiuj alestas,

tien-reen iradas. Ankaŭ li mem malsupreniĝis de sur la ĉevalo, delasis ĝin, kaj diris al ĝi:

— Iru, kien ajn vi volas! Sed se mi ekfajfas, kaj krias, tiam vi ekaperu ĉi tie ĉe mi!

Kiam la ĉevalo forkuris, la knabo prenis la ovon, returnis ĝin. Do en tiu momento el ie venis armituloj kun pafiloj, kun glavoj. Unu el ili violonludis, la alia pinĉis kordojn, la tria kantis, la kvara dancis, kaj poste ĉiuj sidiĝis kaj manĝis, trinkis.

Dumtempe foje jen la filino de la fremda princo ekpensas, jam ŝi kaŝobservas, kiel plimultiĝas la virĉevaloj! Ŝi aliras tre sekrete, ekvidas la ege multajn homojn, la legion da armituloj dancantajn, gajantajn. Terure ŝi ektimiĝas, poste diras al si:

— Tiu ĉi ne povas esti servisto, tiu ĉi nur princido povas esti! Vane diras tiu alia: Mi estas filo de princo, se tiu ĉi kun tia granda armeo foje ekiros, tio signifos la morton de mia patro.

Tiam la knabo la ovon en la mano returnis: subite ĉio malaperis. La filino de la fremda princo kuris hejmen, kaj la knabo hejmen pelis la ĉevalojn. Kie li marŝis kun la ĉevalaro, eĉ la tero tremadis. La fremda princo elkuras al li, jen li vidas, la knabo nun jam cent dudek ĉevalvirojn pelas hejmen. Li diras al si:

— Tiu ĉi ne povas esti servisto, tiu ĉi nur princofilo povas esti!



Ili enpelas la ĉevalojn en la restadejon, kaj la knabo reiras en la apertan kabanon. La fremda princo nun eniris al la pseŭdopricidon, kaj laŭ sia promesita vorto diras al li:

— Mia filino estas via.

— Do morgaŭ matene ni aranĝos la nuptofeston, — respondas al li Ŝenpo, la fianĉo.

La sekvan tagon ili ellitiĝis, sin preparis al la nuptofesto. Kiam jam ankaŭ la nupta festantaro tute kunkolektiĝis, subite jen unu letero falis en la korton. La princo komencis ĝin legi:

— Mi, la Trikapa Kobold-Maljunulo, suprenvenos el la maro. Se vi ne edzinigos al mi vian filinon. vian princolandon mi bruligos per fajro, ĝian cindron mi ŝutos en la Venton, kaj mi elskarpos viajn okulojn.

Nun le fremda princo diras al Ŝenpo:

— Iru, mia bofilo, interbatalu kun la fajra diablo! Kunportu mian filinon sur la bordon de la maro. Se vi mortbatos la diablon, mia filino estos via. Kaj se vi ne mortbatos lin, tiam do nur li kunportu ŝin, jen do ŝi fariĝu lia. Mi neniel kapablas batali kontraŭ la koboldodiablo.

Tiam Ŝenpo prenis la princofilinon, kaj ili ekiris. Ili iris nur tiel perpiede. Kaj Johano princido eliris eksteren de la urbo, ekfajfis unu grandan, kaj ekkriis:

— Mia grizulo, mia bona ĉevalo, venu rapide ĉi tien! — Tiam lia ĉevalo tuj

ekaperis:

— Kion vi ordonas, mia mastro? — ĝi demandis.

— Ni iru sur la bordon de la maro. Mi devas interbatali kun la trikapa fajra koboldodiablo, — respondis la princofilo, kaj eksidiĝis sur la ĉevalon. Dume Ŝenpo kaj la knabino alvenis la bordon de la maro kaj sidiĝis.

Kiam ili tie sidadis, el la akvo jen nur eliĝis la trikapa diablo. Tiam la „fianĉo” forkuris en la kanejon kaj sin kaŝis. Kaj la trikapa diablo ekparolis:

— Hej, ĉu vi alportis la princofilinon?

Tiam de sur la firmamento sur sia kuprogrizulo subite aperis la princofilo, kaj diris al la diablo:

— Jes, ni alportis ŝin, hej, Sed antaŭe venu, ni interbatalu!

Ili komencis, interbatalis, poste la knabo fortranĉis ĉiujn tri kapojn de la trikapa koboldodiablo per unu frapo de sia glavo. Poste li supreniĝis al sia ĉevalo. La filino de la princo alkriis:

— Venu foje en la domon de mia patro por iom manĝi, trinki!

— Mi jam multfoje estis ĉe la domo de via patro. Ankaŭ manĝis mi tie, ankaŭ trinkis mi tie, — kriis la princofilo al la knabino, poste forgalopis. Kiam Ŝenpo ekvidis, ke la knabino restis sola, li elŝoviĝis el la kanaro, kaj aliris ŝin. Tion li diras al ŝi:

— Vi hejme tion parolu, ke mi mortigis la trikapan koboldodiablon. Se vi

ne tion diros, tiam mi tuj mortbato vin per mia bastono.

— Jes, tiel tio estos, — respondis la knabino, — mi diros, ke vi mortigis lin.

Poste ili ekiris. Dumvoje Ŝenpo ŝmiris sian bastonon per sango. Hejmen alvenante Ŝenpo la sangano bastonon montras al la princo, kaj diras:

— Mi mortigis la trikapan fajran koboldodiablon.

— Morgaŭ ni aranĝos la nupton, — respondas al li la princo.

La sekvantan tagon ili denove sin preparis al la nupto. Kiam ili ĝuste aranĝas-aranĝadas, denove jen falas letero en la korton. La princo legas ĝin:

— Mi, la Seskapa Koboldo-Diablo, suprenvenos el la maro. Se vi ne edzinigos vian filinon al mi, vian princolandon mi bruligos per fajro, ĝian cindron mi ŝutos en la venton, kaj elskrapos viajn okulojn.

Tiam la princo diras al sia „bofilo”:

— Vi mortigis la trikapan fajran koboldodiablon. Se ankaŭ la seskapan diablon vi mortigos, mia filino estos via. Se vi ne mortigos lin, li denos havi ŝin.

Poste Ŝenpo kaj la filino sin vestis, denove jen ekiris. Dume ankaŭ la princofilo eliris al la rando de la urbo, ekfajfis unu grandan, kaj ekkriis:

— Mia grizulo, mia bona ĉevalo, alvenu rapide tien!

La grizulo tiam alkuris lin, demandis:

— Kion vi ordonas, mia mastro?

— Ni iru sur la bordon de la maro! Mi devos interbatali kun la seskapa fajra koboldodiablo, — respondis la princofilo, kaj supreniĝis al la ĉevalo. Ili ekiris. Subite ili reatingis la pseŭdopricidon. La princofilino kiam lin ekvidas, alkrias lin:

— Helpu al ni kontraŭ la seskapa koboldodiablo!

— Kiom koncernas min via interbatalo! — respondas la knabo, kaj tiam malaperis.

Kiam la pseŭdo-princido kaj la knabino denove atingis la marbordon, Ŝenpo sidigis la kanabinon, kaj li mem kuris direkte en la kanejon. Fakte baldaŭ alvenis la seskapa fajra koboldodiablo, kaj hurlis:

— Ĉu la princofilinon vi alportis al mi?

En tiu momento ekaperis sur sia ĉevalo la princofilo, kaj eĉ respondis al li:

— Certe ni alportis ŝin! — Per tio ili komencis la interbatalon. Ili interbatalis. La princofilo detranĉis ĉiujn ses kapojn de la diablo. Alkuras nun la knabino al la knabo, ŝi volas ekkapti la kondukilon de lia ĉevalo, sed ŝi ne atingas ĝin. Kaj la knabo plu rajdas. La knabino tiam krias al li:

— Bela heroo, brava heroo, venu foje manĝi, trinki en la domon de mia patro!

— Multe mi manĝis, trinkis jam en la domo de via patro, — respondis la

princofilo, poste kiel li venis, foriris. Li iris hejmen. Sian ĉevalon li delasis, kaj li mem enkuŝis en la apertan kabanon. Intertempe la „fianĉo” elŝoviĝis el la kanaro, kun sango li ŝmiris sian bastonon, kaj diris al la knabino:

— Diru poste, ke la Seskapa Koboldo-Diablون mi mortigis per mia bastono.

La princofilino kion povus fari, konsentis. Hejmen veninte Ŝenpo diris al la princo:

— La seskapan fajran koboldodiablون mi mortigis. Morgaŭ ni devos aranĝi la nupton!

— Ni atendu nur! — respondis al li la princo. — Ĝis morgaŭ io povos interveni!

La princofilino elrigardas tra la fenestro, ŝi jen vidas: en la aperta kabano kusadas la servistoknabo. Ŝi pensas en si: „Nur li povas esti la princofilo!”

Matene do ankaŭ la trian fikon ili sin preparas al la nupto. La nupta festantaro apenaŭ kunkolektiĝis, denove nur enfalas letero en la korton:

— Mi, la Naŭkapa Koboldo-Diablo, suprenvenos el la maro. Se vi ne edzinigos vian filinon al mi, vian princolandon mi bruligos per fajro, ĝian cindron mi ŝutos en la venton, kaj mi elskrapos viajn okulojn.

Kion povus alian fari la princo, denove li ekparolas, diras ai sia „bofilo”:

— Prenu vian fianĉinon, kunportu ŝin, vi iru al la bordo de la maro! Se vi ankaŭ tiun ĉi diablون mortigos, do ni aranĝos la nupton. Se vi ne mortigos lin,

tiam la Koboldo-Diablo forportos ŝin.

Ŝenpo do tiel faris. Kun la princofilino li ekiris al la marbordo, kaj Johano, la „servistoknabo” elkuris ekster la urbon, ekfajfis konsiderinde grandan, poste ekkriis:

— Mia grizulo, mia bona ĉevalo, venu ĉi tien, rapide!

La grizulo alvenis, demandis:

— Kian ordonon mi ricevas nun, mastro mia?

— Ni devas interbatali kun la naŭkapa, fajra, koboldodiablo, — respondis la princofilo.

— Princofilo, tio ĉi estos tre malfacila, — diris la grizulo, kaj la knabo eksaltis sur ĝian dorson. Ili forgalopis al la bordo de la maro, la knabo malsupreniĝis, alligis la ĉevalon. La knabino jam tie sidis, kaj ŝia „fianĉo” malproksime en la kanejo. Subite jen el la maro kriadis la naŭkapa fajra koboldodiablo:

— Ĉu vi alportis la princofilinon, aŭ ne?

— Ni alportis ŝin, — respondis la princofilo. Tiam ili atakis unu la alian, komencas lukti. Ili luktis, luktis, sed neniel ili kapablis venki unu la alian. La trian tagon poste la principido ĵetfaligis ĝis kokso la Koboldo-Diablon en la teron, sed li nur ĝis genuoj sukcesis la principidon ĵetfaligi en la teron. Ili luktis, luktis plu. Fine jen la princofilo fortranĉas tri kapojn de la diablo. Poste ili

luktas plu, la filo denove detranĉas tri kapojn. Dume la knabo ĝuste jam sin preparas detranĉi la restintajn tri kapojn, la Koboldo-Diablo kaptas al li, ekmordas lian manon. La knabo rebatas al la Koboldo-Diablo, kaj terenfalas ankaŭ la naŭa kapo. Poste la princofilo aliras la knabinon, montras al ŝi sian manon. Kiam la knabino la vundon ekvidas, disŝiras sian silkotukon. Kun unu duono ŝi bandaĝas la manon de la knabo, kaj la alian duonon la knabino metas en sian poŝon. Tiam la knabo eksaltas sur sian ĉevalon, forgalopas.

Kaj la knabino alkrias lin:

— Alvenu do nur foje en la domon de mia patro iom manĝi, trinki!

— Mi jam multfoje manĝis, trinkis en la domo de via patro, — respondas al ŝi la knabo, poste malaperis. Li iris hejmen, sian ĉevalon delasis, kaj si mem rekuŝiĝis en la apertan kabanon. Li ekdormis. Dume ankaŭ Ŝenpo antaŭenŝoviĝis el la kanaro, li ŝmiris sian

bastonon per sango, poste tiel alparolis la knabinon:

— Diru tion, ke mi mortigis per mia bastono la Naŭkapan Koboldo-Diablön. Se vi ne diros tion, ĉi tie tuj mi mortbatas vin per tiu ĉi bastono!

— Tiel mi diros, — respondis al li la knabino. — Kion mi povus alion diri? Tiam ili sin preparis, hejmen iris.

Kiam ili atingis hejmen, tre ekĝojis la patro de la filino, ke sia filino vive revenis. Tuj li regalis la „fianĉon” kun brando, poste diras al li:

— Nu, morgaŭ ni aranĝos la nupton!

Dumtempe la filino de la fremda princo alkuris la apertan kabanon, enrigardis tra la fenestro. Ŝi vidas: tie kuŝas la servistoknabo, lia mano estas bandaĝita per silkotuko. Ekparolas tiam la princofilino:

— Jen, tiu ĉi estas la princido! — ŝi diras.

Poste ŝi rekuris al sia patro. Ŝi mem komencas prepari la nuptan brandon, bieron, ĉion.

Kiam kunkolektiĝis la nupta festantaro, tion diras la filino al sia patro:

— Ni devas inviti ankaŭ la servistoknabon al la nuptofesto! Li akiris al ni multe da ĉevalviro, kaj vi eĉ ne unu fojon regalis lin, eĉ ne per botelo da brando.

Enmiksiĝas nun Ŝenpo, la pseŭdoprincido:

— Eĥ, por kio ni miksus lin inter la eminentularo!

— Do tiam mi iros kaj invitos lin mi mem, — respondis la filino de la princo, poste enkurie en la apertan kabanon. Ŝi komencis vekadi la knabon:

— Aŭdu, ellitiĝu, venu ankaŭ vi en la nuptofeston!

— Kion mi serĉus tie? — diras la knabo al la knabino.

Tiam la princofilino kisis lin, kaj diris al li:

— Vi estas la princofilo, neniuj aliaj! Ellitiĝu do, kaj venu!

— Nun do jam mi iras, — respondis la knabo, kaj la knabino saltleviĝis,



rekuris en la domon. Poste tie laŭvice ŝi komencis proponadi al la gastoj.

Intertempe alvenis ankaŭ la servistoknabo. Li sidiĝis sur la sojlon. La princofilino nun prenis ujon, unu kaj duono da buŝelo grandan, plenigis ĝin per memfarita, nupta brando. Antaŭ ĉio li prezentis ĝin al Ŝenpo, al sia „fianĉo”. Tiu iomete glutis el ĝi, poste subite eĉ ebria fariĝis de tio. La princofilino poste ankaŭ al la ceteraj gastoj komencis proponadi la brandon. Al kiu ajn ŝi proponis, neniu kuraĝis preni ĝin de ŝi. Tiam ŝi diras:

— Tiam mi donos ĝin al la servistoknabo!

Tiam Johano, la princofilo prenis de ŝi la grandegan ujon, kaj per unu eksorbo li eltrinkis la tuton. La knabino tiam kisis lin:

— Rigardu, tiu ĉi mortigis la diablojn! Rigardu, tiu ĉi estas la vera princofilo, ne tiu mizerulo! Kiam li venkis la naŭkapan fajran koboldodiablon, la diablo mordis lian manon. Tiam mi disŝiris mian silkotukon, rigardu, per tiu ml bandaĝis lian vundon.

— Kie estas la alia duono de via silkotuko? — demandis nun ŝin ŝia patro.

La filino tiam elprenis sian duonan tukon:

— Jen, ĉi tie estas mia tuko! — ŝi diris. La patro forprenas ĝin de ŝi, disetendas ĝin, mezuras ilin unu al la alia. Ĉiuj vidas ĝin, ĉiuj diras:

— Vere, tiu ĉi estas la princofilo.

La fremda princo nun demandas lin:

— Kiel vi donis al li vian nomon?

— Kiam mi estis ankoraŭ malgranda, respondas al li Johano princofilo, — foje mi ege eksoifis. Tiam li malsuprenigis min en profundan puton. De tie li min eltiris nur tiukondiĉe, se mi donas al li mian nomon. Mi tute ne volis en la puto pereii, do mi tiel donis al li mian nomon.

La fremda princo tiam terure ekkoleris al Ŝenpo, kaj ordonis: oni deprenu de li la princan veston, kaj lin mem elĵetu ien. Kaj tiel tio okazis. Oni elĵetis la pseŭdopricidon, kaj la vera sidiĝis apud la fianĉinon. Kiam la fremda princo mortis, la knabo dank' al la knabino ankaŭ la princecon ricevis.

Eĉ hodiaŭ ili vivas, eĉ hodiaŭ ili ekzistas.

## La ursofilo

(El la regiono de la rivero Tavda)

Vivadis-domadis iam maljuna viro kaj maljuna virino. Ili havis ankaŭ malgrandan rapokampon.

Kiam la rapo komencis kreskadi, foje nur ili rimarkis: iu ŝtelisto plene alkutimiĝis la rapon. Kiam ekvesperiĝas, io ĉiutage frekventas ĝin por ioma malgranda festeno. Tial jen unu vesperon la maljunulino diras al sia edzo:

— Maljunulo, iru nur, kaŝobservu, kiu ŝteladas nian rapon!

Ĉe sunsubiro sin preparas la maljunulo, eliras sur la rapokampon, kaj komencas gardi la rapon, Ĉu dum longa tempo li gardas ĝin, ĉu dum mallonga tempo li gardas ĝin, foje jen alvenas la teron Urso-Maljunulo kaj komencas elŝiri la rapon. Ekleviĝas tiam la homo, volas kapti la Urso-Maljunulon, sed vere kontraŭe tiu lin ekkaptas, kaj kiam ekkaptas lin, tuj eĉ formanĝas lin.

Dume la edzino de la maljunulo konstante nur atendas sian edzon, Ŝi atendas, atendas, sed tiu nur ne volas hejmen veni. Tiam la virino decidas; nun jam ŝi mem postserĉas la aferon. Vere ŝi eĉ eliras sur la rapoĀ kampon, La Urso-Maljunulo ankaŭ ŝin atakas, kaptas, poste kunportas ŝin en sian kavernon, kaj kiel edzo-edzino komencas vivadi kun ŝi.

Do kiel ili tiel vivadis-dormadis, la virino baldaŭ gravediĝis, kaj kiam alvenis ŝia tempo, ŝi naskis filon en la mondon. La supra parto de ŝia filo: la kapo kaj la manoj estis homospecaj kaj de la umbiliko komencante malsupren estis harplena, unuvorte ursospeca.

La filo de la virino de tago al tago kreskadis. Kiam li jam estis plenkreska, foje nur demandis sian patrinon:

— Patrino mia, kial ni vivas en kaverno?

— Karulo mia, pro tio, ĉar de tie ni ne povas foriri, — respondis al li lia patrino. — Apenaŭ ke ni elpaŝus, via ursopatro tuj nin sufokus.

Unu tagon la Urso-Maljunulo foriris post nutraĵon. Iel li malproksimen forvagadis, kiam la edzino kaj la filo fuĝis de li, ili forlasis la kavernon, kaj komencis kuri el la arbaro eksteren.

Ĉu dum longa tempo ili kuris, ĉu dum mallonga tempo ili kuris, foje ili rerigardas. Do ili jen vidas: la Urso-Maljunulo jam preskaŭ atingis ilin: Tiam la ursofilo elradikigis plenkreskintan betularbon, poste tiel ekbatis per ĝi la Urso-Maljunulon, ke ties animo tuj eliĝis.

La virino kaj sia filo nun preparis sin, reiris en la malnovan domon de la virino, kaj ili tie komencis vivadi. Kiam ili tiel vivadis? iun tagon la ursofilo diras al sia patino:

— Mia patrino, mi vin forlasos nun sole. Mi iros en alian landon, alian

regionon, por serĉi al mi edzinon.

La ursofilo apenaŭ ke tion elparolis, jam eĉ ekiris. Ĉu dum longatempo li iris, ĉu dum mallonga tempo li iris, foje jen apud la vojo trovis sennazan homon. La sennaza homo rigardis malsupren, kiam la ursofilo demandis lin:

Sennaza homo, kial vi rigardas malsupren?

La sennaza homo ĝuste aŭskultis la kanton de la belaj knabinoj vivantaj en la subtera mondo, sed ne kuraĝis tion konfesi, do li tiel respondis al la ursofilo:

— Tie, en la subtera mondo, miaj patro-patrino jam sep jarojn kverelas, mi aŭskultas ilian disputadon. Ursofilo, ĉu vi prenas min al si kiel kunulon?

— Jes, mi prenas vin, eĉ jam venu! respondis al li la ursofilo, kaj poste jam ili iris plu kune.

Ĉu dum longa tempo ili iris, ĉu dum mallonga tempo ili iris, ili renkontiĝis kun senorela homo. La senorela homo rigardadis alsupre, kiam la ursofilo demandis lin:

— Senorela homo, do vi kial rigardadas supren?

— Kial mi ne rigardus, — respondas al li la senorela homo, — de ie mi aŭdas belegan kantonon, sed mi ne scias, ke de kie. Ursofilo, ĉu vi prenas min al vi kiel kunulon?

— Mi prenas vin, jen venu, mi prenas vin, — respondas la ursofilo ankaŭ al

la senorela homo. Do tiel nun ili jam tri iras plu.

Ili iras, iradas, ĝis kiam ili atingas grandan monton. Ili jen vidas: ĉe la malsupro de la monto estas grandega aperturo. Nun diras la ursofilo al siaj homoj:

— Homoj, plektu al mi unu longan bastoŝnuregon, mi malsupreniĝos tien!

Liaj homoj efektive plektis ŝnuregon, poste kiam ili finpretigis ĝin, la ursofilo ligis ĝin sur sian talion, kaj komencis malsupreniĝi.

Ĉu dum longa tempo li malsupreniĝis, ĉu dum mallonga tempo li malsupreniĝis, li atingis malgrandan dometon. Li eniras la doman, sed ve, nur tie malsupre li rimarkas, ke li alvenis la domon de la trikapa drako.

— Hej, la Dieto sendis al mi manĝaĵon! krias la trikapa drako al la enpaŝanta ursofilo, kiam li respondas al ĝi:

— Trikapa drakopatro, ne manĝu min! Pli volonte mi fariĝos via servisto, kaj mi hakadas al vi lignon!

Kun tio la ursofilo eĉ jam prenis la hakilegon, eliris antaŭ la domon de la trikapa drako, kaj komencis lignon hakadi. Do, kiam li hakas la lignon, ĝiaj splitoj ĉiuj enfaladis tra la kamentubo en la domon de la trikapa drako.

— Hej, kial vi hakas ĝin tiel forte, — elkriadas al li la trikapa drako, — la splitoj ĉiuj enfalas en mian domon!

Tiam la ursofilo eniris la domon, kaj per la hakilego fortranĉis ĉiujn tri

kapojn de la trikapa drako.

Do la ursofilo jen nur tiam vidas: en la domo estas ankaŭ tri belaj knabinoj! Tri tre belaj knabinoj, ili ludas en la angulo de la domo. Li aliras ilin, la knabinoj nur ludas plu.

Tiam la ursofilo alparolas ilin:

— Kial vi ludas ĉi tie? Preparu vin tuj, poste ni iru supren!

Tiam la knabinoj kolektas siajn aĵojn, kaj ekiras. Baldaŭ ili eĉ atingis la aperturon. Tie la ursofilo alligas la ŝnuregon al la talio de unu el la knabinoj. Kaj ĉu la sennaza homo, ĉu la senorela homo komencas tiri supren la ŝnuregon. Kiam ĝi supreniĝis, ili denove malsuprenigis la ŝnuregon, kaj ili suprentiris la duan fojon la duan, kaj la trian fojon ankaŭ la trian knabinon. Poste la ursofilo ligis al si la ŝnuregon. Do ankaŭ lin ili tiras supren, sed kiam la ursofilo preskaŭ la faŭkon de la aperturo estus atinginta, per hakilo ili subite fortranĉis la ŝnuregon, kaj la ursofilo kapantaŭe refalegis, malsuprenfalis reen en la subteran mondon.

Tiam la ursofilo komencis pripensadi, kaj pensis ion, kaj reiris en la domon de la trikapa drako. Kiam li enpaŝas, en la domo li ekvidas sur la najlo la ĉaspafilon de la trikapa drako. Li denajligas ĝin, kaj iras kun ĝi ĉasi. Estis tre lerta la ursofilo, do tiel baldaŭ are falis de lia pafilo la multaj sovaĝbestoj: rangifero, anaso, sciuro, kio nur trafis antaŭ lin.

Dum ĉasado la ursofilo subite nur renkontiĝis kun unu aglo. La ursofilo demandas ĝin:

— Aglo, ĉu vi suprenportos min en la luman mondon?

— Ĉu vi havas multe da viando? — respondas al li la aglo per demando.

— Mi ĉasadis multe, do kial mi ne havus ĝin!

— Tiel do pretigu sitelojn el betula krusto, plenigu ilin per viando, sed tiel, ke ĝi estu sufiĉa eble eĉ por tri monatoj!

La ursofilo do faris tiel, li pretigis ĉion, poste laŭ la ordono de la aglo li sidiĝis sur la dorson de la aglo, kaj ili ekiris, ili komencis flugi supren. Kiam la aglo eklaciĝis, la ursofilo metis en ĝian bekon pecon da viando, laŭ kio la forto de la aglo tuj revigliĝis.

Ili jam preskaŭ atingis la supran mondon, la aglo nur denove turnas sian bekon por viando. Sed jen, jam ĝi elĉerpiĝis ĝis la lasta peco! Tiam la aglo komencis malsupreniĝi. La knabo prenis la tranĉilon, eltranĉis unu pecon el sia femuro, ankaŭ el sia alia femuro unu pecon, metas ĝin en la bekon de la aglo. Tiel do ili feliĉe alvenis supren. Tiam la aglo diras al la ursofilo:

— Stariĝu sur la piedoj, ni alvenis!

— Kiel mi povus salti sur piedoj, rekrias al ĝi la ursofilo, — kiam mi eltranĉis el miaj ambaŭ femuroj, kaj mi manĝigis per ĝi vin!

— Ha, do pro tio estis tiaj dolĉaj la du lastaj pecoj! — diris nun la aglo al la



ursofilo. — Sed eĉ vi havas feliĉon, ke mi ne sciis tion pli frue, ĉar tiuokaze mi estus vin manĝinta tute!

Tiam la aglo elspulis ambaŭ femurpecojn de la ursofilo, kaj la ursofilo metis ilin sur siajn lokojn, poste per siaj piedoj li eksaltis de sur la dorso de la aglo sur la teron. Nun la aglo reflugis en la malsupran mondon, kaj la ursofilo ekiris sian vojon.

Ĉu li iris dum longa tempo, ĉu li iris dum mallonga tempo, foje nur li alvenis iun monton, poste ĉe la malsupro de la monto al iu domo, Jen li aŭdas: en la domo oni tre-tre kverelas. La ursofilo enkriadas al ili:

— Hej, kia bruo estas tie interne?! —poste ankaŭ li eniras la domon. Do jen en la domo loĝis la sennaza homo kaj la senorela homo, ili faris tian grandan bruon. Kiam ili ekvidis la ursofilon, tuj eksurgenuis antaŭ li, kaj komencis petegi lin:

— Ursofilo, ne suferigu nin! Ursofilo, lasu nin liberaj!

— Ankaŭ sen tio vin atingos la puno de la Dieto, mi ne mortigos vin, — respondas al ili la ursofilo, kaj forpelas ilin,

Tiam la ursofilo kaj la knabinoj faris grandegan festenon, manĝis, trinkis, eble ili eĉ brandon trinkis,

Kaj mi mem tiel pensas, ke ili vivas eĉ hodiaŭ.

## La orfa knabino

(El la regiono de la rivero Tavda)

Vivadis-domadis iam maljunulo kaj maljunulino. Ili havis ankaŭ unu filinon. Apenaŭ ke la filineto elkreskis, mortis la virino, kaj la viro edziĝis kun alia virino. Ankaŭ ŝi havis jam unu filinon, kiun ŝi kunportis al la viro.

Foje la virino kaj la du filinoj foriris en la arbaron por kolekti berojn. Apenaŭ ili alvenis hejmen, diras la edzino al la edzo:

— La beroj jam estas maturaj. Prenu, elmetu vian filinon en la arbaregon!

La viro, kion povus alion fari, prenis sian filinon, elportis ŝin en la arbaron. Li konstruis al ŝi apertan kabanon. Li lasis la filinon sola, kaj hejmeniris.

Ĉirkaŭ vespero la knabino sidiĝis ĉe la apertan kamenon, kaj komencis mangetadi. Subite jen el ie musoj alkuris, ili elkaptis la panon el la mano de la knabino, kaj forkuris kun ĝi. Tiam la knabino diras al ili:

— Manĝu nur ankaŭ vi! Ĝis kiam mi havas, ĝis tiam havu ankaŭ vi! Poste kiam mi ne havos, nek vi havos.

Tiam la musoj tiel respondis al ŝi:

— Metu unu poton da akvo boli! Poste en la antaŭan angulon starigu pistujon, kaj kovru ĝin per mantelo. Nokte alvenos ĉi tien diablo, por formanĝi

la pistujon. Tiam vi eksaltu. prenu la poton da bolanta akvo, kaj surversu lin, brogu lin! Poste vi ekvidos, kio okazos!

Do efektive okazis tiel, kiel la musoj diris. La domon enkuris diablo, li formanĝis la pistujon, kaj la knabino prenis la poton, kaj surverŝis lin per la bolanta akvo. Tiam la diablo falis surdorsen, kaj la akvo eĉ la plankon bruligis tute.

Estis sur la planko argila kruĉo, ĝi nun tuj ekparolis kaj diris:

— Ve, diskrevos mia ventro!

Tiam la knabino kaptis la argilan kruĉon: do jen en tiu momento elsaltis el ĝi bela juna fraŭlo, kaj tiel li alparolis al la knabino:

— Ni geedziĝu, ni havu unu la alian!

Ili ne ceremoniadis multe, vere geedziĝis. La knabino nun ĉirkaŭrigardas: la domo estas plen-plena da ĉiuspecaj necesaĵoj, da bovinoj, ĉevaloj, malgrandaj bestoj, unuvorte da ĉio, kio ajn estas necesa en la domo de riĉa homo.

Foje la virino, la duonpatrino de la filino, diras al sia edzo:

— Maljunulo, tamen nur iru, rigardu do, kio okazis kun via filino!

Tiam la maljunulo ŝetis sakon sur sian ŝultron kaj ekiris. Li iris, iradis. Foje li jen haltis kaj komencis aŭskultadi: de ie aŭdiĝis ĉevalhenado, bovinblekado, kokokriado.

— Ej, kio povis okazi? Tiuj ĉi sonoj aŭdiĝas el la direkto de la domo de mia

filino! — pensas en si la maljunulo, poste, kiam li pli proksimen trafis, jen li vidas: la brutoj vere apartenas al sia filino. — Ve, kia riĉa ŝi fariĝis!

La viro iom restadis ĉe sia filino. Kiam jam alvenis la tempo por pluiri, la filino plenigis la sakon de sia patro per ĉiuspecaj bonaĵoj.

La viro iras hejmen, la edzino jam atendis lin ekstere ĉe la barilo. Kiam la edzo alvenis, montras al ŝi, ke jen li alportis ion! Poste li metas la sakon sur la teron, disvolvas ĝin kaj prenas el ĝi la plej bonajn manĝaĵojn unu post la alia, viandon, farunaĵojn. Hej, ekĝojas ankaŭ la edzino, kaj diras al sia edzo:

— Edzo, elportu ankaŭ mian filinon en la praarbaron!

La edzo konsentis. Kaj la edzino donis en ŝian pansakon multe da blanka pano. Poste ŝi adiaŭis ŝin, kaj la maljunulo ekiris kun la filino. Ili alvenis la praarbaron. Tie la viro konstruis apertan kabanon ankaŭ por tiu ĉi filino, poste hejmeniris. La filino restis tie sola.

Kiam vesperiĝis, la knabino tre malĝoje sidiĝis al la aperta kameno, kaj komencis manĝetadi la belan blankan panon. Foje nur alvenas ankaŭ lin la musoj, kaj diras al ŝi:

— Ankaŭ por ni donu manĝi el tio, kion vi manĝas!

— Tute ne! — respondas al ili la knabino. — Ankaŭ por mi estas tio malmulte, do tute mi ne povas doni al vi!

Tiam la musoj forkuris.

Dumtempe fariĝis nokto, la knabino malsupreniĝis de la flanko de la kameno, kaj kuŝiĝis en la antaŭan parton de la kabano. Do kiam alvenis la noktomezo, malfermiĝis subite la pordo, kaj en la domon tuj envenis diablo. Li alkuris la knabinon, kaptis ŝin je la talio, per siaj ungoj disŝiris ŝin je pecetoj. Poste ŝiajn internaĵojn li pendigis ĉirkaŭe sur najlojn.

Post kelkaj tagoj la edzino, la patrino de la filino, diras al sia edzo:

— Maljunulo, prenu vian sakon, iru, rigardu do mian filinon!

Tiam la maljunulo denove jen prenis sian sakon kaj ekiris. Li iras, iradas, alvenas en la arbaron. Li aŭskultas dekstren-maldekstren, sed vere li aŭdas nenion. Li alvenas la kabanon, eniras. Do jen li vidas: la tripoj de la filino pendas sur najloj! Ekploras la maljunulo. kolektas la organojn de la knabino, poste enmetas ilin en la sakon, kaj ekiras kun tiuj hejmdirekten. Ankaŭ dumvoje konstante li verŝas siajn larmojn.

Kiam li alvenas hejmen, donas la sakon al sia edzino, kaj diras al ŝi:

Rigardu, kio estas en ĝi:

La edzino rigardas en la sakon, terure falas surdorsen. Kiam ŝi rekonsciiĝas, ekparolas:

— Edzo, ni iru al via filino, ni loĝu ĉe ŝi!

Tiam la maljunulo kaj la maljunulino kroĉis la brakojn unu al la alia, kaj ekiris al la filino de la edzo. Kiam ili alvenas tien, ekparolas la edzo, kaj diras

al sia filino:

— Prenu, prenu nin al vi! Prenu nin vivi ĉi tie ĉe vi!

— Ni prenas vin, ni prenas vin, do venu! — respondas al ili la filino.

Tiam la du gemaljunuloj ekloĝis ĉe ili, kaj eĉ de tiu tempo ili vivas kune.

Ankaŭ mi estis tie, ili tre bontraktis min. Ili manĝigis-trinkigis min, kun biero kaj similaĵo bone satigis min!

## La ekzilita maljunulo

(El la regiono de la rivero Tavda)

Vivadis-dormadis iam ekzilita maljunulo kun sia edzino. Gefilojn ili havis nemalmulte, kaj manĝaĵon neniom. Pro tio do la edzino sendis sian edzon en la arbaron ĉasadi.

— Iru! — diris ŝi al li. — Iru, eble la Dieto donos al vi ion!

La maljunulo tiam prenis sian pafarkon, kaj iris en la arbaron. Apenaŭ ke li ekiris, jen li rimarkas aglon sur la pinto de pinarbo. La maljunulo prenas sian pafarkon, volas pafi ĝin, kiam ekparolas la aglo:

— Ekzilita maljunulo ne pafu min! Pli volonte vi kunprenu min, traktu min dum tri tagoj, por ke mi elriposu min, kaj pro tio mi donos al vi ion tian, ke vi povos sin vivteni el ĝi ĝis la tago de via morto.

Do efektive tio okazis tiel. La maljunulo kunprenis hejmen la aglon, dum tri tagoj li manĝigis-trinkigis ĝin, tiel ke la aglo tutplene refortiĝis.

La kvaran tagon matene denove ekparolis la aglo, kaj diris:

— Maljunulo, forlasu min, por ke mi elprovu: ĉu mi jam povas supren flugi!

La ekzilita maljunulo ellasis la aglon, kaj ĝi suprenflugis, supren ĝis la alta

ĉielo. Poste sin turnis, revenis, kaj tiel alparolis la maljunulon:

— Sidiĝu sur mian dorson, ni iros sur mian teron, sur mian akvon, en mian patrujon!

La maljunulo sidiĝis sur la aglon, poste ili forflugis.

Ĉu dum longa tempo ili flugis, ĉu dum mallonga tempo ili flugis, ili alvenis altan monton. Sur la pinto de la monto staris la domo de la aglo el pura oro. Ili eniris, poste komencis: dum tri tagoj ili manĝis, trinkis, brandon trinkadis.

La trian tagon la maljunulo komencis sin prepari hejmen, tiam la aglo elprenis malgrandan oran keston kaj donacis ĝin al li.

La maljunulo iras hejmen, portas la keston. Iun tagon, kiam la maljunulo alvenis al la bordo de la Granda-lago, sidiĝis sur ŝtonon, kaj komencis pensadi. Kio povas esti en la kesteto? Ne multe li pripensadis, prenis la keston kaj malfermis ĝin. Do jen en tiu momento bela, ora urbo fariĝis el ĝi! Kaj en la urbo jen tiel svarmis la multega popolo. Ĉiuj venas kontraŭ li, kaj salutas lin kiel sian princon.

Hej, tre ekĝojis la ekzilita maljunulo, sed la ĝojo ne daŭris longe, ĉar nun jam ne sciis tion: kiel oni povas remeti la urbon en la skatoleton. Li eĉ ĉagreniĝis, en sia ĉagreno preskaŭ ekploris. Kiam li tiel ĉagreniĝis, rigardis en la akvon de la lago. Do jen li vidas: koboldospirito venas rekte kontraŭ li. Kiam li alvenas tien, demandas lin:



— Ekzilita maljunulo, kial vi ĉagreniĝas?

— Kial mi ne ĉagreniĝus, — respondas al li la maljunulo, — ĉi tie estas tiu ĉi ora urbo, ĝi estas mia, ĝi fariĝis el mia kesto, kaj nun mi ne scias remeti en ĝin.

— Mi remetis ĝin al vi, — diras tiam la koboldospirito al la maljunulo, — sed antaŭe donu vian manskribon, ke kion vi ne konas en via domo, post dudek jaroj estu mia.

— Prenu nur, kion vi volas! — konsentis la maljunulo, sian mansignon li metis sur la paperon de la koboldospirito. Tiam la koboldospirito stariĝis kaj tion diris:

— Kesto, fermiĝu! — kiam efektive la tuta ora urbo fermiĝis en la kesteton.

Poste la maljunulo hejmeniris. Apenaŭ ke li hejmen alvenis, eksciis: naskiĝis al li filo.

— Hej , kia malsaĝulo mi estas, — riproĉis sin la homo en si, — pro tiu unu vorto „fermiĝu” mi donis mian propran filon al la koboldospirito!

Tiam la maljunulo eliris el sia vilaĝo, malfermis sian kesteton, tiam la ora urbo denove ekaperis, kaj li fariĝis denove ĝia princo.

Dumtempe la filo de la maljunulo konstante nur kreskis. Poste, kiel li kreskis, tiel kreskis ankaŭ lia saĝo. Nek en la urbo de la caro estis tia skribosciulo, kia li! Tial sia patro neniel volis lin transdoni al la koboldospirito.

Eĉ ne parolis li pri tio.

Do foje tamen pasis la dudek jaroj. Kaj la filo tamen eksciis de ie, ke sia patro forpromesis lin al la koboldospirito. Tiam la filo aliris sian patrinon, kaj diris al ŝi:

— Patrino, pretigu por mi iom da vojprovizaĵo! Alvenis mia tempo, mi devas iri!

Tiam la patrino bakis al li unu panon, metis ĝin en lian sakon. Kaj la filo adiaŭis ŝin, kaj ekiris al la koboldospirito.

Ĉu dum longa tempo li iris, ĉu dum mallonga tempo li iris, foje nur li alvenis al malgranda dometo. Li eniris, kaj en la domo li trovis virinon. Kiam la knabo enpaŝis al ŝi, ekparolas la virino, kaj demandas:

— Karuleto, karuleto, kien vi iras?

— Mia patro fordonis min al la koboldospirito. Mi iras nun al li, por esti ĉe li servisto. Mi ne scias, ĝis kiam mi estos ĉe li?

— Ĝis kiam? Por ĉiam! — ekparolis la virino. — Kiom ajn ili estis ĉe li, li mortigis ĉiujn. Sed mi donas al vi

fadenbulon. Iru, ĵetu ĝin sur la teron, kaj kien la fadenbulo ruliĝas, ankaŭ vi iru tiudirekten! Kaj kiam la fadenbulo alvenis al la lariko ĉe laga, kaŝu sin malantaŭ la lariko! Baldaŭ alflugos tri kolomboj, ili batfaligos sin, kaj tuj ili fariĝos mirinde belaj knabinoj. Tiam ili malvestos sin. Du knabinoj siajn

ĉemizojn metos en unu amason, la tria metos ĝin aparte. Kiam ili iras sin bani, ŝtelu la ĉemizon de la tria knabino! Se vi faros tiel, vi ne bedaŭros tion!

La knabo efektive tiel do faris. La fadenbulon li ĵetis sur la teron, kiam ĝi komencis ruliĝi, la knabo ekiris post ĝi. Ĉu dum longa tempo li iris, ĉu dum mallonga tempo li iris, kiel la virino diris, li alvenis larikon. Poste vere tien flugis tri kolomboj, ili transformiĝis knabinoj, sin malvestis, kaj subiris en la lagon sin bani. Tiam la knabo ŝtelis la ĉemizon de la tria knabino, kaj kaŝis sin per ĝi. Post la bano venis la knabinoj el la akvo, du el ili sin vestis, fariĝis kolomboj kaj forflugis. Kaj la tria, kies ĉemizo estis ĉe la knabo, ekploris, kaj komencis serĉi sian ĉemizon. Ŝi serĉas ĝin, serĉas ĝin, sed ne trovas ĝin. Subite nur diras:

— Kiu forportis mian ĉemizon? Kiu forportis mian ĉemizon? Se maljunulo ĝin forportis: mi fariĝos lia filino. Se knabino ĝin forportis: mi fariĝos ŝia fratino. Se juna fraŭlo ĝin forportis: mi fariĝos lia kara edzino!

Tiam la knabo eliris el post la arbo, redonis la ĉemizon al la knabino. Poste ili ĉirkaŭbrakis, kisis unu la alian.

— Mia amata junulo, kien vi iras? demandis nun la knabino.

— Mi iras al la maljuna koboldospirito por servisto, — respondas al ŝi la knabo.

— Tiam vi estas la ekzilitido por mia patro forvendita! — ekkriis la

knabino, poste daŭrigis:

— Se mia patro donos al vi laboron, venu nur al mi kaj rakontu tion al mi!  
Tiam ili disiĝis, kaj ambaŭ iris sian vojon.

Post malmulte da tempo la knabo alvenis la domon de la koboldospirito. La maljunulo akceptis lin kuŝante sur la lito, kaj tiel lin alparolis:

— Frateto, ĉu sufiĉa forto cirkuladas en vi?

— Kiel vi diras, — respondis la knabo.

— Ĉu sola vi venis? — demandas nun la koboldospirito.

— Sola — respondas la knabo.

— Do se vi venis sola, sidiĝu, manĝu-trinku, ĉar post la manĝo mi donos al vi iom da laboro!

Tiam la knabo sidiĝis, manĝis-trinkis. Apenaŭ ke li satmanĝis, denove jen ekparolis la koboldospirito:

— Apud la lago, vi vidis, altiĝas arbarhava montodorso. Iru, ekstermu la arbaron, la arbojn enportu, el la monto faru plugkampon, semu en ĝin grenon, poste rikoltu ĝin, draŝu ĝin, muelu ĝin, kaj el ĝia faruno baku al mi varmegan kukon.

Tiam la koboldospirito foriris, kaj la knabo enkuris al la knabino. Li rakontis, kion ordonis ŝia patro, kiam la knabino nur tion diris:

— Iru dormi, ĝis mateno mi aranĝos ĉion!

La knabo tiel faris. Kaj la knabino deprenis sian ringon de sia fingro, poste el unu mano en la alian ŝi ĵetis ĝin: tuj tie aperis ŝiaj ĉiuj mil koboldoservistoj.

— Kion vi ordonas, nia sinjorino? demandis la servistoj la knabinon, kiam ŝi tiel respondis al ili:

— Mi ordonas al vi: unu el vi ekstermu tiun arbarhavan monton apud la lago. La alia purigu ĝin, la arbojn enportu. Kelkiuj plugu la kampon, prisemu ĝin. Aliaj kuru post ili, kaj rikoltu ĝin. Poste muelu ĝin knedu ĝin, kaj ĝis mateno baku el ĝi kukon!

Tiam la koboldoservistoj forkuris, kaj nur matene ili revenis. Sed jen ili eĉ alportis la kukon! Tiam la knabino tradonis la kukon al la knabo, kaj la knabo tuj enportis ĝin al la patro de la knabino, kaj tradonis ĝin al li. Tion diras la maljunulo:

— De kiam la mil mondoj ekzistas, tian serviston ankoraŭ mi ne havis. — Tiel do mi edzinigas al vi mian plej malgrandan filinon.

Ĉu dum longa tempo ili vivis, ĉu dum mallonga tempo ili vivis, foje hejmen deziris la koro de la knabo. Li diras al sia edzino:

— Mia amatino, mi jam ege sopiras hejmen, ni iru nun en mian vilaĝon!

— Kiel ni povus iri? — demandas la edzino. — Se mia patro tion antaŭflaras, li rajdos post nin, kaj se li atingos nin, li formanĝos nin,

Tamen, vespere, la knabo kaj sia edzino transformiĝis kolomboj kaj

forflugis. Ĉirkaŭ mateno ili rerigardas, jen ili vidas: la koboldo rajdas post ilin! Tiam la edzino transformis sian edzon templo, kaj ŝi mem transformiĝis kapelano. Venas la koboldospirito, eniras la templon, kaj demandas:

— Kapelano, ĉu vi ne vidis en ĉi regiono unu virinon kaj unu viron?

La kapelano respondas nenion, nur elprenas tri kandelojn, eklumigas ilin kaj komencas preĝi: — Ospotji pomiloj, ospotji pomiloj! Ekfuriozas tiam la koboldospirito, ablasfemas la pastron, kaj ekiras reen.

Tiam la edzino kaj sia edzo denove fariĝis kolomboj, kaj tiel ili iris plu, ĝis kiam ili alvenis en la vilaĝon de la knabo, kie oni tuj faris ilin geprincoj.

Ankaŭ de tiu tempo ili vivadas en granda riĉeco kaj abundo.

## La katofilo

(El la regiono de la rivero Tavda)

Vivadis-dormadis iam maljunulo kaj maljunulino. Gefilojn ili ne havis, nur unu inan hundon kaj unu inan katon. Cetere ili estis malriĉaj, kelkfoje eĉ buŝprenon da manĝaĵo ili apenaŭ havis.

Ankaŭ foje, kiam en manĝaĵoj ili jam egan mankon suferis, tion diras la edzino al la edzo:

— Maljunulo, vi jam povus kapti al mi iom da fiŝo!

Tiam la edzo prenas la hokon, malsupren iras al Tavda. Li sidiĝas, poste ĵetas la hokon en la akvon. Apenaŭ ke li enĵetas ĝin, al sia hoko tuj alkroĉiĝis grandega, ĉirkaŭ du ulnojn longa ezoko. La maljunulo tre malfacile eltiris ĝin el la akvo, metis ĝin sur la ŝultron, poste hejmenportis ĝin. La edzino prenas la ezokon, kaj kuiras ĝin por tagmanĝo.

Kiam ŝi estis preta kun ĝi, ili komencis kaj tuj manĝis la tuton. La fiŝostetojn kaj la ostojn ili ĵetadis al la hundo kaj al la kato.

Foje ili jen vidas, ke de la ezoko ĉiuj tri, la virino, la hundo kaj la kato fariĝis gravedaj, kaj kiam alvenis la tempo, ili eĉ naskis. Al la virino naskiĝis filo, la hundo naskis virseksan idon, kaj la kato virkatidon naskis. La

novalvenintoj, kiam ili naskiĝis, bele eĉ komencis kreski.

Ĉu dum longa tempo ili vivis, ĉu dum mallongaj tempo ili vivis, foje nur la tri fratoj tion diras unu al la alia:

— Ni iru en alian regionon, sur aliajn akvojn por provi sperton kun fortaj homoj!

Tiam ili prenis decidon, kaj sidiĝis. Ĉiuj tri faris al si sagon, poste ĉiuj faris al si ankaŭ pafarkon. Kiam ili estis pretaj kun ĝi, diris:

— „Nu, nun ni elpafu niajn sagojn! Homido, vi elpafu ĝin unuafoje!

La filo nun stariĝis, kaj elpafis sian sagon. Poste sekvis la hundido, kaj lastfoje la ido de la kato. La sagoj forflugis. Tiam la fratoj diras:

— Ni iru, serĉu ilin! Kaj ili iris, ĉiuj tri.

La unuan fojon ili trovis la sagon de la homido. Kiam ili trovis ĝin, la filo ekparolas;

— Viaj falis pli malproksimen!

Tiam ili do iris plu. La duan fojon ili trovis la sagon de la hundido. Nun ekparolas ankaŭ la hundido:

— Katido, via sago falis eĉ pli malproksimen ol la nia!

Kaj ili denove nur iris plu. Dumvoje foje nur ili alvenis al triobla vojkruciĝo. Jen ili vidas: la sago de la katido estas tie enpikiĝinta en la plej meza mezo de la vojkruciĝo! Kaj ĉe la vojkruciĝo staras tabulo. Sur ĝi estas



skribita: „La dekstra vojo estas — morto. La maldekstra vojo estas — malsato. La meza vojo estas — soifo.”

Demandas nun la katofilo siajn fratojn:

— Miaj fratoj, nun laŭ kiu vojo ni iru?

— Sur la dekstra! — respondas la aliaj du, kaj tuj ili eĉ ekiris.

Baldaŭ ili rampante-glitante, kun granda peno alvenis la bordon de rivero. La rivero estis larĝa, ĝiaj bordoj estis krutaj. Nur unu mallarĝa ponto kondukis tra ĝi al la alia bordo. Ili transiras la ponton, sur la alia bordo ili trovas malgrandan dometon. Sur ĝia pordo pendas pendseruro.

— Forprenu ĝin! — ili diras al la filo. Kaj efektive la filo forprenas ĝin. Tiam ili jen rimarkas, ke malantaŭ la pendseruro estas ankaŭ alia pendseruro.

— Forprenu ĝin! — ili ordonas nun al la hundido. Jen ili vidas: malantaŭ la dua pendseruro estas ankaŭ unu tria. Ĝia pezo povis esti ĉirkaŭ tri pudoj .

— Deprenu ĝin! — ili diris tiam al la katofilo. Tiu aliris kaj per unu mano deprenis la pendseruron. Poste ĉiuj tri eniris la domon. En la mezo de la ĉambro staras tablo, plena kun mangaĵoj-trinkaĵoj. Sur ĝia angulo estas metitaj tri paketoj da karto. La fratoj sidiĝas, komencas kartoludi. Ili kartoludas, kartoludas, kaj komencas manĝi-trinki. Kiam vesperiĝas, la katofilo diras:

— Miaj fratoj, iel ni devas ekscii, kiaj homoj trairadas ĉi tiun ponton. Iu el ni eliru nokte por esplori!

Kaj la fratoj konsentis kaj decidis, ke la unuan nokton elirus la hundo por gardadi sur la ponto. Kaj la hundo efektive ekiras, kiam li alvenas, sidiĝas sub la arbon, sed poste eĉ ekdormas.

Ĉirkaŭ noktomezo elrigardas ankaŭ la katofilo sur la ponton, kaj jen vidas: la ponton gardas neniu. Tiam li prenis decidon, li mem sidiĝas sub la ponton por gardadi.

Ĉu dum longa tempo li tie sidadis, ĉu dum mallonga tempo li sidadis, foje nur aperis sur la transa bordo la trikapa drako, kaj ekgalopis sur la ponton. Do kiel ĝi tien surgalopas, sur la mezo de la ponto ekstumbas ĝia ĉevalo, kaj falas sur genuojn.

— Mia bona ĉevalo, kial vi falis sur genuojn? — demandas la trikapa drako sian ĉevalon. — Ĉu tio ĉi signifas mian morton, aŭ vian? Estas neniu en tiu ĉi regiono, kiu povus nin mortigi!

— Kial iu ne estus?! — elsaltas la katofilo de sub la ponto. — Venu nur, ni intermezuru niajn fortojn! — krias la katofilo al la trikapa drako.

— Ĉu vi volas kun mi lukti? — respondas la trikapa drako. — Ja mi metas vin sur mian manplaton, kaj per unu buŝpreno mi enbuŝigas vin!

— Mi ne asertas, mia korpo estas mola, sed la kapo ostoza! Vi ne tre havos inklinon por ke vi enbuŝigu min! — respondas la kato.

Tiam la trikapa drako diras al li:

— Sur la supro de la bordo de rivero estas kupra draŝejo. Venu, ni elprovu antaŭe, kiu el ni povos ĝin blovi pli malproksimen!

Ili iris al la kupra draŝejo. Antaŭe la trikapa drako komencis, kaj ĝi forblovis la kupran draŝejon je dek klaftoj. Poste sekvis la katofilo, kaj li forblovis ĝin je dekkvin klaftoj! Poste nun ili ekatakis unu la alian, komencis interbatali. Ili batalis, luktadis, subite jen la katofilo batfalgis ĉiujn tri kapojn de la drako per unu pugnobato. Poste li prenis ĝin, kaj ĵetis en la akvon, poste hejmeniris, kaj ankaŭ li kuŝiĝis.

Matene, kiam ili ellitiĝis, demandas la hundofilon:

— Frato, kion vi vidis dum la nokto?

— Mi vidis nenion! — respondas la hundofilo al siaj fratoj.

La fratoj manĝas, trinkas, poste komencas kartoludi. Kiam vesperiĝis, ili decidas, ke por la nokto de la sama tago ili sendas la homon por gardadi.

La filo de la maljunulino efektive eliris, poste ankaŭ li kuŝiĝis sub unu arbon por dormi. Ĉirkaŭ noktomezo eliras la katofilo sur la ponton. Jen li vidas, ke sur la ponto denove nur gardadas neniun. Tiam li denove nur restis ekstere por gardadi.

Ĉu dum longa tempo li gardadis, ĉu dum mallonga tempo li gardadis, jen venas la kvarkapa drako. Precize kontraŭ li sin direktis. Kiam ĝi alvenas la ponton, sur la mezo de la ponto stumblas lia ĉevalo.

— Bona mia ĉevalo, kial vi ekstumblis? — demandas la kvarkapa drako sian ĉevalon. — Ĉu tio ĉi signifas vian morton, aŭ la mian? Estas neniu en tiu ĉi regiono, kiu povus nin mortigi!

— Kial iu ne povus esti? — krias la katofilo al la kvarkapa drako. — Estas ĉi tie mi! Venu, ni luktu!

— Tute ne! — respondas al li la kvarkapa drako. — Estas ĉi tie sur la supro de la bordo arĝenta draŝejo. Ni elprovu, kiu blovas ĝin pli malproksimen!

Tiam la katofilo kaj la kvarkapa drako iris al la arĝenta draŝejo. Antaŭe komencis la kvarkapa drako, poste la katofilo. La kvarkapa drako forblovis ĝin je dekkvin klaftoj, kaj la katofilo je dudek klaftoj! Poste ili komencis lukti. Ili luktis, luktis, subite nur la katofilo per unu bato de sia pugno batfalis ĉiujn kvar kapojn de la drako, poste ekkaptis ĝin, suprenĵetis ĝin en la aeron, kaj iris hejmen por dormi.

Matene, kiam ili vekigis, demandas la filon:

— Nu, frato, kion vi vidis dum la nokto?

— Mi vidis nenion! — respondis la filo al siaj fratoj.

Poste ili manĝis, trinkis, kaj sidiĝis por kartoludi. La trian nokton — post la du aliaj — la vico de la gardado venis al la katofilo. Antaŭ ol li irus por la gardado, diras al siaj fratoj:

— Miaj fratoj, se atingus min malbona sorto, unu el miaj botoj mi ĵetos en

la domon.

Tiam vi venu min helpi tuj!

Tiam li iras, sidiĝas sub la ponton. Ĉirkaŭ noktomezo subite nur aperas la seskapa drako. Direkte ĝi iras kontraŭ li. Dumtempe ĉe la mezo de la ponto ekstumbas la ĉevalo ankaŭ de la seskapa drako.

— Bona mia ĉevalo, vi manĝas eĉ la ardaĵon, kial vi ekstumbis sur ĉi tiu ponto? Ĉu vi antaŭdiras morton por mi, aŭ por vi mem? Estas neniu ĉi tie, kiu povus nin mortigi!

— Se neniu estas ĉi tie, mi estas ĉi tie! — kriis tiam la katofilo al la seskapa drako.

— Ĉu tia juna vi volas kun mi lukti? Vi estas ankaŭ tiel juna, ke ne estus permesite al mi kun vi lukti! — diras la seskapa drako al la katofilo.

— Se mi eĉ juna estas, tamen mi ne cedas al vi! — respondis la katofilo. Tiam la seskapa drako malsupreniĝis de sia ĉevalo kaj diris:

— Ci tie sur la supro de ĉi tiu kruta bordo estas ora draŝejo. Antaŭe ni ekblovu ĝin ambaŭ, por ke ni vidu, kiu el ni ambaŭ estas pli forta!

Tiam ili iras al la ora draŝejo. La seskapa drako blovis ĝin je dudek klaftoj, kaj la katofilo samtiel je dudek klaftoj, tiam ili ekkaptis unu la alian, kaj komencis lukti. Jam dum duona nokto ili luktis, sed neniu povis venki la alian. Eĉ kapitulaci ne volis unu al la alia. Subite tamen elĉerpiĝis la forto de la

katofilo.

— Nur por unu momento lasu, — diras la katofilo al la seskapa drako, — por ke mi povu rigardi ankoraŭ unufoje la brilantan ĉielon!

La seskapa drako ja estis jam laca, tiel do ili lasis unu la alian. La katofilo tiam rapide deprenis sian boton de sur unu piedo, kaj forĵetis ĝin sur la domon. Flugis la boto, defrapis la putran ĉevronon de la domo. Eksaltas tiam la fratoj. rigardas tien-ĉitien, sed intertempe la fajro jam estingiĝis, ili vidas nenion. Kaj eliri ili timas.

Tiam la katofilo kaj la drako kun ses kapoj denove interbrakumas. Ĉu dum longa tempo, ĉu dum mallonga tempo ili luktas, foje nur tre malfacile la katofilo venkis ankaŭ la seskapan drakon. Li venkis ĝin, poste kaptis ĝin, kaj ĵetis en la venton. Forprenis ĝin la vento, tiel ke eĉ ero ne postrestis el ĝi. Reiras nun la katofilo al siaj fratoj. Li demandas ilin:

— Fratoj miaj, mi ĵetis al vi mian boton, kial vi ne venis por helpi min?

— Ni aŭdis nenion! — respondas al li la fartoĵoj. — Se ni estus ion aŭdintaj, kial ne estus irintaj por helpi vin?

Respondas al ili nenion la katofilo, nur tion diras:

— Fratoj, ni foriru de tie ĉi, ĉar se ni restos ĉi tie, baldaŭ ni pereos!

Tiam ili ekdecidas, do ekiras. Kiam ili iras, iradas, foje nur ili atingas vilaĝon. Ĉe la fino de la vilaĝo staras la domo de la ferforĝisto. Ili eniras al li.

La forĝista maljunulo ĝuste pretigis grandan pinĉprenilon. Nun la fratoj elrigardas tra la fenestro, jen ili vidas, ke dekdukapa drako rajdas post ili. La fratoj tiam rapide fermas la pordon de la domo de la forĝisto. Ĝis kiam ili per la riglilo riglas la pordon, la dekdukapa drako jam ĝuste alvenis. Ĝi ne povas eniri tra la pordo, nek la riglilon ĝi povas malfermi, preparas sin, ĝi mordas truon tra la pordo. Poste tra la truo ĝi enŝovas sian langon por formanĝi la tri fratojn. Tiam ili prenas la ardantan pinĉprenilon, kaj eltiregas per ĝi la langon de la dekdukapa drako. En sia doloro surdorsen falas la dekdukapa drako, kaj la fratoj elkuras kaj mortbatas ĝin. Poste ili dispecigis ĝian karnon en malgrandajn pecetojn, kaj forĵetas ĝin al la hundoj. La hundoj atakas ĝin, formanĝas ĝin ĝis la lastaj eroj.

La fratoj tiam aranĝis grandegan festenon. En sia gojo ili eĉ brandon trinkis! Ankaŭ mi ĉeestis, sed mian buŝon eĉ ne unu malgranda ero atingis!

Jen por vi fabelo, kaj por mi grasa-butera potolo!

## Konkuro

Vivis iam rangifero. Ĝi havis potencon kornaron kaj brilantajn rondajn okulojn. Dum sia kurado tiu ĉi rangifero konstante nur tion pripensis en si:

— Jen kia rapida mi estas! Mi portas ŝarĝon, tiras glitveturilon. Sur tundra, sur monto-valo, en arbaro kaj ebenaĵo nur tiel mi galopas! Se mi ne estus, kion farus sen mi la homoj?

Foje la rangifero malsuprenkuris sur la ebenaĵon. Sur la ebenaĵoj subite bruo de ia hufbatado atingis ĝiajn orelojn, kaj unu belega, korvonigra ĉevalo antaŭen galopis. Ekmiris la rangifero:

— Vi estas pompaj — ĝi pensis en si; kaj siajn belajn varmajn okulojn ĝi neniel deturnis de la ĉevalo. Poste ĝi eĉ alparolis la ĉevalon:

— Kien vi galopas? — ĝi demandis ĝin.

— Mi galopas nenien. nur tiel mi kuradas, ĉar mi estas tre rapida, — respondis la ĉevalo al la rangifero, poste tiel daŭrigis: — Rigardu nur! Sur ebena kampo mi kuras je dek kilometroj pli rapide, ol vi!

Per tio la ĉevalo finis sian parolon kaj forgalopis. La rangifero, kvazaŭ ĝi estus restinta sen piedoj, restis senmova, tiel rigardis post ĝin:

— Vere, kia rapideco! — ĝi enprofundiĝis.

Dume ankaŭ la ĉevalo tion diradis:



— Jen, kia lerta kaj kia rapida mi estas! La homoj kion povus fari sen mi?

Per tio li jen rajdis plu. Subite aŭdiĝis strangaj sonoj. La ĉevalo terurite rigardis tien: sur la reloj unu malgranda elektra tramo trakuris. Sur ĝia supro, kvazaŭ ia kornaro, supreniĝis ĝia kurentprenilo. La malgranda tramo dum sia brua ruliĝo ekfajfis al la ĉevalo:

— Ej, vi malgranda kvarpieda kuranta besto! Ĉu vin bezonas ankoraŭ iu? Apenaŭ dum unu horo mi alvenos tien, kien vi eĉ dum duontago ne atingos! Poste, vi portas nur unu homon, kaj mi po dek ilin portadas! Rigardu, eĉ kiom rapida mi estas!

Per tio la malgranda tramo forrapidegis, kaj la ĉevalo nur gape rigardis post ĝin:

— Ej, tiu ĉi estas vere io rapida! konfesis ĝi al si.

Dume ankaŭ la malgranda tramo pripensadis tiel:

— Jen vere kiom rapida mi estas! Pli rapida ol la ĉevalo, pli rapida, ol la rangifero! La homoj kion povus fari sen mi?!

En tiu momento la malgranda tramo alvenis al fervoja supra transirejon. Tuj aŭdiĝis bruado, kaj la malgranda tramo surprize rigardis supren. Sur la ponto aperis longa, grandega feraĵo. Nur tiel ĝi ŝprucis el si la fumon kaj la fajrerojn! Ĝia lokomotivo tiel alkriis al la malgranda tramo:

— Ej, vi malgranda rampulo! Rigardu, kiel rapide funkciigas min la

vaporo! Rigardu, kiel flagras la fajro en mia kaldronego! Kiun vojon vi faras dum tuta tago, mi faras tion dum kelkaj horoj! Mi salutas vin, bonan vivon!

Tiel parolis la lokomotivo, poste ekfajfis kaj rapidegis plu. Dume ankaŭ ĝi pensis en si:

— Mi estas pli rapida, ol la rangifero, pli rapida, ol la ĉevalo, pli rapida, ol la malgranda tramo. Hej, eĉ kiom forta mi estas!

La lokomotivo apenaŭ finis sian

pensadon, el la direkto de la haveno longe tiriĝanta muĝado de ŝipfajfilego aŭdiĝis:

— Tu-u! — diris la ŝipfajfilego, al la lokomotivo. — Ej, vi surtera rampulo! Vi ne povas marŝi sur la akvo. Rigardu, mi trairas la riverojn, la malproksimajn marojn. La kargon mi transportas de sur unu bordo al la alia. Kaj vi nur tiel manĝegas la karbon, vi estas multekosta, kaj vi apenaŭ faras ion rekompence! Rigardu, kiom da ŝarĝo mi havas! Ej, vi estas simple nenio alia ol nur aĉa surtera rampulo!

Tiam malgranda persona aŭto trakuris laŭlonge la landvojon. En sia antaŭaĵo du belaj lumantaj okuloj brilis. Por unu momento ĝi haltis, per siaj lumantaj okuloj kuraĝe ĵetis rigardon antaŭen, poste tiel parolis:

— Lokomotivo, kion vi faras? Ja vi nur sur la reloj povas iri! Ke vi havas kaldronegon, kaj vaporo movigas vin ... ?! Rigardu, mi havas nur malgrandan

motoron, poste mi bezonas por ĝi nur benzinon, kaj sur kia ajn vojo mi nur tiel kuregas, kiel la vento! Bonan vivon, vi relrampulo!

Per tio la aŭto adiaŭis la vagonaron kaj preterflugis plu, kiam la lokomotivo komencis pripensadi ĝiajn vortojn:

— Ĝi diras al mi, ke relrampulo. Sed vere ĝi estas prava! Ĝi iras ĉiudirekten ankaŭ sen reloj, ĉar do ĝi estas aŭto!

Dume la aŭto jam de tiu tempo malproksime kuris. La fajro de ĝiaj okuloj blindigis la kontraŭvenantojn. Subite nur supre en la alto aŭdiĝis ia bruado, zumkrakado. Aeroplano flugis super la aŭto.

— Kur-rr, mir-rr! — diris ĝiaj motoroj. — Ej, vere vi vane fanfaronadas, vi estas surteraj rampuloj ĉiuj! Mi estas pli rapida, pli bela, pli lerta, ol vi ĉiuj!

Kaj la potenca aeroplano, kvazaŭ giganta birdo, naĝis en la aero, Kaj la aŭto nur postrigardis ĝin, ĝis kiam la flugmaŝino malaperis de la okuloj sur la rando de la horizonto ...

## Postparolo

Malproksime supre sur Nordo, tie, kie la grandega monto Uralo kunligas Eŭropon kun Azio, en la regiono de la okcidentaj flankriveroj de Ob vivas malgranda popolo: la plej proksimaj parencoj de la hungaroj. La ĉirkaŭvivantaj najbaraj popoloj — kaj laŭ ili ankaŭ la ceteraj popoloj de la mondo — nomas ilin *vogulo*, kaj ili mem nomas sin mem *manjŝi-o*, aŭ *mansi-o*.

Ilia lingvo, kune kun la same parenca ostjaka (hanti-a) kaj hungara (madjara) lingvoj konsistigas la orientan, *ugran* (ugoran) branĉon de la finno-ugra lingvofamilio.

La scienca esplorado, kiel rezulton de multjardeka fortostreĉo, malkovris pere de lingva parenceco, kaj pere de kelkaj historiaj, arkeologiaj ktp. indikoj, ke la prauloj de la voguloj kaj de la hungaroj ĉirkaŭ antaŭ 1500-2500 jaroj ie en la regiono ĉe la rivero Kama, ĉe la meza parto de la montaro Uralo, kaj en la regiono de la rivero Tobol vivis kune, konsistigis unu komunumon. La postsignojn de tiu ĉi kunvivado antaŭ mil jaroj ne nur la indikoj taksitaj kaj registritaj en malvastaj sciencaj rondoj konservis, sed konservis la sama pensmaniero de la du popoloj, ilia lingvo kaj ankaŭ ilia sentomondo.

Pri la vogula popolo ni havas skribajn informojn komence de la XI-a

jarcento. Tiuj ĉi notoj atestas, ke la antaŭuloj de la vogularo nombrantaj apenaŭ kvin kaj duono, ĝis ses mil kapojn, ludis gravan politikan rolon ankoraŭ eĉ ĉirkaŭ antaŭ kvarcent jaroj en la teritorioj ĉe Uralo kaj post Uralo. Iliajn forton kaj nombron ĉiam pli kaj pli malpliigis la senkompata batalo kun la ĉirkaŭantaj popoloj kaj kun la malmilda siberia naturo. Sude la tataroj, norde la komioj (zurjenoj), kaj parte la samojedoj signifis por ili danĝeron. Sed la plej grandan suferon ŝategis sur ilin la rusaj komercistoj, oficistoj, kiuj aperis en la fino de la XVI-a jarcento, kaj la klopodoj de senfinaj plietendiĝoj de la familio Stroganov. La siberia teritorio loĝata de la voguloj, kun sia posedaĵo de peltaj bestoj milionojn valoranta, estis konstanta fonto de ekspluatado de la ŝtato de caroj, kaj de la komercistoj. La ŝtato fiksitis por ili la imposton en peltoj, kiun la senkompataj ekzekutistoj ne unu foje eĉ al la antaŭlonge mortintoj senkompate enkasigis. Ofte okazis, ke la komercistoj por brando, valoranta nur kelkajn rublojn, milojn valorantajn havaĵojn akaparitis. La komercistoj kaj impostkolektantoj kontraŭ la voguloj ofte ribelantaj, — por certigi siajn interesojn, — organizis kozakan garnizonon. Tiuj ĉi per siaj funkciadoj kelkfoje ekstermis la loĝantaron eĉ de tutaj regionoj. Nek la pravoslavaj misiistoj estis pli bonaj, kiuj ofte kiel por puno estis senditaj en tiujn ĉi siberiajn teritoriojn. La tiel ĉi tien venintaj pastroj ofte estis pli senkulturitaj, pli superstiĉaj, ol la „paganaj” voguloj kun sia religikredo, kiu kredo estis sincera,

bazita sur popolaj observadoj kaj spertoj.

La voguloj, malgraŭ sia malfacila sorto, elformis religikredon kun alta morala valoro kaj morala mondkoncepto. En la centro de ilia kredo troviĝas la kulto de la prauloj, de la mortintoj. La idolstatuoj de la prauloj de la familio staras en la plej eminenta loko en ĉiuj vogulaj domoj. Oni oferas al ili, donas al ili „manĝaĵon”. Okazas, ke la persona memoro, diservo de iu granda gvidanto, ĉefo, princo, „heroo”, kelkfoje eĉ dum centjaroj konserviĝas. En malbono, por peti helpon, la vogulo plejparte sin turnas al siaj prauloj. Li opinias sankta ankaŭ la estintan loĝlokon de siaj prauloj. Krom la prauloj kultataj kiel dioj, la vogula popolo havas ankaŭ siajn diaĵojn ĝenerale konceptitajn, siajn transmondajn sinjorojn. La plej potencaj estas inter ili la Ĉiel-dio, la Ter-sinjorino, la difiloj, inter ili la plej granda la Nepo de Virino. (Pri tiu estas aparta klarigo inter la notoj.) Post ili sekvas en la arbaroj, akvoj, montoj loĝantaj diversaj bonaj kaj malbonvolaj spiritoj, koboldoj, diabloj. La figuroj de la vogula religikredo, ilia vivhistorio, hierarkia ordo, iliaj legendoj — en siaj riĉecoj, belecoj kelkfoje konkuras eĉ kun la greka-roma mitologio. En ilia religia vivo grandan rolon havas la ŝamano, la pastro, la peranto inter la Ĉielaj potenculoj kaj la unuopaj homoj, gentoj. La voguloj, laŭ ilia kredo, senpere ne povas sin turni al la diaĵoj, spiritoj, nur se la ŝamano, kiu aspergas ilin per sangaj ĉevalaj, rangiferaj oferaĵoj kaj per sensangaj monoferaĵoj akiras ilian

bonvolon, forigas la malsanon, la malsatmizeron, kaj elpetegas la pli riĉan fiŝkaptajn kaj ĉasaĵon. En la kredokoncepto de la voguloj centran lokon havas la urso kaj la ursokulto. La urso havas kultan estimon ĉe la voguloj, ĉar ĝi estas la filo de dio, kaj ĝi pro tio iradas sur la tero, por ke ĝi prizorgu la homojn, defendu la veron kaj punu la malbonulojn. Ĝian nomon ili ne elparolas, kelkaj gentoj havas ĝin kiel sian praulon. Ili eĉ ne ĉasas ĝin kun senpera intenco, kaj se hazarde ili „tamen” ĝin mortpafas, post ĝia morto kultas ĝin per festeno. Dum la festeno, ursofesto, oni faras al ĝi oferaĵon, ludas antaŭ ĝi teatraĵon, marionetludon, kaj en kanto oni rakontas ĝian vivon. En diskuteblaj aferoj oni ĵuras al ĝi, kaj la knabinoj ĝin petas, almetante ringon sur ĝian ungegon, por ke ĝi sendu al ili fianĉon.

Surprize alte estas evoluiĝinta la morala mondkoncepto de la vogula homo. Inter aliaj la ŝtelado, la trompo kaj la mensogo estis por ili fremda kutimo, kiujn ili ekkonis nur pere de la „civilizacio”, pere de la komercistoj.

El vidpunkto de socia ordo la voguloj konservis tre antikvajn tradiciojn. La formoj de la antikva genta organizo, ĝiaj unuopaj restaĵoj preskaŭ eĉ en niaj tagoj kiel vivantaj sociaj faktoroj, fortoj efikas. En kelkaj rilatoj, rudimentoj konserviĝis eĉ la postrestaĵoj de la matriarkeco. (Ekz. la registrado de la deveno laŭ la patrina branĉo; tiel ankaŭ la nomigo „Nepo de Virino”.

La voguloj laŭ gentoj formis sociajn unuecojn kun komuna ekonomia ordo,

kun praulkulto, kun religia organizo. Sekve de tio en ilia ĉiutaga vivo la plej preciza registrado de gradoj de la diversaj parencecoj elformiĝis. Se ni volus resumi la vogulajn parencec-nomojn (ekz. boonklino, bopatro, bofilo ktp.) eĉ nur laŭtabelle, ankaŭ tiu resumo okupus tutan paĝon.

La vogulaj gentoj, — eĉ en la plej lastaj tempoj, — vivis en „vilaĝoj”, kiuj efektive nur el kelkaj domoj konsistis.

En kelkaj lokoj aparte, ankaŭ por religiaj celoj destinitaj konstruaĵoj, „temploj” estis, kien ili apartenis laŭ gente. Ili mem, simile al la ceteraj finnugraj popoloj, — pli altan socian organizaĵon ne estigis. Laŭ feŭdalaj rilatoj kaj laŭ tata militista influo. poste laŭ rusa influo ja ankaŭ eĉ ili estiĝis teritoriaj organizaj unuecoj, „princecoj”, sed tiuj ĉi estis nur pli volonte eksteraj grupiĝoj, plurfoje en intereso de pli facilaj enkasigoj de la impostoj. La unuopaj princecoj havis pli grandan rolon nur okaze de militoj, kiam, — ĉefe kuniĝintaj en federacioj, — ili signifis gravan danĝeron ankaŭ por la rusaj princecoj Moskva kaj Novgoroda. (Ĉirkaŭ ĝis la XVI-a jarcento.)

Hodiaŭ la voguloj adaptiĝis en la ordon de la nuna vivo. Ili havas kolhozojn, kiuj konforme ĉu al la antikvaj kutimoj, ĉu al la lokaj donitaĵoj, okupiĝas pri ĉasado.

Estas interese ankaŭ la konserviĝo de la antikva kutimo de eksogamio (geedziĝo ekster la gento) dum jarcentoj. Kaj tio ĉi estas vogula specialeco



strikte koneksa kun la nacia socio. La vogula viro nur el alia gento povas edziĝi, La obeplenumo de tiu ĉi kutimo, precipe pli antaŭlonge, kelkfoje postulis grandajn oferojn. La unuopaj edziĝantoj ofte devis fari malproksimajn vojojn, por ke ili povu ricevi konvenan vivkunulinon. Ilia vojo ofte donis okazon por multaj aventuroj, ofte por bataletoj, kaj tiel estiĝis konstantaj fontoj de la herooj de fabeloj. (V. ekz. la fabelon *La ekbruliga tindro*.)

La voguloj, dank' al ilia historia donitaĵo, en sia popola kulturo kreis proprecan, riĉan mondon. En sia tradicio ili konservis eksterordinare antikvajn, arkaikajn formojn, kiuj kelkfoje en malproksimecon de miljaroj etendiĝis. (Ekz. la kredo en la magia forto de la fero, genta socio, ktp.) Aliparte, vivante ĉe la renkontiĝo de Eŭropo kaj Azio, ili adaptiĝis al la ĉeno de popola vivo, kredo, mondpercepto kaj fabelmondo, kiu ĉeno etendiĝis de la Balta maro kaj de la regiono de Danubo ĝis la Malproksima Oriento. (Ekz. la ŝamanismo, la bredado de rangiferoj, la fabeloj pri drakoj, ktp.)

La voguloj en sia medio estas famaj sur malproksimaj regionoj pri sia kantokulturo, pri sia riĉa popola kreoforto, precipe iliaj nordaj grupoj (en la regionoj de la riveroj Sosva kaj Sigva.) Preskaŭ ĉiujn erojn de ilia vivo kaj laboro trateksas la kantado, la dancado, kaj la fabelado. Nur tiel ŝprucfluas, fontanas, inundas el iliaj buŝoj la parolo, plejparte tre arte formita!

La fabelo havas tre eminentan lokon en la vico de la riĉaj vogulaj popolaj

kreaĵoj, — popolkanto, heroa, ursaj kaj sortaj kantoj, teatraĵoj (interalie la marionetludoj), enigmaj demandoj. En la mondo de tiuj ĉi fabeloj viciĝas la tuta vogula vivo, montriĝas ilia mondkoncepto, morala ordo. En la mondo de tiuj ĉi fabeloj princoherooj pli potencaj, ol dio, batalas unu kun la alia, por ke ili elprovu siajn fortojn, aŭ por akiri por si virinon. Kaj en kiu arbaraj koboldospiritoj, difiloj, transmondaj fortoj pli forte ol ŝtono kredataj, potenculoj sin enmiksas en la sorton de la homoj. La figuroj de ilia religikredo estas: Torem-dio kaj liaj filoj, la Nepo-de-Virino, la Urso-Maljunulo kultita kiel dio, la diversaj bonvolemaj aŭ malicaj princoj, ŝamanoj. Riĉe etendiĝas antaŭ ni la unuopaj okazaĵoj de la ĉiutaga vivo: la fiŝkaptado, la ĉasado, la hejmaj laboroj, la svato, la enamiĝo, la naskiĝo kaj la morto. Kun konsterna aspekto disvolviĝas la terura malsato, kiu antaŭe tiel regule okazadis, kiel kiam la vintro sekvas la someron. (Vidu la fabelon *La panoflano*.) En tiuj ĉi fabeloj esprimiĝas la socialaj bataloj, deziroj de la popolo: la lukto kontraŭ la komercistoj, kontraŭ la subpremantaj princoj, kaj finfine la senmezura okcident-siberia regiono, kie estas la distancoj tiel grandaj, ke kiu povus tion diri: „Ĉu dum longa tempo oni iris, ĉu dum mallonga tempo oni iris,” ĝis kiam oni alvenis ien sur ĝi.

La vogulaj fabeloj ne nur laŭ ilia enhavo, sed ankaŭ laŭ ilia artospeco diferencas de la artospecoj konataj ĉu ĉe la hungaroj, ĉu ĉe en Eŭropo ĝenerale

konataj. En la plej unua momento eble tio estas okulfrapa, ke tiuj ĉi fabeloj enhavas malmultan „fabelan” motivon, kaj samtempe ili estas multe pli proksimaj al la reala vivo, eĉ al ties rigida flanko. (Ekz. la fabelo pri la malsato.) Ne tiel, kiel tio kutimis esti en la fabeloj de aliaj popoloj. Eble strange tio sonas: ĉe la vogulaj fabeloj iomete ni devas pripensadi, ni devas deŝiri iliajn eksterajn formojn, okazintaĵojn, por ke aperu antaŭ ni ilia direndaĵo, beleco. precipe al la hungara publiko estas surpriza kelkfoje ankaŭ la strukturo de la fabeloj, kiu publiko legas ĉefe eŭropajn kaj orientajn fabelojn. Unuopaj fabeloj estas tute komplikitaj. Tiuj enhavas ankaŭ kvazaŭ „antaŭfabelojn”. (Ekz. la fabelo *La kuprohomo*.) Tio okazas ofte pro la plenŝtopado de la unuopaj motivoj, preskaŭ atingante la limojn de la kadra rakonto, — kun memstaraj herooj, figuroj. Strangan atmosferon sorĉas antaŭ nin la oftaj konstantaj situacioj, turniĝoj de la fabeloj. (Tiaj formoj estas ekzemple: „ili vivadis-dormadis”, kio signifas, ke dumtage ili *vivis*, kaj dumnokte *domadis*, do: ili ekzistis, estis; „ili manĝis-trinkis”, „ili kuŝiĝis, leviĝis”, ktp.) Interesa estas la preskaŭ konstanta dialoga formo, kaj la simpla lingvaĵo aspiranta kelkfoje al stilizado, karakterizado. (Ekz. en la *Mirinda historio*.)

Ĉe la voguloj la fabelado estas eĉ hodiaŭ vivanta, evoluanta artospeco, plej signifa epika esprimo de popolo, kiu nur ĵus alligiĝis en la literaturan

vivon. Por ili la fabelo estas ne nur distriĝo, sed ankaŭ edifa kaj didaktika komunikaĵo. En fabeloj ili transdonas al la posteuloj la kulton de la prauloj, iliajn historiojn, ofte la malgrandajn konojn de la praktika vivo, kaj ankaŭ nemalofte alportas sciigojn pri la vivo de malproksimaj regionoj, pri iliaj moroj. (Ekz. en la fabelo *La fileto de la plej malgranda fratino* pri la lavujo (saŭno) uzata en Nord-Eŭropo.)

Ĉe la voguloj la unuopaj eminentaj fabelantoj estas en granda estimado, kaj tra longaj generacioj oni primemoras ilin, iliajn fabelojn. En la 20-aj jaroj mortis unu el iliaj plej eminentaj fabelantoj, Karaj-ojka, kiu vivis preskaŭ 120 jarojn, kaj estiĝis ĉirkaŭ li preskaŭ tuta „skolo”. Liaj disĉiploj transdonis plu la fabelojn de li aŭditajn. Estas kompreneble, ke ĉe la voguloj preskaŭ precizaj „reguloj”, vera tradicio de la fabelado estiĝis, malgraŭ tio, ke en iliajn fabelojn kelkfoje enmiksiĝis ankaŭ la personaj travivaĵoj de la fabelantoj. (Ekz. en la fabelo *La kupra homo* la rimarko pri la fervojo.)

Stranga trajto de la vogula fabelado estas, ke kelkajn fabelojn aŭskulti al virinoj, knabinoj ne estas permesate. Precipe tiujn, kiuj enhavas religiajn temojn. Ĉe aliaj popoloj precize la virinoj estas kompetentaj pri la fabelado. Verŝajne tio estas la klarigo de tiu ĉi vogula kutimo, ke en la pratempoj la virinoj nur en limigita mezuro partoprenis la religian vivon, estante „malpuraj”. Ne estas seninterese same tiel noti, ke la voguloj iliajn fabelojn registras ankaŭ

laŭ loko (ilia naskiĝloko), same kiel iliajn ceterajn popolajn kreaĵojn, ekzemple ornama motivo sur vazo, aŭ rita virdanco. Tiu ĉi ilia kutimo estas konservita ankaŭ en tiu ĉi kolekto, kiam la fabeloj estas grupigitaj laŭ regionoj, laŭ riveroj, ne laŭ la pli kutima, sin proponanta laŭenhava grupigo. Des pli, ĉar per la ĉimania ordigo fariĝas sentebla la diferenco inter la vivo de la vogularo norda (el la regiono de Sosva) kaj tiu de la suda (el la regiono de Tavda), kiu ankaŭ en la fabeloj tre akre respuguliĝas. En la nordaj fabeloj montriĝas antaŭ ni bildo de komunumo fiŝistaĉasista, dum en la sudaj ofte aperas ankaŭ la terkulturado. (En la fabeloj *La ursofilo*, *La kupra homo*, *Mirinda okazintaĵo*, ktp.) La diferencon inter la nordaj kaj sudaj vogulaj fabeloj pliigas eĉ la malsimileco de la fremdaj influoj ilin atingantaj, kiuj algluiĝis la pli antikvajn motivojn. Precipe forta estis la tataara influo atinganta la sudan vogularon, per kiu multaj orientaj elementoj miksiĝis en iliajn fabelojn, tiel la drakoj, la blovado de draŝejo, ktp. (En la fabelo *La katofilo*.)

Bela ekzemplero de la eĉ hodiaŭ vivanta vogula fabelado estas la fabelo *Konkuro*. Ĝi estas fabelo kun literatura lingvaĵo, en kiu aperas hodiaŭaj modernaj objektoj, konceptoj (aŭto, fervojo, aeroplano), vestitaj en unuopaj antikvaj motivoj. Tiu ĉi fabelado atestas pri tio, ke la krea kapableco de la vogula popolo ankaŭ hodiaŭ aktive laboras, kaj kun fabelada ekvido havigas al si ankaŭ la rezultojn plej novajn de la tekniko.

Fine mi mencias la ĉarman motivon, ke konstante aperas el la vogulaj fabeloj por la hungaroj la sento de la parenceco vogula-hungara. Dum la legado de la vogulaj fabeloj ofte ni pensas: ni legas hungaran popolfabelon. Por hungaroj la medio estas fremda, la nomoj estas nekutimaj, alispecaj estas la turniĝoj, tamen iel la tuto estas konata. La fabeloj *La ursofilo*, *La kupra homo*, kaj ankoraŭ pluraj aliaj fabeloj, kvazaŭ inter la hungaraj popolfabeloj troviĝus. Vere tiuj ĉi ne estas aliaj, ol la respeguladoj malhelaj de la kunvivado antaŭ pluraj miljaroj!

*János Gulya*

## Klarigoj

### Urso

Ĉe la voguloj la nomo de pluraj bestoj estas tabuo, (ekz. urso, lupo, ktp.), kio signifas, ke estas malpermesate elparoli iliajn nomojn. Tial tiujn ĉi bestojn oni nomas per ĉirkaŭskribo: la urso estas Granda Arbara Maljunulo, Granda Maljunulo, Kavernologanta Maljunulo, aŭ nur simple patro, maljunulo, ktp.; la lupo estas rangiferpereiga besto, kaj tiel plu. Tiujn ĉi bestojn pluraj popoloj kaj triboj registras kiel siajn praulojn. Simile, kiel ĉe la hungaroj la mirakla cervo. Tiuj popoloj prisilentas iliajn nomojn, parte pro estimo, parte pro timo. La restoj de tiu ĉi opinio ankaŭ hodiaŭ preskaŭ ĉe ĉiuj popoloj estas troveblaj. Tia estas ekzemple en la hungara lingvo la vorto szarvas (cervo) t.e. kornulo, la farkas (lupo) t.e. vostulo. En tiun ĉi kategorion apartenas ankaŭ la hungara vorto medve (urso), kiun la prahungaroj esprimis per fremda vorto, per slava alveninta vorto. Cetere ankaŭ la vorto medve (urso) mem en la slavaj lingvoj origine signifas same tiel per ĉirkaŭskribo „mielmanĝulo”.

## **Nepo-de-virino**

*Filo de Masmavirino, Gardanta Viro-de-Mondo*, aŭ nur simple *Nepo de Virino* estas la plej populara heroo de la popolfabeloj vogulaj (mansiaj) kaj kun la voguloj parencaj ostjakaj (hantiaj). Multegaj fabeloj temas pri li, en kiuj li montriĝas kiel fabela heroo ĉu religia, ĉu ŝerca, ĉu nur simpla. Ofte li montriĝas kiel la plej kara filo de Torem-dio (Ĉiela dio). Li marŝas tra la mondo kiel *Gardanta Viro de Mondo* sur sia flugilhava ĉevalo. Li zorgas pri la homo vogula-ostjaka, respektive pri la sorto de la tuta mondo. En multaj fabeloj, ne respektante sian ĉielan rangon, li senindulge luktadas kiel ruza filo de malriĉa popolo kontraŭ la enkorpiganto, simbolizanto de la subpremantoj : la *Urba Princ-Maljunulo* kaj liaj filoj.

## **Vogulo**

Vogulo estas popolo finn-ugra, vivanta oriente de la montaro Uralo. Ili mem nomas sin en sia lingvo manŝio aŭ mansio. Ili estas la plej proksimaj parencoj de hungaroj.

## **Ostjako**

Ostjako, aŭ hantio, aŭ asjaho estas finn-ugra popolo vivanta oriente de la



montaro Uralo en Azio. Ili estas la plej proksimaj parencoj de voguloj kaj hungaroj.

### **Maljunulo**

En la vortuzo vogula la esprimoj *maljunulo*, *maljunulino* signifas antaŭ ĉio ne agon, sed plie ili esprimas alvokon, alparolon, estimon. Same tiel la vortoj *pli maljuna fratino*, *pli juna fratino*, *nepo*, *nevo*, *kuzo*, *onklo*, *ktp.* ne signifas ĉiam laŭsangan parencecon, sed plejparte simplan alvokon.

### **La loko de la virinoj en la tendo**

En la tendo, aŭ en la domo de voguloj la virinoj povas restadi, dormadi nur en loko por ili difinita. Tiu ĉi loko estas ordinare la antaŭa parto. En la malantaŭa parto estas la hejma altaro, la statuoj de diaĵoj, idoloj, prauloj.

### **La knabino**

*En senfajruja, senakva domo loĝanta knabino* — signifas virgulinan knabinon. Ŝi ne bezonas aparte fajrujon, akvujon en sia „domo” (ĉambro), ĉar ŝi loĝas ankoraŭ ĉe siaj gepatroj, ŝi apartenas al ilia ekonomia komonumo.

## **Ŝamano**

*Ŝamano* — estas pastro, peranto inter la ĉielaj potenculoj kaj la homo. Li ordinare falas en ekstazon pere de ia narkotaĵo (ekz. venena fungo ktp.), aŭ pere de bruoj, tamburado, kaj tiel li ekscias la veron, peras la peton al la prauloj, al la spiritoj, kaj al la diaĵoj. Samtempe li estas ankaŭ la kuracisto, kiu elpelas el la homo la malsanon, la malbonan spiriton.

## **Torem**

*Torem* aŭ *Tarem*-dio — estas la nomo de la plej supera diaĵo ĉe la voguloj, de la *Ĉileo*. Kreanta Dio. En la hungara lingvo *Teremtő* (Kreanto). (Teremtő Isten — Kreanta Dio.)

## **Samodejo**

*Samojedo* — estas la resuma nomo de la popoloj vivantaj en Nord-Orienta Eŭropo kaj en Nord-Okcidenta Siberio, apartenantaj al la popoloj de finn-ugra lingvofamilio (njenjeca, selkupa, ktp.). Tiu ĉi popolgrupo estas ankaŭ malproksima parenco de hungaroj.

## **Ĉuval**

Ĉuval, ĉuvalo, ĉuvalkameni, aperta kameno, estas speco de fajrujo en Nordo uzata. Tiu ĉi fajrujo estas kun duone malfermita fajro. Ĝi estas staranta, ŝmirita speco de fajrujo, en kiun oni pendigas la kaldronon, poton per kroĉiloj. Efektive ĝi estas kamentubo malfermita, malsupre etendiĝanta. La domo en kiu estas aplikita la ĉuvalo, estas ĉuvalkabano, aperta kabano. Ĉuvalo estas do duonmalfermita fajrujo, kameno.

## **Rozarbobela**

*Rozarbobela, padusarbobela bukla knabino* – estas la esprimo, epiteto de la vogula virina beleco.

## **Ĉielvolbo**

Laŭ religikredo de voguloj la ĉielvolbo, firmamento konsistas el fero.

## **Gulo**

La gulo — estas tre manĝegema, malgranda rabobesto. Ĝi apartenas al la familio de musteloidoj. Latine Gulo gulo L.

## **Edziĝo**

Ĉe la voguloj iam la akiro de edzino okazis parte per aĉeto, parte per armila perforto.

## **Animo**

Laŭ opinio de voguloj la homo konsistas el tri partoj: el korpo, el animo kaj el ombranimio. La ombranimio estas eĉ videbla, ĝi estas ĉiam kun la homo. La ombranimio kaŭzas al la homo la plej multajn malbonojn kaj malfacilaĵojn. Ekz. post la morto la ombranimio resopiras inter la ceterajn homojn, ĝi volas kunporti ankaŭ aliulojn. Pri la defendo kontraŭ ĝi temas ankaŭ la finalo de la fabelo „La tri fratinoj kaj la serpentoviro.”

## **Princoheroo**

*Princoheroo* — estas la kavaliro de la vogula epiko.

## **Gardejo**

Gardejo, grengardejo, grenujo, tenejo, konservejo, provizejo. En la unuopaj fabeloj ofte troviĝanta gardejo estas speciala vogula konstruaĵo por mangaĵojn kaj valoraĵojn. Ĝi staras sur altaj fostoj, kaj servas kiel defendo plie kontraŭ la

bestoj, ol kontraŭ la homoj (ŝtelistoj).

### **Ursofesteno**

Post ursoĉasado okazis festeno rita. Okaze de la festeno oni faris katafalkon por la pajloŝtopita felo de la mortpafita urso. Antaŭ la katafalko oni dancis, kantis, aranĝis dramajn ludojn, sed tio estis farita eĉ pli por propra distraĵo. Tiuj ĉi festenoj estis preskaŭ la plej gravaj manifestadoj de la vogula komunuma, intelekta vivo. La plej grava, plej signifa parto de la festeno estis la ursokanto. (Vidu la finon de la fabelo *La muso*.) En la ursokanto en la nomo de la urso iu rakontis ĝian dian devenon, vivon, taskon kaj fine — ĝian mortpafon.

### **Riveroj**

En la nomoj de riveroj *Kama*, *Mort* menciitaj en la ursokanto konserviĝis la memoro de la eŭropa patrujo de voguloj.

### **Soper**

La preciza signifo de la vorto *Soper* estas nekonata. Hodiaŭ nur en fabeloj, en epopeoj ĝi troviĝas. La vorto laŭ deveno eble estas kunligita kun la vorto *sabir* (nomo de popolo). (Siberio?) En la fabeloj ĝi troviĝas plejparte en senco eminenta, bona, elita.

## **Mansigno**

El la unuopaj vogulaj gentoj ĉiuj havis sian skriban (skulptitan, ĉizitan, pentritan ktp.( „signon”, noton, markon. Al unu gento apartenantaj ĝenerale uzis komunan signon. Tiu ĉi signo troviĝis en la katalogo de impostoj, en kontraktoj, ktp. ankaŭ kiel subskribo,

## **Sinjoro, kompatu**

„*Sinjoro kompatu!*” — rusa pravoslava eklezia preĝo, petego, kun voguleca elparolo: — „*Ospotji pomiloj*”.

## **Bonan vivon**

„*Bonan vivon!*” — estas vogula saluto.

## **Finn-ugraj popoloj**

La trunko de finn-ugraj popoloj havas tri branĉojn.

La finna, okcidenta branĉo konsistas el la popoloj lapona, finna, estona, karela.

La meza, volgo-regiona branĉo konsistas el la popoloj mordva, maria, komia, udmurta.

La orienta, ob-regiona, ugra (ugora) branĉo konsistas el la popoloj vogula, osjaha, hungara.